

MODERNAJ AŬTOROJ

JACINT VERDAGUER (1845-1902)

La nacia poeto kataluna naskiĝis en la vilaĝo Folgueroles, apud Vich, filo de humilaj kamparanoj. Li lernis en la Pastra Seminario de Vich, kaj fariĝis pastro en 1870. Jam kvin jarojn antaŭe, li estis atinginta ĉe la Floraj Ludoj en Barcelona sian unuan premion, kiun li iris akcepti kamparane vestita kaj kun la "barretina", antikva kataluna kapkovraĵo. De post sia unua poemo, li senĉese verkis literaturaĵojn. En 1872, celante resaniĝon, li fariĝis pastro de unu el la ŝipoj de la "Transatlantika Kompanio". Dum siaj marvojaĝoj li konceptis la poemon "Atlantido", kiu aperis en 1877, lasante la poeton konsekrita. Atinginte resaniĝon, li finis siajn marveturojn kaj restis kiel pastro en la palaco de la Markizo de Comillas. En 1886 aperis la dua epika poemo de Verdaguer "Canigó". Kiam li estis en plena gloro, en plena triumfo, komenciĝis por la poeto epoko de akraj intimaj ĉagrenoj. Li forlasis la markizan palacon. La ekleziaj aŭtoritatoj transloĝigis lin al la preĝejo de La Gleva. Oni eĉ malpermesis al li la ĉiutagan diservon. En tiu epoko, li verkis unu el siaj plej belaj libroj "Floroj de la Kalvario", multajn mistikajn poemojn kaj eĉ serion de artikoloj "En propra defendo", sur Barcelona ĵurnalo, defendante sin kontraŭ siaj malamikoj. Pri tiu epoko de la vivo de la poeto naskiĝis multaj legendoj kaj la popola fantazio multe sin okupis pri li. Ju pli da jaroj forpasas, des pli rezultas el ĉio la konkludo ke la granda poeto kataluna, kiel multaj aliaj similaj spiritoj, ne sciis adaptiĝi al la realaj kaj prozaj aferoj de la vivo, kaj liaj puraj flugiloj falis sur la koton de la tero ĉirkaŭata de la amo de la popolo, li mortis kun rezignacio de sanktulo en la "Villa Joanna" en Vallvidrera, apud Barcelona, la 10 de Junio de 1902. Lia enterigo estis populara demonstracio partoprenata de miloj kaj miloj da personoj. Pri la tragedio de "Pastro Verdaguer" verkis faman dramon ("La mistikulo") la kataluna aŭtoro Santiago Rossinyol. Kiel memorigo al la alta poeto, staras monumento en Barcelona, ĉe la Gran Via Diagonal.

El ĉiuj verkoj de Verdaguer, mistikaj, religiaj, patriotaĵoj, pri tradicioj, k. t. p. distingigis la du aluditaj poemoj "Atlantido" kaj "Canigó".

La "Atlantido" estas epika poemo, laŭ la greka maniero, konsistanta el 2.590 versoj, dispartigitaj en enkondukon, dek kantojn kaj epilogon. La poeto kantas la enfundiĝon, ĉe la Atlantika Oceano, de la antikva kontinento nomata Atlantido, loĝata de la reĝo Atlas kaj lia edzino Hesperis kaj iliaj filoj Atlantoj aŭ Titanoj, kiuj pretendis grimpi al la ĉielo kaj sentronigi Dion, kiu, por puno, enfundigis la kontinenton en la fundon de l' maro. Tri temojn kunfandas en unu solan argumenton la genio de Verdaguer: la enfundiĝon de Atlantido, la agojn de Herkuleso kaj la eltrovon de Ameriko. Tiu-ĉi poemo estas tre originala. Ĝia inspiro ne

estas ĉerpita en verkoj de antaŭaj poetoj. Nuraj aludoj en dialogo de Platono pri la enfundiĝo de Atlantido sufiĉas por ke nia poeto starigu sian konstruaĵon. Oni riproĉis ke Verdaguer faris poemon "geologian". Sed la poezio kuŝas en ĉio, kaj la Verdaguera poemo estas, en lasta okazo, kolosa kantado pri la Naturo en ĝiaj gigantaj manifestiĝoj.

Se la poemo "Atlantido" havas karakteron, por tiel diri, universalan, sciencan, mitologian, la poemo "Canigó" havas karakteron nacian kaj kristanan. En la dek-du kantoj kaj epilogo de tiu poemo, kiu en kelkaj rilatoj eĉ superas la "Atlantidon", estas rakontataj la rekonkero kaj fondiĝo de la kataluna patrujo. La poeto kantas la belecojn de la montaro Canigó, la ĉarmon de la reĝino de la nimfoj "Flordeneĝo", la ensorĉon de la juna kavaliro Gentil, la heroajn agojn de la grafoj Tallafarro kaj Guifre, la virton de la episkopo Oliva, la finon de la regno de la nimfoj, la fondiĝon de la monaĥejo de Sant Martí de Canigó kaj resume la unuajn tempojn de la kataluna nacio, "apogita al la Pireneo, kun la piedoj en la maro kaj la frunto en la ĉielo". La poemo "Canigó" estas plena de riĉaj kaj fantaziaj priskriboj. Ĝia bela stilo, la varieco en la temoj kaj eĉ en la versaj formoj, allogas ankoraŭ pli ol ĉe la "Atlantido".

Pli ankoraŭ ol pro lia karaktero de poeto epika, patriota, mistika, oni ŝatas la poeton Verdaguer pro la filologia valoro de liaj verkoj. Verdaguer brilas ne nur pro la alta inspiro de siaj poemoj, sed ankaŭ pro la riĉaj esprimoj kaj leksikono kiujn li ĉerpis el la popolo, gardinta ilin dum tri jarcentoj da lingva dekadenco. Post Verdaguer, la kataluna lingvo rajte reprenas sian econ de lingvo literatura. Kaj prave en la modernaj tempoj oni donis al la renaskiĝinta kataluna lingvo la alnomon "lingvo de Verdaguer".

Bibliografio: Ekzistas multaj eldonoj de Verdaguer, ĉu de apartaj verkoj, ĉu de la plena verkaro. Kelkaj el liaj verkoj estas tradukitaj en diversajn lingvojn. Rimarkinda estas la monumenta eldono de "Atlantido" en la originala lingvo, kun ilustraĵoj. La popola eldono de la plena verkaro de la poeto, farita okaze de la starigo de lia monumento, estas dividita en 27 volumojn:

I. L'Atlàntida.—II. Idilis i cants místics.—III. Montserrat.—IV. Caritat.—V. Canigó.—VI. El somni de Sant Joan.—VII. Excursions i viatges.—VIII. Pàtria.—IX. Dietari d'un pelegrí a Terra Santa.—X. Jesús Infant. Bethlem.—XI. Jesús Infant. La fugida a Egipte.—XII. Jesús Infant. Nazareth.—XIII. Roser de tot l'any.—XIV. Veus del bon pastor.—XV. Sant Francesc.—XVI. Flors del Calvari.—XVII. En defensa pròpia.—XVIII. Santa Eulària.—XIX. Aires del Montseny.—XX. Flors de Maria.—XXI. Nerto. Càntic dels càntics.—XXII. Eucarístiques.—XXIII. Al Cel.—XXIV. Rondalles.—XXV. Folk-lore.—XXVI. Discursos. Articles. Pròlegs.—XXVII. Càntics.

ATLANTIDO

Poemo de JACINT VERDAGUER

Fragmenoj tradukitaj de JOSEP GRAU CASAS, L. K.

ENKONDUKO

En marmezo renkontiĝas Ĝenova ŝipo kun alia el Venezia kaj batale atakas sin reciproke. Stormego okazas kaj fulmo bruligas la pulvejon de unu el ili, kiu, splitiĝante, kuntrenas ankaŭ la alian en la abismon. Soldatoj kaj maristoj dronas; nur, post granda penado, saviĝas ĝenova junulo, kiu, sin alpreminta al flosanta peco de masto, povas albordiĝi. Maljuna klerulo, apartigite el la mondo, loĝanta apud maro, iras al la savito kaj kondukas lin al nedelikata altaro de l' Virgulino kaj tuj poste al sia budo el branĉoj kaj roko, kie li rekonsciigas lin. Post tagoj, vidante la mariston enmedite rigardantan tiujn akvojn, li rakontas al li ilian antikvan historion por distri lin pri la okazinta ŝippero.

La tero en tagmezaj helradioj
 aŭskultas pri l' junaĝaj tradicioj,
 kaj sin levas, el dormo, mara frunt';
 de ĉio ĉe rakont' sonas muziko:
 ŝajnas klerul' — Geni' el Atlantiko,
 sed ĉarma l' aŭskultant' — estas Kolumb'.

KANTO UNUA

BRULADO DE LA PIRENEO

Primontro. Vulkano Tejde. Hispanlando naskiĝanta. La voĉo de l' abismo. Alpreĝo al Dio de venĝoj. Ekflamas granda fajro inter Roses (Rozoj) kaj Kanigoo, forbruligante arbarojn kaj bestarojn. La martelego de Rolando. La brulado tegas Pireneon de unu ĝis alia ekstremo. Herkuleso proksimiĝas al ĝi, venkinte la gigantojn de Kraŭ, kaj el la flamoj elsavas Pirene'n. Tiu-ĉi diras al li, ke ŝi estas *ĉefburgono* de la raso de Tubal kaj reĝino de Hispanujo ĵus detronigita de Ĝeriono, kiu por plibone malhelpi al ŝi bonŝancon, vidante ŝin forkurantan al montaro, ekbruligis ĝiajn arbarojn. Pirene mortas kaj Alcides (1) starigas al ŝi maŭzoleon el rokoj ĉe la fino de l' montaro, kiun li plilongigas ĝis la maro. Fluetoj el oro kaj arĝento, kiuj el brulruĝaj krutrokoj malsuprenkuris al ebenaĵoj. La heroo vojiras al Monĝuik', kie li enŝipiĝas, promesante fondi grandan urbon subŝirmatan de tiu monto.

(1) Kromnomo de Herkuleso. (N. de la T.)

KANTO DUA

LA ĜARDENO DE HESPERIDINOJ

Tarragona. Marenfluejo de Ebro. Kolumbrets. Valencia kaj Montgoo. La enranĉo de Rolando. Monto Mulei-Hacen'. La heroo elŝipiĝas, kaj Geriono, por liberiĝi je li, parolas al li pri reĝino Hespero kaj pri la branĉo el oranĝarbo, kiun devas prezenti pretendanto al edziĝo kun ŝi. Priskribo de Atlantido. La ĝardeno de l' oraj oranĝoj. Herkuleso, mortiginte la drakon zorgantan pri l' oranĝujo, atingas la arbosupron. Plorante, la sep fratinoj rememoras, ke Atlas, mortante, deklaris antaŭsigno pri lastfino de l' patrolando la mortigino de la drako.

“Kiam hero' blondhara, altkreska kaj gracia,
per piedfrap' mortigos gardiston de l' ĝarden',
por vi, por ĉiuj, tiam vastiĝos tombo mia...”
Ve! Militist' signita de l' patro venis jen!

Rememoro pri la triumfa irado de Atlantoj (1) el Oriento. Ilia malvenko. Malbonaj aŭguroj de Hesperidinoj.

(1) Atlas-idoj, fratoj de Hesperidinoj. (N. de la T.)

KANTO TRIA

LA ATLANTOJ

Ili kolektiĝas en la templon de Neptuno. Parolado de la unua arestro. Liaj malbonaj aŭguroj. Li demandas, tiujn alvenintajn de malproksimaj landoj, kiajn novaĵojn ili portas al kunveno. Unu, veninta de okcidentaj lokoj, respondas, ke ilin superkovris maro. Alia ĵus alveninta de apud Thule, ĉerpis malbonan antaŭsignon el la borealaj aŭroroj. Eniras subite titano, kiu venis tra suda vojo, kaj tremante ankoraŭ, rakontas, ke li forkuris de fajra glavo, kiu forbruligis liajn kamaradojn. Ĉe tio, ili sentas la templon moviĝanta pro tertremo, samtempe kiam fulmo senkapigas la triumfan skulptaĵon de Neptuno. Ili aŭdas la vokadon de Hesperidinoj kaj, armante sin per arboj kaj la kolonoj de atriumo, atakas Herkuleson. Granda batalo.

El rok' sur roko estas muregoj la gigantaj
de l' templo, kie staras Atlantoj ĉirkaŭ di'
fiere, kiel kverkoj, branĉaron braksvingantaj
direme al krutroko: —Ni fortaj, kiel vi!—

Kun bravaj el venkitoj por edziniĝi, tie
fratinoj restas, hele rigardaj laŭ ĉiel';
subite, pro malbona influo, ĉiuj krie
kun furiozo templon transformas je Babel'.

Stariĝas unu — bildo de l' punfalint-angelo —;
Di' nomon lian viŝis el homa rememor';
per kap' li tuŝas volbon de l' templo, laŭ ŝancelo
de lia voĉ' tremantan pro l' tondra laŭtsonor'.

—Titanoj! Kion eble rakonti ni ne povos
al posteuloj, tero atendas sen kuraĝ';
de malhumilo nia la tur' sin tuj disŝovos;
sub ni skuigiĝas mondo, nurnia apanaĝ'.

La nuboj en fantomaj figuroj tion diras;
ĝin krias ŝtormoj grince per malagorda ĝem';
fajrohararaj steloj ĉielon skribe ŝiras
kaj per fajreroj plektas literojn fulmo mem.

Ĉielo pro malglata nubeg-amas' sulkiĝas,
kaj, kvazaŭ post korvaro, vidiĝas nur po zon';
nin avidante, tero sub nia paŝ' fendigiĝas;
el nia kap' defalas, malfirma, nia kron'.

Jus el burĝon' krevinte, forvelkas ĉiu floro;
birdaroj plendas, transen migrante ĉe aŭtun',
kaj tiun, ilin sekvi nepovan, premas ploro,
ĉar ili flugas kvazaŭ for de maljusta pun'.

Nur, kune kun ateno, kornik' sin montras ĝoje;
laŭ oni diras, supren refluas la river';
infan', vidante lumon de tag' unufoje,
reiris ventron, time kriante pro danĝer'.

Kaj kion, do, ni faru? Kontraŭ fatalo reme
kaj vele puŝi barkon, aŭ iri laŭ la flu'?
defende nin kunligi, aŭ ridi nekredeme?
Titanoj kverkefortaj, ni faros kion, nu?

Antaŭe: kia vento vin pelas? Vi, serenajn
vidanta flui tagojn ĉe l' sunkuŝej' el or',
pro kio, diru, lasis vi l' kampojn floroplenajn,
kiujn velkigi povas nek dia malfavor'?—

—Mia filo, — respondas li, — simila
al kolibrojn lulanta palm' daktila,
ian tagon ribelis kontraŭ mi;
la vivon, spite ĉarm' kaj kresk' ĝentila,
mi forprenis de li.

Lian korpon, en palmfolia reto,
en kavernon mi kaŝis kun sekreto—
ĝin ne vidu ĉiela la *Zemi*—;
sed, ve!, la dolĉa de spirit' kvieto
ne restis plu en mi.

Ve! en miajn okulojn dorm' ne iris
tiun nokton; alia ilin tiris
okulparo en bluo de ĉiel';
"dormu, patro!" filinoj al mi diris,
"dormu, tio — nur stel'."

Ĝi — ne stelo, ho ne!, filinoj belaj:
steloj estas la rozoj enĉielaj
kaj tio, dornoj nur, por mia kor'.
Dormu, vi, ho burĝonoj reve helaj,
krevontaj per amflor'!"

Ve! Dum ĝia rigardo teruranta
min esploris kaj estis demandanta:
"Kial,... filo ne restas tie-ĉi?,"
el la nuboj jen brako defalanta...
la brako de l' *Zemi*.

"Pardonon!"—petis mi, kaj el hamako
forsaltis, kiam sonas ĉe l' barako:
"En kaverno de l' krim' ekbolas mar' ;
ĉion-ĉi pereigos mia brako
por pun' de via far'."

Diris li. El kavern' tuj mar' verŝiĝis;
de manatoj kaj akv' herbej' pleniĝis;
dum forkur', mi rigardis al hejmland' ;
jam kabanoj, arbaroj, subakviĝis;
ankaŭ montsuproj jam.

Kovras belan Bahama'n la sablaro;
en insulojn, Hajti'a la montaro
disrompiĝis—ĝi, kiun amas kor' ;¹
kaj ankoraŭ malsata ronkas maro,
min sekvante; incitas ĝin la flaro
je mia sangodor' !—

Titano, el glacia je-sun-sopira Thule,
parolas:—Signis ankaŭ pri superakv' aŭgur' :
l' aŭroro boreala plej puran oron, brule,
en ruĝaj, blondaj flokoj, enplektis sur lazur'.

Kaj, ŝajne, ĝi dekreĉis kaj foren tiris stelojn,
kiele perlojn, konkojn, kun si fortrenas ond' ;
subite, kvazaŭ florojn en rubojn, sur ĉielojn
ĝi ĵetis vastajn signojn de malfeliĉ' por mond'.

Atlantoj, ve! Kaj ankaŭ, ve, imperio via
falanta, kiel suno en maron, el prosper' ;
kion mistere diras ĉiel' per lingv' magia,
malsana, dum deliroj, tre klare diras ter'.

Mi vidis sangoferi junulojn plej krule;
senkulpon, subpremata de krima nigrekzempl' ;
ke oni, ĉie, montras malvirtojn pormodele;
de dioj ŝtelas ili l' incenson ĉe la templ' !

Mi vidis, ke knabetoj en la diboĉ' ruliĝas;
ke vendas sian filon gepatroj per aŭkci' ;
je peza ŝarĝo, l' avoj, ke nepoj liberiĝas;
ke frato trinkas sangon de frato, vidis mi...—

Ĉesigas lin titano, de la natur' fuŝverko,
kriplul', malbelaspekta, venanta tra l' peron' ;
palega, laŭ mortinto kurinta for el ĉerko,
li tombojn de la templo vibrigas per reson'.

—Apud Afrik' kun miaj herooj mi dormetis;
elfalis jen kolosa Geni' el firmament';
vivantojn ĉiujn vundis la fulmo, kiun jetis
li svinge per flugiloj de la *Simun'a* vent'.²

Jam preta min ŝtonigi, li, sin turnante, diris:
"Falcil' ne malakriĝu pro greno de l' diabl'." ³
Vekiĝis mi; fantomo terura jam foriris,
sed de bravuloj miaj nur restis osta sabl'.—

Rebruas voĉ' ankoraŭ en templ', kaj en lazuro
jam krakas tondroj-ĉaro surdige pro sonor';
respondas ĝin per stranga tremado la naturo
kaj en patrinaj ventroj anĝela sonas plor'.

Subite, pro tertremo kun ŝtormo kuniĝanta,
idol' en kirlon falas el ŝlima akv' kaj sang',
samtempe, kiam kapon derompas fulm', ŝutanta
sur koton, nigritajn, la pecojn en lavang'.

Sin klinas ili honte, vidante ĉe fulmhelo,
ke pasas da fantomoj praavaj longa ĉen',
sur fruntojn la iliajn, markitajn per sigelo
de la infer', kraĉante kun pleja abomen'.

Sed ili plifortigas kunsidon senkolere,
freneczaj, esplorante farinda pri labor':
ĉu dion restarigi perbrake? aŭ prefere,
ĉu ĝin pliprofundigi, ĉar ĝi—jam sen valor'?

Atingas tiam ilin kriego de l' fratinoj;
armiĝas—profanulo!—unu per di-trident';⁴
aliaj,—de kornicoj, kolonoj, per ruinoj;
kontraŭ Alcides ŝajne kondukas ilin vent'.

Kaj venas montaranoj, kverkarojn de jarcentoj
samfortajn kiel ili, ŝirante el radik';
kaj ankaŭ abiarojn vipantajn firmamenton,
de l' tero, kiel brakoj, kun nuboj en implik'.

Aliaj ope ŝprucas el fundoj la kavernaj,
svingante ŝtonarmilojn, ostarojn de mamut';
kaj kun malsat' el noktoj ĉe profunda' eternaj
foriĝas, homan karnon flarinte kun volupt'.

La monstrojn mortiginto, rapide alportanta
la branĉon al Hespero kun flor' el oranĝuj',
pro ĉies brakoj haltas, ligite; kaj brulanta
armil-amaso lian brustegon pikos tuj.

Sed, kvazaŭ tra malfortaj kanejoj, li enfendas
por si tra ili vojon per peza manuzad'
de sia klabo, kiu sur fera dorso pendas,
soifa je sangverŝo, je larmoj kaj brulad'.

Ĉu vidis vi, kiele je rokoj, neĝ', arbaroj
senigas Pireneon la uraganveter',
kaj enkirlante ilin kun pintoj de montaroj
ĝis font' resuprenigas la akvon de river'?

Heroo, tiel, batas l' armeopotencan maron;
li ŝovas sin tra ondoj frapante per ferŝtip',
kaj forte firman faras al puŝ' ilia baron,
kvazaŭ por apudlukto almetas bruston ŝip'.

Li, kie plej efike, kun furioz' batalas,
forpuŝas, rompas, trenas kun si, kiel torent';
la militantoj ĉefoj po kvar post kvar mortfalias;
ceteraj, kiel spikoj de gren', po cent post cent.

Ĝis ter' falĉante, tiel, rikolton Mort' kuŝigas;
post ĉiu frap' svingita, fariĝas vasta tru';
per sang' de siaj idoj sin Atlantid' satigas,
tremante pro, de l' faloj kaj krioj, laŭta bru'.

KANTO KVARA
GIBALTAR'O FENDITA

La heroo, puŝata de superhoma forto, lasas malantaŭe siajn malamikojn. Li plantas apud Gades la branĉon de oranĝarbo. Li supreniras al Kalpe, monto, kapo de Atlantido, kiu ligis Eŭropon kun Afriko. Fendante ĝin per klabo-batoj, li vidas, ke lian brakon movas la Ekstermulo. La Anĝelo, kolera, vidigas al li la batalon de la elementoj kontraŭ la granda viktimo. Ĝia krio de venĝo. Supre, en profundo de l' ĉielo, la Altegulo kondamnas Atlantidon malaperi el la mondo kaj tiun dispeciĝi en kontinentojn. Herkuleso eniras kune kun la maro en la kondamnitan landon.

KANTO KVINA
LA AKVOFALEGO

Alpreĝo al Genio de ekstermo. Ĝemoj de l' tero duone akvekovrita. Falo de l' akvoj, kiuj tra la fendego de Kalpe en ĝin verŝiĝas. Enkiriĝo de l' ondoj kun la restaĵoj de Atlantido. Herkuleso tra marĉoj kaj kampoj serĉas Hesperon, kun brulanta arbo por torĉo. Ŝi vidas lin venantan kaj adiaŭas siajn filinojn.

KANTO SESA

HESPERO

La Atlantoj supreniras sur monto starigi grandan konstruaĵon
taŭgontan kiel rifuĝejo dum la nova diluvo. Hespero iras renkonte
al la heroo. Si rakontas al li sian amadon kaj edziniĝon je Atlas,
siajn ĉagrenojn kaj la malfeliĉon de sia vivo.

—Ni iru, ne plendu; mi ankaŭ patrujon
forlasis,—respondas Alcides al ŝi,—
ne aŭdis vi laŭdi la belan Grekujon?
mi ĝin, se edzece
al mi vi kuniĝos, forlasos pro vi.

Ĉielo min gvidas laŭ ŝip', ke mi iru
vin savi el drono, vin porti al bord'
feliĉa, sur kiu vi plu ne sopiru
je viaj estintaj
arbaroj el cedroj, falĉitaj de l' Mort'.

Atendas vin virgaj la kampoj iberaj;
ter' tie pli verda, pli blua la spac' ;
refloros en ili la rozoj Hesperaj
kaj semos mi tie,
krom art' de l' milito, la ludojn de l' pac'.

Teruras vin klabo,—de monstroj ekstermo?
Simile, ne estas kor' mia el fer' ;
mi aŭdis, ke vokas vi min, dum malfermo
de Kalpe la monto;
alkuris mi savi tuj vin el danĝer'.

Simile falantan de monto riveron,
mi arbojn elŝiras de forta radik' ;
mi rompas, frakasan ilian fieron;
kaj junkojn, floretojn
malfortajn dorlotas mi kiel amik'.

Do, kia mi estas? Kentaŭroj min konas;
min vidi evitas leon' pro timem' ;
mi turojn fierajn terure imponas;
kaj eĉ, se kolere
mi supron surpaŝas, krutmont' tremas mem.

Mi estas vent', kiu arbarojn tremigas;
mi—fulm' fluiginta akvegion sur ter' ;
mi Hidrojn sufokis, mi aglojn haltigas;
por tiuj—Alcides,
por vi— laŭr' fleksiĝa, ho milda heder'.

Sed akvo jam kuŝas sur val' kaj ebena;
ni iru, ĝi staros tuj super montar' ;
forlasu ni landon, pro dia malbeno
rompite ĵetatan,
Hespero belega, en fundon de l' mar'.

Herkuleso prenas ŝin kiel edzinon kaj tra l' ondoj revenas al
Gades surdorse portante ŝin senespere adiaŭantan la ŝafidojn kaj
birdarojn, siajn estintajn ĝuojn. La Titanoj rapidas starigi sian
konstruaĵon. Kiam ĝi estas preskaŭ preta, ili rimarkas la forkuron
de sia patrino kun la greko; kaj ĵetante al li la pecojn de la
ciklopa verko, persekutas lin. Li forkuras per grandaj paŝoj, ĉe
la ŝtonhajlado kaj haoso de l' akvoj. Teruraj vizioj de Hespero
en la mallumo. Fulmo bruligas la grandan urbon de l' Atlantoj,
kaj ili, gvidite de ĝia lumo, baldaŭ atingas Herkuleson.

KANTO SEPA

ĤORO DE GREKAJ INSULOJ

Epizodo: Gibraltar'a markolo larĝiĝas, kaj la Meza Maro pli rapide fluigas tra ĝi siajn akvojn, aperigante novajn insulojn kaj landojn. Vekiĝo de Grekujo. Delos. Insuloj Cikladaj. Ekinadaj.

SICILIA

Vigle Ciklopoj dum la nokt' laboris;
de martelegoj sur amboj bruoj
en forĝejoj de Etna rulsonoris;
tra ĝia de infero fajra truo
de fumo kaj de flamo ŝprucis fluo;
kaj sur montoj kaj valoj,
el internaj' de l' tero
en agoni', verŝiĝis fajrofaloj.
Rebruis kun kolero
tondro, kriad', haos' ĉe okcidento,
kvazaŭ tie pereus kontinento
disŝiriĝe kun urboj, tronoj, gloro.
Ankoraŭ tondras, fulmas, malproksime;
mi fulmtondron aŭskultas laŭkutime
jam de longe; sed min al sia koro
jam Italuj' ne ligas,
ĉar nur por esti greka, mi por ĉiam
de ĝi, dormanta ĉe mallum', forigas
nin ligintan amike brakon mian.

Lesbos. La valo Tempe. Renaskiĝo. Apoteozo de Herkuleso.

KANTO OKA

LA ENFUNDIGO

La akvo superstaras la altaĵojn, kaj ligiĝas por ĉiam la ondoj de l' Norda Maro kun tiuj de l' Suda, — de l' Okcidenta kun tiuj de l' Meza Maro. Herkuleso alproksimiĝas al muro de Gades. Li lasas, ke el liaj ŝultroj prenu Hesperon Geriono, kiu faligas sur lin grandan rokon. Li reeliĝas el akvo kaj mortigas la perfidinton. Naskiĝas la arbo *drago* kaj ploras sangon apud la tombo. Hespero de sur pinto de rokego malgajege adiaŭas la pereantan landon, kaj falas en fantazian svenon. Alcides, ekpaŝante sur la promontoro, mortigas giganton Anteo, kaj kun lia kadavro kvazaŭ armilo, persekutas kaj malaperigas la rason de Harpioj, Gorgonoj kaj Stinfalidoj.

KANTO NAUA

LA TURO DE L' TITANOJ

Duone venkitaj de l' marfuriozo, la Atlantoj grimpas sur monton, ankoraŭ ne malfirmigitan de l' ondoj. Malesperante alveni al Gades, ili provas, forkuronte el diluvo, algrimpi ĉielen. Kiam preskaŭ ĝin atingas la turo el rokoj kaj pecoj el monto, ĝi disfalas, kaj ili kun abomena blasfemado rejetas kontraŭ Dio la erojn de l' disfalinta konstruaĵo. La Ekstermulo instigas kontraŭ ilin la elementojn, kaj per sia tranĉanta glavo, elvastigas la abismon de Atlantiko en la tero. Tie enfundiĝas la Titanoj, kaj el ilia tombo ŝprucas la vulkano en Tenerife. La Anĝelo eningigas sian fajran glavon kaj refugas en nubojn, adiaŭante la ceterajn kontinentojn ĝis la tago de l' fina juĝado. Tie supre aŭdiĝas kanto de gloro al la Altegulo. La Anĝelo de Atlantido, reirante ĉielon, donas al Anĝelo de Hispanujo, kiu de tie malsuprenvenas, la kronon de la estinta reĝino de l' mondoj. La voĉo de Tejde. La tertremoj de l' atlantikaj insuloj.

KANTO DEKA

LA NOVA HESPERLANDO

Deflankiĝo: la pia klerulo turnas la okulojn al sia patrujo. Revo de Hespero. Ŝi rekonas la branĉon de oranĝarbo plantitan de Herkuleso. Ŝi nostalgias je l' enfundiĝinta lando. La ĝardeno de l' oraj oranĝoj reflores en Hispanujo. La sep Hesperidinoj transformitaj en stelojn. La kanto de l' cigno. Stelo Hesper. La idaro de Herkuleso kaj de Hespero. La detronigita reĝino. Galicia kaj la Herkules-turo en Corunya (Korunja). Elcano. Lusitania. Sagunto. Balado de Majorka. Fondo de Barcelona. La voĉo de Taber. Hispalis. La nekonata Dio kaj lia templo en Gades. Herkuleso starigas kiel limojn de l' tero la kolonojn de *Ne preter*.

EPILOGO

KOLUMBO

Dum la parolo de la solulo, la ĝenovano sentas en sia fantazio, ke naskiĝas nova mondo. La bona maljunulo kuraĝigas lin per pravaj rezonoj. Proponoj de Kolumbo al Ĝenova, Venezia kaj Portugalujo. La sonĝo de Isabelo. La reĝino sin turnas al reĝo Fernando kaj rakontas al li sian sonĝon, antaŭcertigan pri sukceso. Ŝi donacas al Kolumbo siajn juvelojn, por ke li aĉetu ŝipojn.

Samtempe sun' rigardas en Alhambbron'
kaj per ama radi' plenigas ĉambron
kovritan per topazoj kaj per or';
kaj disbrilante kun magia helo,
ilin tri, elektitojn de l' ĉielo,
ĉirkaŭas aŭreolo de la glori'.

Kolumbo krudajn ŝipojn fine trovas
kaj dum li l' ombran maron venki provas,
nomas lin *frenozulo* la homar',
lin! — Geni' ĝin gvidanta per flugado
al lando promesita dum revado,
kiel nova Mose' tra l' Ruĝa mar'!

La maljuna klerulo, ĉe l' foriro,
sentas koron ekstremita kiel liro,
vidas, ke l' Hispanuja gard-angeli,
kies oraj flugiloj malfaldiĝis,
sur Granada, denove etendiĝis,
kovronte l' vastan teron laŭ mantel'.

Li vidas, ke hispana la prospero
enkreskos kun la Kruc' ĉe l' nova tero;
ĝiaombre refloros ĉiu land';
enhomigos en ĝi klerec' ĉiela;
kaj li diras al tiu tion cela:
—Flugu, Kolumb'... mi povas morti jam!—

(1) Mirinda araba palaco en ĵus rekonkerita urbo Granada, kie gereĝoj Fernando kaj Isabelo akceptis en aŭdienco Kolumbon. (N. de la T.)

NOTOJ

1. *En insulojn Hajti' a la montaro disrompiĝis—ĝi, kiun amas kor'...* Laŭ la *Kroniko de Indioj* el Oviedo, la praloĝantoj de Santo Domingo rememoris diluvon, kiun ili rakontis laŭ jena infana maniero:

Unu el plej potencaj enlandaj *kacikoj* (ĉefoj), mortigis filon sian pro l' krimo esti konspirinta kontraŭ li. Laŭ enlanda kutimo, li senkarnigis poste kelkajn el liaj ostoj kaj lasis ilin en malplenigitan kukurbon por konservi daŭran primemoraĵon. Iam li malŝtopis ĝin, rigardadonte la restaĵojn de sia filo, kaj ekmiris, vidante ĝin plenan de akvo kaj de fiŝoj, grandaj kaj malgrandaj kaj ĉiuspecaj. Li rapide fermis la ujon, kaj metinte ĝin sur sia kabano, li komencis diri kaj paradi, ke li posedas maron kaj fiŝaron ĉeĥejme. Tiom multe li prilauĉis kukurbon, ke iun tagon, profitante foreston de l' kaciko, la knaboj atingis ĝin, sed, malfeliĉe, glitinte el liaj malfortaj manoj, ĝi falis teren kaj fendigis, kaj en granda torento elfluis el ĝi saltemaj delfenoj, ŝarkoj kaj eĉ plej kolosaj balenoj. La terura rivero kreskis kaj, elbordigante, formis la oceanon, superlasante nur la suprojn de l' montoj, kiuj estas tiuj insuloj.

*Zemi'*oj estis diuloj mezaj inter Dio kaj homo; ili bruis inter folioj de l' arboj, ŝove rulis la ondojn de riveroj, ŝtormo estis movata de ilia elspiro, kaj fulmo estis ĵetata de iliaj manoj.

Sekvantaj linioj estas elĉerpitaj el verko de Roisel titolita: *Les Atlants*.

“En la momento de la konkero de Meksikujo, la insulanoj de Antilioj rakontis al la hispanoj, ke tiuj insuloj ĉiuj estis formintaj unu solan kontinenton, sed ke ili estis subite disigitaj. Laŭ enlokaj tradicioj, Jukatano estis ligita al Kubo; kaj diris la Kariboj, ke la rokoj kaj rifoj en tiu maro estis kreitaj per granda tumulto de l' akvoj. La loĝantoj de l' Ora Kastilujo konservis saman rememoron, kaj la popoloj de Orinoko nomas tiun katastrofon *Katemonoa*, tio estas, subakviĝo en la grandan lagon.”

Laŭ Diego Landa, la kiksoj, aŭ loĝantoj de Centra Ameriko, rakontas tiel tiun katastrofon. La akvoj plialtigis sian nivelon kaj okazis granda enondigo, kiu kreskis ĝis super la kapo de la enlandanoj. Ĉiuj estis kovritaj de akvo, kaj densa nebulo malsupreniris el ĉielo. Tero malfirmiĝe falis, kaj malluma pluvo komenciĝis: pluvo dum tago, pluvo dum nokto; kaj preterpasis grandaj fajraĵoj super iliaj kapoj. Tiam oni vidis la homojn kurantajn plene de teruro kaj malespero. Ili volis supreniĝi sur siaj domoj; kaj la domoj, disfalante, renversis ilin surteren; ili volis grimpi kavernojn; kaj la kavernoj dispreniĝis antaŭ ili. La praavoj de la kik-

soj certe estis atestantoj de tiu fakto, ĉar ili ne estus sciintaj imagi tiel fidelan rakonton pri la fenomenoj, kiuj eble kunokazis kun tiu terura tertremo.

Jen, laŭ M. de Froberville, alia antikva tradicio konservita de la afrika popolo Amakona, kiu evidente rilatas tiun kataklismon, kies malgaja rememoro tiel profunde engravuriĝis en ĉiuj apudbordaj popoloj.

Antaŭ multe da jaroj, la fundo de l' maro, nuntempe apartiganta la landon de l' negroj el tiu de blankuloj, estis lando mirinde fruktodona. Ĝi estis nomata Kasipi. Venis jaro tiel abunda je greno, ke, ĝissupre pleniginte ĉiujn grenujojn, la homoj semis la grenon sur la vojojn anstataŭ ĝin donaci al popoloj najbaraj, kies rikolto estis mizera. Moloko, la bona Dio, koleris pro tiu krimea indiferenteco. — Ve al vi! — li diris al Kasipianoj, kaj tiu malbeno post nemulte efektiviĝis. La demonoj proprigis al si la landon; la koro de la enlandanoj pli malmoliĝis ankoraŭ, kaj ili kunigis sin kun la diablo; kaj baldaŭ la maro invadis ilian landon.

“Se oni ekzamenas Antiliojn, diras Buffon, komencante ĉe Trinidad, la plej suda, oni ne povas dubi, ke tiel same tiu insulo, kiel tiuj Tábago, Granada, Granadinas, Sankta Vincento, Martiniko, Maria Galante, Deseada, Antigua kaj Barbados, kun ĉiuj kunestantaj, formas ĉenon de montoj, kies direkto ŝanĝiĝas de oriento okcidenten, de Barbados ĝis Kubo. Ĉiuj estas tiel proksimaj, unuj al aliaj, ke ili povas esti konsiderataj kiel terzono kontinua kaj kiel partoj plej altaj el subakvigita kontinento.”

Milne-Edwards rimarkis, ke la faŭno de Azores, speciale la moluskoj, estas kontinenta, kaj plejparte, alpa; kio pruvas, ke ili estis ligitaj al Eŭropo.

2. Fortega vento nordafrika. France: *simoun*. (N. de la T.)
3. *Greno de l' diabl'...* “Blat del diable.” Herbo pli ofte nomata *blat bord*, bastarda greno. = *Echinaria capitata*, Desf.
4. Emblemo de Neptuno, la dio de akvoj. (N. de la T.)

SANGA NOKTO

(7 junio 1640)

Dies irae, dies illa

Patroland' Katalunujo,
nokten iĝis taga bril',
se nuntempo estas nigra
estontec' ankoraŭ pli.
Arbojn sur vojoj kaj grenon
sur eben' aŭ montdekliv'
tagon post tago surverŝas
sang' de iu via fil':
ĉar mortigas ilin ĉie
soldatar' de reĝ' Filip',
kvazaŭ el ras' via esti,
estus la plej nigra krim'.
El filoj, kiujn vi nutris,
nur unu ĝuas je ind',
nur li povanta vin helpi,
nur li via torturist'!
Grafo de Sankta Koloma,
malben' por via naskint'!
Ve, ke el fulmoj ĉielaj
ne vundis vin la furi'!
Tago, kiam vi naskiĝis,
estis tag' de malfeliĉ';
estus por patruj' pli bona
la naskiĝo de skorpi'!
Certe vi rodis la mamon
de la via nutristin',
ĉar nur lakton al vi donis
anstataŭ venenon ŝi;
ĉar vin vidinte sur tero
ŝi vin ne pelis el ĝi,
vin tra la voj' de l' anĝeloj
sendante al paradiz'.
Tiel ne devus ĝin fari
land', kiu grandigis vin,
ne kredante, ke por pago
vi ĝin subjugas per lig'.
Vi vidis fortiri filojn
el la brakoj de patrin',
forpuŝatajn el la mondo
pro la plezur' de mortig',
dum nestfaris fremdaj trupoj
en brakoj de la naci',

serajloj, tombejoj l'urbojn
farante pro la milit'.
Ja de l' patrujo la plendojn,
ja la ĝemojn aŭdis vi,
ja vi vidis manligitan
ĝin, kvazaŭ voja rabist';
sed bastarde ne atentis
vi pri patrina sopir',
kaj permesis malbonkore
ke streĉiĝu la ligil',
kaj ke iĝu ĝia krono
junko pika sur tempi',
kaj la ora sceptro, kano
per kiu vi frapas ĝin.
Se ĝia kruco tro pezas,
almetas aliajn vi,
kaj nur galon kaj vinagron
donas al ĝi por soif'.
Se ĝi montras siajn vundojn,
—turnas vizaĝon kun rid',
se vi ilin ne disŝiras
kvazaŭ per ungoj de tigr'.
Ĉenojn vi metis al Serra,
al Vergos', al Tamarit',
kaj nur pro tim' ne kuraĝis
peti morton de Klaris'.
Sed haltu! De malbonfaroj
pleniĝis jam la sufiĉ';
vole de l' martir'-patrujo
alvenas nokto de l' fin'.
Punon ĝi nun jam ricevas,
je ĝi, do, estas maltim':
almenaŭ se oni punos,
tio estos sen insid'!
Jam aŭdiĝas sur ĉefstrato
kiel sovaĝa longkri'
trumpet', pro kiu en manoj
de popol' brilas falĉil'.
Ili ĝin svingas malame,
kaj ĉe ĝia kruda tint'
post ĉiu frap' kelkaj kapoj
ruliĝas sur la pavim'.

Ve, la sango tiel arda
 ebrriigas kiel vin':
 kiu trinkis unu guton,
 nek river' satigos lin.
 Kaj respondas la najbaroj
 la alvokon al mortig'
 per, ĉe fundo de l' butikoj,
 denta kaj muela grinc'.
 For survoje! For survoje!
 krias dum falĉilo-sving',
 klopodante ĝin akrigi
 sur kolo de malamik'.
 For survoje! For survoje!
 aŭdiĝas en alto dir',
 ĉar *nank, nank*, laŭte sonoras
 en preĝejturo de l' Pin'.
 Pordoj defalas sur teron,
 sangas seĝaro kaj lit',
 kiu dormas, ne vekigaas:
 se maldormas, ve al li!
 Petoj kaj larmoj ne taŭgas,
 ne taŭgas ĝemo, nek kri',
 ĉar iras pli furiozaj,
 kien aŭdiĝas sopir'.
 Pravas tie nur la glavo,
 leĝon faras la dezir',
 kaj oni ja tiel agas
 pro, de l' mortantoj, ekscit'.
 Tie l' viroj de Sankt-Cilja,
 de Rok-Ginart tie-ĉi:
 fajrerumas per okuloj
 ili pli, ol torĉa bril'.
 Deputitoj iras meze
 de la popolo por gvid',
 kaj antaŭ ili sur stango
 la kapo de malamik'.
 Tro forta estas revenĝo,
 barcelon-popol' falĉist',
 tro forta estas estinta,
 ĉar da gren' restas nek spik'.
 Restas la malbona Grafo:
 pretiĝu li al destin',
 ĉar por trinki sangon lian
 je vin' ne estos soif'.
 Krias antaŭ lia domo
 —Enen!—kun arda indign'

aroj da homoj sovaĝaj
 en infera kunniksiĝ'.
 Je pecoj falas sur plankon
 pord', kiun fermis riglil';
 oni ŝtuparon surgrimpas
 kiel malbona spirit'.
 En ĉiu angul' lin serĉas
 venenoplana skorpi',
 kiu rompuz eĉ la feron,
 se per fer' li kovrus sin.
 Nek ŝtonon, nek meblon lasas
 timante pro artifik';
 kion lertec' ne atingas,
 frakasas peza hakil'.
 Sed se blasfemis enire,
 blasfemas pli dum elir',
 ĉar el la kaĝ' frakasita
 estas fluginta la bird'.
 Kaj la amaso, brulanta
 pro l' malsukcesa sciig',
 reiras al mur', tra kie
 li forkuris laŭ la dir'.
 Je centopoj alŝutiĝas
 tien, po cent kaj po mil
 dezirante lian bruston
 vundi per sia armil'.
 Unuj ĉe l' pordo restadas,
 por kontrolo de l' elir';
 kamparon iras aliaj
 malluman kiel pupil'.
 Kiuj iras tra kamparo
 nur divene serĉas lin;
 sed kun obstin' rigardinte
 vidas lin en malproksim'.
 Kaj kvin apud li troviĝas
 hazarde dum la ating';
 kvin tranĉilojn ili portas,
 lin trapikas ĉiuj kvin.
 De Sankt-Bertran' en ĝardenoj,
 malsupre de Monĝuik',
 sur amas' de ŝtonoj staras
 kruco de pinarba lign'.
 Tien iru, montarano,
 iru, Barcelona-fil',
 preĝi unu Patro-nian
 por l' estinta torturist'!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LA BUKEDO DE SANKTA JOHANO

(Tradicio, el la poemo "Canigó")

La tag' de Sankta Johan'
 estas festotago ĝoja;
 knabinoj el Pirene'
 metas bukedon sur pordon,
 rememore pri knabin'
 okulblua, brovoblonda,
 havanta stelon sur frunt'
 kaj sur ĉiu vango rozon.
 Junul' enamigis ŝin,
 sed ve! li ne estis bona,
 similis al raba bird',
 kiu flirtadas kolombon.
 En tag' de Sankta Johan'
 la knabin' iris al bordo
 de bela, klara river',
 por kolekti kelkajn florojn.
 Florojn de hela kolor'
 abunde ĉie ŝi trovas,
 floretojn de timian'
 kaj rosmaren' bonodorajn,
 kaj per krucforma buked',
 la hejman pordon ŝi kronas.

Kiam alvenas l' amant'
 li haltas antaŭ la pordo;
 —Kial—ŝi diras al li—
 vi restas ekster la domo?
 —Ĉar baras l' eniron vi
 per ĉi-tiuj viaj floroj.
 —Ĉu vin timigas buked' ?
 —Timigas min ĝia formo.
 —Estas ĝia formo kruc' ;
 vi ne estas io bona.
 —Nu, la malbona spirit',
 kiu l' animojn forportas.
 Se ne estus la buked',
 la vian baldaŭ mi trovus
 kaj vi kuŝadus kun mi
 en mia fajra kuŝloko.—

Ĉar okazis tio-ĉi
 apud rivero Garona,
 dum tag' de Sankta Johan',
 tra l' tuta montregiono,
 knabinoj el Pirene'
 bukedon metas ĉe l' pordo.

ANGEL GUIMERÀ

(1847-1924)

(Nekrologa artikolo)

Angel Guimerà estas mortinta la 18an de Julio 1924, kaj okaze de lia morto oni unuanime alnomis lin "la poeto de Katalunujo plej populara kaj universala". Sed pli ol kiel simpla poeto, li estis admire konsiderata precipe kiel teatra aŭtoro: liaj dramoj kaj liaj versaj tragedioj estas liaj plej famaj verkoj.

Guimerà, en sia longa vivo, ĉar li mortis 77-jara, kreis longan serion da majstraj teatraĵoj, el kiuj multaj transflugis la naciajn limojn.

Li estas la plej tipa reprezentanto de la romantika skolo en la kataluna literaturo: ĉi-tio kaj lia nesuperebla arto prezenti scenojn simplajn kaj kortuŝajn, naskis la fortan admiron kaj simpatian kiujn li havis ĉe la granda popolo.

Lia plej karakteriza dramo estas "Terra baixa" (En la malsupra lando). Ĝia argumento estas tre forta kaj ĝia protagonisto, la paŝtisto Manelic (Manelik'), havas scenojn de emocia sovaĝa beleco.

La paŝtisto *Manelic* venas "en la malsupran landon" edziĝi kun *Marta*, laŭ antaŭarango de la bienmastro *Sebastià* kiu sekrete havis seksajn rilatojn kun ŝi. *Sebastià*, senskrupula malvirtulo, aranĝas ke *Manelic* venu esti lia muelisto kaj edziĝu je *Marta*, ĉar li tiel esperas povi daŭrigi pli *sendangere* sian rilaton kun ŝi. *Marta*, kompatinda virino, estas trompita per la informo ke *Manelic* konsentas la edziĝon, eĉ sciante ĉion, kaj pro tio ŝi sentas abomenon al la paŝtisto, kun kiu ŝi edzinigas nur pro minaco de *la mastro*. Post la simpla edziĝofesto, *Manelic* krude rakontadas, inter aliaj aferoj, kiamaniere li mortigis, korpon ĉe korpo, la *unuan* lupon. *Marta* ekadmiras lin kaj ekdivenas ke oni lin trompis.

Manelic observas strangan sintenon ĉe sia edzino kaj aŭdas mokojn kaj aludojn pri li kaj la ĉiaman ekkrion: Kompatinda *Manelic*! Kompatinda *Manelic*! Fine li postulas klarigon kaj *Marta* rakontas ĉion. La ĥona *Manelic* decidis reiri en la montaron kun *Marta*. Ŝi diras ke *la mastro* ne permesos ŝian foriron. Li respondas ke ŝi estas *lia edzino* kaj la mastro ne plu rajtas pri ŝi. La sceno, en kiu *Marta* klarigas la tragikan situacion, estas beleaga. *Manelic* terure ekkoleras, li insultas ŝin, minacas la mastron *Sebastià*, malbenas la *malsupran landon* kaj sopiras je la pureco kaj boneco de siaj montaroj. "Eble tie estas boneco, ĉar tie ne estas homoj." Fine, li moliĝas, li kompatas sian edzinon, kun

kiu li baraktis ruliĝante teren en sovaĝa ĉirkaŭpreno, li levas ŝin kaj juras ke ili de nun por ĉiam sin amos reciproke.

En la tria akto prezentiĝas *Sebastià*, kiu volas malpermesi la foriron de *Marta*. *Manelic* diras ke li ne plu estas lia mastro, sed lia rabisto. La mastro minacas lin. *Manelic* malŝatas tian minacon: li ne timas homon, ĉar li scias mortigi lupojn. En la lasta sceno *Sebastià* kaj *Manelic* terure luktas kaj la paŝtisto, forlasinte ĉian armilon, per siaj fortaj manoj, mortigas sian kontraŭulon. Li prenas la edzinon *Marta* en siajn brakojn kaj forkuras al la montaro kriante: *La lupon, mi mortigis la lupon!* (1).

La dramo "Terra baixa" estas ludita centojn da fojoj. La granda kataluna aktoro *Enric Borràs* genie prezentis la figuron de *Manelic*. Ĉe la "Parko de Montjuic", en Barcelono, troviĝas monumento kun bronza statuo de la fama paŝtisto, kiu havas propran vivon ekster la scenejoj kaj restos unu el la kreaĵoj de la eminenta dramisto Guimerà. Tiu grava kataluna verko havas tradukon en lingvoj hispana, franca, portugala, itala, angla, germana, sveda, rusa, ĉeĥa, serba kaj aliaj. Esperanta traduko estas en preparo. Ĝi estis unuafoje ludata la jaron 1896 kaj donis temon al du operoj: unu franca, kun la titolo "La Catalane", adaptigo de *Tiercelin* kaj *P. Février*, muziko de *Ferran Le Borne*; alia germana, "Tieffand", muziko de *Eugeni d'Albert* kaj teksto de la fama dramisto hungara *Rodolf Leothart*.

Aliajn gravajn dramojn verkis Guimerà, inter ili: "Maria Rosa", "La festo de l' tritiko", "Pastro Janot", "L'animo estas mia".

El la tragedioj, verkitaĵoj en deknusilabaj *liberaj* versoj, la plej gravaj estas "Maro kaj ĉielo", "Gala Placidia", "Judith de Welp", "Indibil kaj Mandoni", "Reĝo kaj monaĥo", "Jesús de Nazareth". Same kiel ni faris pri la dramoj ni skizos la ĉefan el la tragedioj: "Mar i cel".

Ĉi-tiu tragedio estas titolita "Maro kaj ĉielo", ĉar la agado dum ĉiuj tri aktoj okazas en ŝipo de Alĝeriaj korsaroj. Epoko: jaro 1630. La korsaro *Said*, maŭro el tiuj forigitaj de Hispanujo, kaptis kristanan ŝipon veturantan de la Balearaj Insuloj al Barcelono, sur kiu troviĝas maljuna grava militisto, *Carles*, kun sia filino, *Blanca*, kiu sin direktas al Barcelono por tie eniri en monaĥinejon. Ankaŭ estas kaptitaj la kristana ŝipestro, *Ferran*, kuzo de *Blanca*, kaj multaj ŝipanoj. *Said* faras demandojn al *Ferran*, kiu ne konsentas respondi ilin spite ĉiaj minacoj. Tiam *Carles* insultas *Said*'on; tiu-ĉi respondas al la insulto malŝatante siavice la kristanojn, kiujn li kulpigas pri ĉiuj siaj doloroj. La mo-

(1). Tiu-ĉi skizo pri la fama dramo ne estas komplete ĝusta. Mi verkis ĝin "parkere", nur memore revidante la scenojn. Noto de la Kompilinto.

nahino Blanca estas tre kortuŝata aŭdante la tragikan vivon de Said, kiu rakontas pri sia naskiĝo de kristana patrino kaj maŭra patro, pri la kruela morto al ili ambaŭ kaŭzita de la kristanoj, pri la devigo al ĉiuj maŭroj forlasi Hispanujon. Li malŝatas tiun genton, ĉe kiu estas strange kunigitaj la plej kontraŭaj simboloj:

...malamo kaj pardon'; ŝafid' kun tigro:
la ponard' kaj la kruc' en sama peco.

Blanca ploras kiam Said finas sian rakonton. Sia patro riproĉas ŝin pri tio, kaj ŝi, por kaŝi sian moligon kaj kompaton kaj eĉ ian konfuzan senton pri la korsaro, intencas mortigi lin. Tiu-ĉi evitas la ponardbaton kaj sen ia kolero demandas, kial ŝi tiel *malamas* lin. Poste li prezentas sian bruston por ke ŝi lin vundu... sed ŝi lasas fali la ponardon kaj svenas.

La kompto de Blanca pri Said ŝanĝiĝas en admiron kaj fine en amon, kvankam ŝi mem ne klare konscias pri tio. Siaflanke Said sin sentas strange influata de tiu virino. Post kelkaj tagoj da malliberiĝo en la ŝipo kaj baldaŭ alvenonte en Alĝerion, Blanca petas sian kuzon Ferran ke li mortigu ŝin, se li ŝin vidas en danĝero. Ferran promesas plenumi tion kaj Blanca danke kisas lian manon. Vidante tion Said ne povas rezisti sian ĵaluzon kaj koleron, kaj vokas siajn ŝipanojn por ke ili satigu sian furiozon ĉe la personoj de Carles kaj Ferran. Sed, subite, kiam Said aŭdas ke Blanca ne amas sian kuzon kaj ke ŝia kiso estis nur danko por la ricevita promeso, li aliĝas sian decidon kaj ordonas al la ŝipanaro respekti la vivon de la kristanoj. Li faras ne nur tion: li, ŝajnigante ke estas proksima alia atakebla ŝipo, ankaŭ ordonas ke la ŝipo reiru en la maron, por eviti danĝerojn al Blanca ĉe la alveno en Alĝerion, kie li ne plu rajtus sur la kaptitino. Blanca sentas pro tio koran dankemon al li. Iom poste, la kristanaj kaptitoj, kun la helpo de unu el la korsaroj (malkonfesinta kristano, nun pentanta sian perfidon), sukcesas liberiĝi, kontraŭbatalas la korsarojn kaj fine ekregas sur la ŝipo. Tiam la patro de Blanca volas mortigi Saidon, sed ŝi kovras la korsaron, minacante mortigi sin per ponardo se oni atencas kontraŭ la vivo de Said.

La patro de Blanca konstatas kun teruro ŝian amon al Said, kaj malbenas ŝin. Said ĵetis siajn armilojn, sed ŝi konservas la ponardon en la mano. La korsaro, tre kortuŝite pro la sinteno de Blanca, petas de ŝi ke ŝi forĵetu la armilon kaj klopodas malŝatigi sin de ŝi, memorigante ke li dronigis ilian ŝipon kaj kaŭzis ĉiujn iliajn ĉagrenojn. Ferran admiras la heroan konduton de la korsaro, kaj petas kune kun Blanca ke oni pardonu lin. Sed la furioza patro ne cedas. Ferran pretigas boaton por ke Said saviĝu. Tiu-ĉi promesas iri en Hispanujon serĉi Blanca. Kiam Said pretiĝas forlasi la ŝipon, Carles pafas al li, sed trafas sian flinon, kiu sin metis inter ilin. Said prenas la mortantan korpon de Blanca, kaj ili ambaŭ, en ama ĉirkaŭpremo, sin ĵetas en la akvon. La

lastaj vortoj de li kaj ŝi estas: Al la maro! Al la ĉielo! — La tuta agado estas brodita per belegaj literaturaj pecoj.

Krom la multnombraj dramoj kaj tragedioj, Guimerà verkis famajn poemojn. Du el la plej rimarkindaj estas "Migrado" kaj "La mila jaro", tiu-ĉi lasta majstre priskribanta la teruron kiu regis en tiu tempo pri finiĝo de la mondo. Ili ambaŭ estas tradukitaj en esperanton.

La granda verkisto Guimerà estis honorata, ĉe sia 60-jara aĝo, per grava popola demonstracio, kiu tutplenigis la vastan Plaçon de Katalunujo en Barcelonò. La tagon de lia enterigo, estis fermataj ĉiuj butikoj en la kataluna ĉefurbo. Akompanis lian kadavron pli ol 50.000 personoj. Guimerà ne nur estis granda poeto, sed ankaŭ patriarko de la renaskiĝinta kataluna literaturo, simbolo de la vivon deziranta moderna Katalunujo.

Bibliografio: Tragedioj: Gala Placidia; Judith de Welp; El fill del rei; Mar i cel; Rei i monjo; La boja; L'ànima morta; Jesús de Nazareth; El camí del sol; Andrònica. Dramoj: En Pòlvora; Maria Rosa; Les monges de Sant Ayman; La festa del blat; Terra baixa; Mossèn Janot; La filla del mar; Arran de terra; La pecadora; Aigua que corre; Sol solet; La Miralta; L'Eloi; L'aranya; La reina jove; La reina vella. Komedioj kaj muzikaj teatraĵoj: La farsa; La Santa Espina; Sainet trist; Titaina; La Sala d'Espera; La Baldirona. Monologoj: Mestre Oleguer; Mort d'En Jaume d'Urgell; En Pep Botella. Paroladoj: Cants a la Pàtria. Poemoj: Poesies. — La plena verkaro estas eldonita de "La Renaixença", Barcelona.

MARO KAJ ĈIELO

Akto I

Sceno XV

Said

Hassen, foriĝu!

Mi volas vidi lin fanfaronantan...
ia koko sen spronoj kaj sen kresto!
Ĉiam vant' pri honor' kaj sur la lipoj
ĉiam nomo de Di', ne respektata!
Senkompata krimul'!... Filoj, lin vidu:
li estas ja el tiuj, kiuj iam,
hipokrite homamon predikante,
nian sangon elsuĉis; nek en staloj

ili lasis al ni lokon ĉe l' bestoj;
 kaj malbenante nin, tre senkompate,
 nin ĵetis tra la mondon, rifuzante
 al ni, por paca mort', pecon da tero!
 Kaj, je ilia Di'!, estis ja nia
 la mond' al ni rabita. Kaj, ni fidu!
 pri gent', ĉe kiu — vidu — kune estas
 malamo kaj pardon'; ŝafid' kun tigro:
 la ponard' kaj la kruc' en sama peco!
 Kaj nun aŭskultu min, por lia honto.
 Mia patr' estis maŭro; amon sentis
 al kristana knabin'; je ŝi edziĝis
 post ŝajna konvertiĝ': ambaŭ min naskis.
 Li similas Jezuon, patrin' diris.
 Bela kiel huri', diris la patro.
 Apud ili mi kreskis, dum konfuzo
 versetojn de l' Koran' kaj la Biblio
 en vekigo kaj dorm' mi balbutadis.
 Mia hejm' ĝarden' estis Valencia;
 ĉie floroj en ĝi; eĉ en l' animo
 de l'amantaj gepatroj, kia ĝojo!
 Jezuon vidis ŝi; li la Profeton;
 feliĉe ili vivis, kaj aspektis
 kvazaŭ estus por ĉiam paciĝintaj
 Mahometo kaj Krist' pro tia amo!
 Sed la pac' estis nur en mia hejmo!
 Mi memoras pri ĝi! Iun vesperon
 patro kisis patrinon; furioze
 levante laborilon, li eliris.
 Dum tagiĝ' oni frapis nian pordon
 kaj patrino malfermis. Kiu estas?
 Oni ĵetis al ni mortintan korpon
 kaj aŭdiĝis: Virin', jen via edzo!
 Pasis tago post tag' : iun, subite,
 patrino vekis min: Fil', tempo estas!
 Kaj kun ploro ŝi prenis min en brakojn.
 Tiam, sesjara, falis mi en dormon.
 La ĝemoj vekis min: popolamason
 kune kun mi mi vidis en galero,
 dum griza tero malproksimiĝadis!
 Mia patrin' miajn okulojn kovris;
 poste regis sur mar' nokta kvieto;
 sed odoro de sango min sufokis
 kaj eĉ unu kaptito ne vidiĝis!
 Kaj parolis patrin': Kiu mortigis
 perfide vian patron, filo mia,
 mortigos ankaŭ min; de l' maŭra raso

eĉ la ekziston ili ja ne volas.
 Ĉu vi aŭdas la ŝarkojn kiuj saltas
 kaj sataj, ŝvelaj, kun kadavroj ludas?
 Se vi saviĝus, mia fil', nin venĝu!
 Sed, ve! Subite nin ĉirkaŭis l' aro
 da kristanaj maristoj, kaj mortkrion
 patrin' eligis en forkur' ; la monstroj
 per la haroj ŝin kaptis. Sango ŝia
 saltis sur min. Ŝi falis; ho ve! oni
 de ŝi deŝiris min! Sed ŝi premadis
 mortante mian manon; ŝiaj ungoj
 en la karnon penetris! Fil', nin venĝu!
 Kaj la monstroj ŝin levis, en la ondojn
 ridante ĵetis ŝin, kaj ĉar ŝi floris
 venĝon! kriante, per remila bato
 ŝian kapon disfendis, kaj ŝi dronis!
 Kaj jen: ni estas la terur' ! Hienoj,
 rabistoj kaj krimuloj ja ni estas !
 Ili... blankaj kolomboj, puraj koroj,
 infanoj tute am', pentraj-sanktuloj!

LA MILA JARO

Estis la tempo, kiam sur la flavaĵ
 montflankoj neĝon la veter' delasis;
 rapidflugante, en multopoj ravaj,
 senlandaj birdoj super mar' transpasis.

Pastroj, monaĥoj, en kunec' rapidis
 urbojn, preĝante de ĉiel' absolvojn;
 ilin infanoj malaperi vidis
 de la kasteloj sub la nigrajn volbojn.

Pura disbrulis en fumnub' incenso
 tagojn post tagoj antaŭ sanktaltaroj;
 nokte abatojn maldormigis penso
 pri minacantaj diroj de psalmaroj.

Per voĉo plora sonoriloj plendis;
 oro plenigis monaĥejojn vastajn;
 kaj la malgaja servutul' atendis
 apud kameno fuma tagojn lastajn.

El sur la muro pendigej' lasita
korvojn ne vidis en la nokt' malhela;
kaj ĝis la urbo ĉirkaŭmuregita
sin paŝti venis la anar' gazela.

En hejm' ŝlosita virgulin' fidela
jam ne forbrulis je l' alspirado
de la paĝio, kies voĉ' miela
amon glosadis apud alta krado.

Dungosoldatoj la armilojn jetis,
el la kasteloj malproksimiĝante;
parazitaro sur kampar' vegetis,
la senkulturajn fruktojn sekigante.

Tolo de sako kavalirojn vestis;
polvo kuŝadis sur trofe' batala;
kaj ambrozioj kaj vin' miela restis
en fundo ventra de la kruĉ' kristala.

Urboj, vilaĝoj, kun solec' aspektis;
iloj defalis el la homaj manoj;
vane hebrea la bazar' efektis
per plum', brokat', ermen' kaj filigranoj.

En la haveno—kvazaŭ kota lago—
sulkojn ne lasis sur la akv' veseloj:
lign-raŭpo rodis dum la tuta tago,
ĉarpiojn faris la birdar' el veloj.

Sen pan', sen ŝtipoj hejme, burĝoj, kiujn
je malsatado lunofaz' timigis,
por finkuiri lastan pecon, ĉiujn
la laborilojn en kamen' bruligis.

Alvenis fine tago de teruro:
kaj de nebuloj nigraj ĉirkaŭita
traflugis fajroastro tra lazuro,
lasante la Homaron timigita.

Atingis Okcidenton: ĝia brulo
tra l' kverkaj trunkoj en la supro monta
aspektis kvazaŭ, sub palpebr', okulo
malbrila, por eterne fermiĝonta.

Poste, per ombroj vestkovriĝis spaco;
brilis stelaroj meze de vaporoj;
kaj el kastelo, farmodom', palaco,
forkuris homoj kun singultaj ploroj.

Kun blankiĝintaj laŭ marmor' vizaĝoj,
apud vasaloj en amas', nobeloj
kune miksitaj restis ĉe l' vilaĝoj,
en viv' vestitaj per kadavr-manteloj.

Patrino ĉirkaŭ filetar' etendis
brakojn ameme en la senkonsolo;
dolore ĝeme malsanuloj plendis;
de l' fil' sin kroĉis kadukul' sur kolo.

Popolamasoj, en marŝad' malcertaj,
fale, leviĝe, sin al temploj puŝis;
nek ia lum' en hejmoj la dezertaj;
kaj siblis vent' kaj pordoj frap-ektuŝis.

Jen fina hor'. Trumpetoj de la juĝo
trifoje nun sonoros por la homoj;
monaĥoj levas sur l' ofero-kruco
Justulon inter nubo de aromoj.

Ripoz' glacia. Kovras per manteloj
homoj la vidon lumon-rifuzantan;
kaj pulson sian, kvazaŭ du marteloj
ambosen frapaj, sentas fortbatantan.

La ruĝaj flamoj de l' kandeloj tremas;
birdaro nigra sub la templarkaĵoj
kun bru' sovaĝa dum flugad' sin premas
kontraŭ la riĉaj de bildar' vitraĵoj.

Kaj al la vivo kun esper' subita
el ter' leviĝas la amas' timema,
diskuras,—haltas,—krias terurita,
—silentas poste—kaj aŭskultas, trema...

Pasis la hor'. Silenton de l' mistero
nokta malpeze nur venteto ĝenas:
paco en mond' kaj en ĉiela sfero:
novjaro estas: ektagiĝo venas.

La spaco bluas; la stelar' fandigas;
kantojn de koko kokkantad' respondas;
milde nebul' en Okcident' kuniĝas,
jen Oriente or',—fajr',—sun' jam blondas.

Homar' ! Reiru al la viv' volonte:
vi vidis nur fantomojn de vizio:
per kruco vin denove ŝarĝu honte,
ĉar staras malproksime Kalvario.

Malforta kverkarbet' de ĵus verdanta,
el polv' eligu vian trunkon junan!
Se vi ne scias pri veter' fulmanta,
kial jam timi la dehakon nunan?

Se iam kontraŭ Dio vi ribelis,
sufiĉe vin jam punas nescieco;
Dio pekinton el la mond' ne pelis;
konservi lin, Li volas, al virteco.

Ĉar nur la amo estas dia vero,
pri estontec' terura ne deliru:
jarcentoj estas sole sur la tero
ŝtuparo de Jakob'. Homar' : Vojiru!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

REGO KAJ MONAĤO

AKTO III

Sceno XI

Agnès

En la nomo de Dio, min aŭskultu!
Por tiu am', kiun al mi vi ĵuris!
Por la nomo de nia filineto!

Reĝo Ramir

Diru. Oni ne vidu min aŭskulti.

Agnès

Mi ja volis vin ami! Mi sufokis
en brust' frenezan ardon, kaj nur volis
ĉe viaj brakoj l' amon, esti tuta,
tuta de vi! Vi estis el marmoro!
Malfeliĉega mi, ĉiam preĝanta
al la Ĉiel' ke vi min amu multe
kaj ke mi amu vin! Kiel mi preĝis!
Al ni venis filino kaj mi ĉiris:
Nun li estas de mi! Mi estas lia!
Sed, ho ve! de post tiam ree estis
en mia lit' monaĥo preĝadanta!

Reĝo Ramir

Mi preĝis, sed ne kore. Mia lango
estis por Di': por vi l' animo tuta!
Por vi kaj nur por vi! Dum vi dormadis,
de via spir' logate, vian buŝon
mi volis kisi... sed mi ĝin ne faris...
min mem kaj vin terure malbenante!
Mi ne povis vin ami, ĉar la vivon
elofervis al Dio mi, monaĥo!
Mi ne povis vin ami: kaj senvole
pli kaj pli ĉe la koro vin mi havis!
Vi tie estas nun kaj estos ĉiam:
ĉar multe pli ol Dion vin mi amas,
vi aŭdas? pli ol Lin! vin... el argilo!
Ĉar pli emociiĝis anim' mia
kaj pli la kor' flugilojn siajn movis
kaj vibris multe pli l' estaĵo tuta
ho terur' ! vin prenante en la brakojn
ol ĉe l' altar' levante la Hostion!

MIGRADO

I

Pri deven' mi ne scias. Elvekiĝas
mia anim' en sonĝo ombroplena.
Voĉo kriis al ĝi:—Patrujon serĉu!—
kaj abismen, flugante, ĝi sin jetas.

Kiel eta fajrer', tuj, malproksime
ekbrilas mond' ĉe la mallum' eterna,
kontraŭ rigard' anima kreskadante
vestite per kolor' kaj form' malcertaj.

Maroj tie—ĉi-tie jam vidiĝas;
laŭfadene riveroj sin etendas;
kaj en arbaroj kaj en kampoj, ombraj,
dezertoj, lagoj, kiel cindr' aspektas.

Sur abrupta montar' animo haltas;
ĝis horizont', sin altaj arboj levas;
ĝi rigardas ĉirkaŭen kaj aŭskultas
kun surprizo en mez' de land' vastega.

Senfina vojo: ambaŭflanke staras
konstruaĵoj ruĝmuraj kaj altegaj,
montoj havantaj de titano formon;
kaj en vicoj sfinksaroj dorme restas.

Sur muregoj, portikoj kaj ŝtuparoj
amaso-ondoj brue sin puŝpremas;
bajaderoj, brahmanoj kaj fakiroj
en procesi' parada trae venas.

El vejnoj fluas, purpurigas plankon,
l' elefanta, bufala, sang' ofera;
kaj sur la ĉaro venas di' metala,
en mallumo la frunt', piedoj helaj.

La kornoj sonas; la parfumoj brulas;
popol', amase, antaŭ di' sin sternas;
la radoj krakas dispremante korpojn;
per kantoj triboj la ĝemegojn tegas.

II

Kaj forflugas anim', malgajigita,
el ebenajoj de la mort' kruela.
La mond' vojiras tra la spac' turniĝe,
kaj fariĝas la ter' alimiena.

Ravanta templo: por altara lampo,
pendanta de zenito luno plena;
fieraj kverkotrunkoj por kolonoj,
por volb', folioj kaj stelar' ĉiela.

Sur la dolmeno de ciklopaj ŝtonoj,
de garboj pinoŝtipaj flamo tremas;
militistoj envice proksimiĝas;
kaj girlandojn virinoj ĉirkaŭplektas.

Antaŭ altaro la kaptitoj haltas;
glavojn flagrantajn oni ope levas;
fluas sang' de kaptitoj, jam kadavroj;
en fajron ilin oni faske ĵetas.

Pinĉas la bardoj harmoniajn harpojn;
druidinoj dancadas kaj kriegas;
tintas falante sur la ŝild' armiloj;
ronkas la mar', sovaĝaj bestoj blekas.

III

Kaj alifoje flugas for animo,
vagante pro terur' en spac' etera;
poste laŭgvide de l' maronda vojo,
super popolo senkonscie ŝvebas.

Per muregoj vestita, vasta urbo;
transe, varmsabla ebenaj' dezerta;
apude, bord' de blua maro, kie
sin tiremoj, ¹ ligitaj, balancetas.

—Molok' ! Molok' !...—irante templon krias
patrinoj, kiuj filojn braketenas;
rigardas ilin kortuŝite viroj
kaj, kisante la vestojn, ilin sekvas.

Sen ĉes' malfermas la malsatan faŭkon
brulruĝa dio de intern' infera;
kaj fiere virinojn, unuope,
en ĝian ventron karajn filojn ĵetas.

Tra okula malplen' eliĝas flamoj,
fumadas lipoj, ĝia gorĝo blekas!...
Ve al patrinoj, kiuj ploron viŝas,
ilin pikas la ŝtaloj, kaj trafendas!...

(1) Pratemparaj ŝipoj kun tri vicaj de remiloj.

IV

Kaj denove patrujon la animo
reserĉas, kaj denove mondon venas.
Inter nuboj, vidiĝas sur montetoj
kuŝanta urbo, kaj river' malrekta.

Kantadoj ĉie; kaj sonor' de liroj;
sonad' de flutoj; kaj bruegoj festaj;
Forumo, fore; Kapitulo, supre;
Kurio, jen; inter palacoj, "termas".¹

Akvoporta arkar', kolosoj ŝajnas,
kiuj la manon reciproke prenas;
altaroj ĉie, kaj sur ili dioj,
pekulinioj, tiranoj, ŝtonaj restas.

Altrangaj moŝtoj, liberuloj, sklavoj,
Coliseum-ŝtuparojn igas plenaj;
sonas aplaŭdoj, kiam homon tigro
per ungegoj en pecojn dise fendas.

En arbaroj el mirto kaj nerio
bakhainoj ebriaj petolŝercas;
idoj, patrinojn surprizante, ridas,
kaj sekvas ilin, kaj imiti penas.

V

Kaj dume, kiel erarinta birdo,
flugas anim' de supr' al supr' sen celo.
Kvazaŭ sunoleviĝ', heleco stranga
subite logas ĝin al oriento.

Senvivej' : sur rokaĵ', malvigla palmo;
figarb' sen frukt' kuŝanta en soleco;
de malsata kaprino postesignoj
sur sablej' rebrilanta pro sunhelo.

Sole staras, amas' da nigraj ŝtonoj,
—krani' senhara laŭ aspekt'—, monteto;
en supro, kruc' de malhonora puno;
sur ĝi mortante, spiras vir' kun peno.

(1) Varmbanejo.

Per malgaja rigard', movante lipojn,
rigardadas li urbon sub piedoj:
—Ili agas sen sci' ; pardonu ilin!—
al Patr' por mortigintoj faras peton.

Kiel pura lili' pro pluv' falinta,
patrin' aŭdigas apud kruc' plorĝemon;
el popola amas' disciplo kara
benon petas de li per ama gesto.

—Lin akceptu por fil', patrino mia!—
ekdiras la mortant' kun mildakcento...
kaj okulojn li fermas... kaj ter' tremas...
kaj funebre vestiĝas universo...

Jam sufiĉe vojiris vi, spirito!
Flugilojn viajn faldu sen ribelo:
malluma sun', terur' vin ĉirkaŭanta,
klare diras al vi pri Majstr-pereo.

En naskiĝ', unu fojon jam vi aŭdis
malgajan saman voĉon de amemo.
Ĉe parol' al patrin' kaj al disciplo,
rigardis vin liaj okuloj-steloj.

Al lia vivo-sang' alprenu lipojn,
lacsoifa migranto al ĉielo.
Alripozu ĉe li, jen la patrujo.
Enkorpiĝu spirit' : ŝprucu el tero.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

INDIBIL KAJ MANDONI

AKTO I

Sceno VIII

Brojda

Lasu min!

Romulo

Por la dioj!

Brojda

Ho, mi timas

ke oni vidu vin!

Romulo

Ho, kiel bela
iĝis la ter' de kiam mi vin vidis!
Ĉie kantas birdar' ; kalikojn siajn
malfermas kampaj floroj, eĉ la spikoj
tute dolĉe kuniĝas kaj la nomojn
de Romulo kaj Brojda flustre diras.

Brojda

Ho jes! Romul' kaj Brojda, mi ĝin aŭdas;
ĉio sin amas, kio havas vivon.

Romulo

Eĉ riveroj kaj mar', montoj kaj nuboj,
ĉio sin serĉas kaj sin ame kisas.

Brojda

Kruela—nur la hom' !

Romulo

Nur via patro!

Brojda

Kia ĉagren' la nia! Mi dezirus
mortiĝi apud vi.

Romulo

Edzino mia!

Vi volas esti tia? Brojda: diru!

Brojda

Ĝeĉ mortiginta jam kaj sub la tero,
mi eliĝus el ĝi por diri tion.

Romulo

Se vi mortus, mi vin en miajn brakojn
prenus, en vin mi blovus mian spiron,
kaj vojirante sur la ter' kaj maro
al la diino irus mi por diri:
ŝin revivigu, ĉar la rozoj velkos,
de l' fontoj ĉesos flu', falos sen vivo
la steloj de l' ĉiel' !... Kaj, ĉe l' altaro,
Venuso, nur por vi, lokon pretigus.

Brojda

Sed viaj dioj nin je mort' malamas,
viaj dioj ne estas ja la niaj.

Romulo

Kiu, ho Brojda! estas via Dio?

Brojda

Vi estas mia Di' !

Romulo

Mi estas homo,
sed mi superas ilin, pli feliĉa:
ĉar havas mi—ne ili—vin. Se iam
kiel ili mi povus, mi ja igus
fali pluvon de amo sur la teron
el okuloj de l' dioj, por forviŝi
la limojn de la landoj.

Brojda

Ho, Romulo!

Romulo

La manon metu vi sur koron mian:
ĉu io malamika tie estas?
Egale ĉies koroj batas ĉie,
sed kredi tion ja neniu volas.
Eble paciĝus via patr'?

Brojda

Verŝiĝus
unue tuta sang' de nia raso.

Romulo

Forkuru ambaŭ ni; eblas nur tio.
Ĉu vi timas?

Brojda

Ho jes, kia doloro!

Romulo

Vi scias ja! Neniul li rezignas,
ne kredas sin venkita de l' Romanoj,
kaj pretiĝas batali. Sed ja viglas
Tarakaj legionoj; furioze
sange kaj fajre sur lin falos ili
cindron farante el ĉi-tiu raso
de malbonuloj.

Brojda

Ho, Romulo: mian
animon vundis vi.

Romulo

Vin, ne.

Brojda

Min lasu,
mian patron mi amas.

Romulo

Ho!

Brojda

Foriru
ĉar malbonuloj estas mia raso.

Romulo

Brojda!

Brojda

Mi mortos, mi ne povas vivi
kun vi nek for de vi. Vojo ne estas.

Romulo

Silentu!

Brojda

Ho, vi plendis la naciajn
malamojn, kaj vi mem estas el Romo!
Romo, de landoj en liber' rabisto!

Romulo

Brojda!

Brojda

Vi, jes, rabistoj!

Romulo

Dioj helpu!

Brojda

Unu land' estas nun kontraŭ l' alia!

Romulo

Kia malĝoj'! Kion vi diras, Brojda?
Vi pensas kiel mi. En brusto mia
estas io profunda kaj potenca
venanta de l' prapatroj; ĉiu fibro
de mia karno sentas sin el Romo.
Sed super ĉio staras lumo viva,
fajron jetanta kaj neestingebla,
tuta spirito, kiu laŭte vokas
amon al ni. Vi estas llergeta,
sed amas min, ne estas de la viaj.
Diru tion al mi. Sed la vizaĝon
ne kaŝu for. Prefere, min mortigu.
Ni ambaŭ mortu, sed sin ĉirkaŭprenu
niaj korpoj dum mort', kaj teren igu
nia polvo por ĉiam!

Brojda

Romul'!

Romulo

Brojda!

Mi amas vin! Ke la malamoj vivu
tie-ĉi, ĉe l' sovaĝaj. Super nubojn
niajn kapojn ni levu.

Brojda

Mi dezirus

ke vi la miajn amu.

Romulo

Ne nuntempe.

Brojda

Se ili vin protektis!

Romulo

Ne!

Brojda

Jes, ili

alportis min al vi.

Romulo

Tre certe, Brojda!

Benata, via gent'!

Brojda

Kaj ankaŭ vian

mi benas ja. La patroj de Romulo
nur amas.

Romulo

For malam'!

Brojda

En brustoj niaj

ne estas lok' por ĝi, amo nur estas.

Romulo

Se ĉie tiel estus!

Brojda

Tre feliĉe,

se por ĉiam finiĝus la malamoj
ĉe homoj kaj ĉe dioj!

Romulo

Ho, ni iru!

LA SEKAJ FOLIOJ

(Sardano, kataluna danco; teksto de Angel Guimerà, muziko de Enric Morera)

Sekaj folioj rule dancas
de lok' al lok' en daŭra salt',
kaj vento ŝajnas, ĉe l' arbaro,
de muzikistoj danca kant'.

Kiam amason da folioj
ruĝaj, ludemaj, trenas vent' !
Unujn skuadas kurebriro,
aliajn dolĉa ir' kaj ven'.

Kiam radias sun' subire,
l' arbo, jam nuda ĉiu branĉ',
milde la ombbron proksimigas
al la dancantoj sur la kamp'.

Aperas lun' malĝoja, sola,
kvazaŭ restinta arbfoli',
kiu serĉadas tra l' ĉielo
la flugintinojn for de ĝi.

Sekaj folioj rule dancas,
sed kiam poste venas tag',
forportas ilin la ventego
supren por ĉiam tra la spac'.

La seka arb' jam ree vivas:
floras folioj el burĝon' !
En ĉiu branĉ' kantas kaj ridas
nesta birdpar' kun amkanzon'.

Poste la frukto, kiel ĉarma!
pendanta sub la fajra sun' :
blonda persiko kaj ĉerizo,
kaj abrikot' kaj dolĉa prun' !...

Ho, kia ĝoj' ! Ni rondojn faru
en tag' kaj nokt', por frata danc',
al la Senlimo rigardante,
ĉiam ligitaj per la man' !

POMPEU GENER

(1848-1921)

Pompeu Gener naskiĝis en Barcelona la 24an de Junio 1848. Li mem rakontis pri sia prakataluna deveno: liaj praavoj, en la patra linio, estis militmaristoj de post la tempo de Berenguer IV, naskiĝinte en la Tarragona marbordo. Kiel lia patro, Pompeu Gener fariĝis farmaciisto. Li estis Doktoro en Farmacio, en Medicino kaj en Naturscienco. Li loĝis kelkan tempon en Parizo, kie li konatiĝis kun Victor Hugo, Littré, Renan kaj Sarah Bernhardt. Li longe vojaĝis tra Germanujo, Svisujo kaj Nederlando. Li estis membro de kelkaj sciencaj asocioj kaj ĉeestis multajn internaciajn kongresojn.

Pompeu Gener verkis en franca lingvo sian ĉefverkon, tre originalan kaj kuriozan, titolitan "La Morto kaj la Diablo" (Historio kaj filozofio de la du plej grandaj neoj). Tiu verko, aperinta dum la jaro 1880 kaj nun iom modpasinta, reflektas la spiriton de Pompeu Gener, kiu estis pioniro en Katalunujo de la movado celanta la ne-enmiksiĝon de la religio en la ne-religiaj aferoj.

En kataluna lingvo, nia fama aŭtoro verkis serion de mallongaj romanoj, historiajn studojn, dramojn, komediojn, monologojn, satirojn, kaj proksimume cent vibrantajn artikolojn en la revuo "Joventut", la revuo kiu eldonis la unuan gramatikon kaj la unuan vortaron de Esperanto en kataluna lingvo, de Frederic Pujulà.

La personeco kaj eĉ la vivo de Pompeu Gener estas tre komplika kaj eksterordinara. En lia verko, apud libroj de filozofia kaj historia gusto, troviĝas ŝercoplenaj komedioj kaj gajaj frivolajoj. Krom liaj aluditaj verkoj france kaj katalune, li ankoraŭ verkis kelkajn librojn hispane. Li verkis studojn pri la antikvaj Grekujo kaj Persujo, pri Miquel Servet, pri Cyrano de Bergerac. En la kataluna verko "Dones de Cor", kiu enhavas historiajn legendojn pri virinoj, li verkis unu el ili ne en la moderna lingvo, sed en la arĥaika lingvaĵo de la trobadoroj. Li aperigis artikolojn kiel literatura kritikisto sur ĵurnaloj el Barcelona, Paris kaj Buenos-Aires. Li estis samtempe vojaĝemulo kaj granda amanto de la Barcelona urbo, kaj ofta ĉeestanto de la intimaj rendevuejoj de Barcelonaj artistoj kaj literaturistoj.

Pompeu Gener, viro ĉarma, inteligentega kaj tre bonvolema, sin doninta ĉefe al la literaturo, mortis en Barcelona, en 1921, meze de ĝenerala estimo.

Bibliografio: En kataluna lingvo: "Dones de Cor", kiu en la unua eldono havis la titolon "La Dona Mediterrània"; "L'Intel-

lecte Grec Antic"; "Pensant, sentint i rient"; "Senyors de paper", dramo; "El Patró Pere March", "Doctor Stumper", "L'agència d'informes comercials" kaj aliaj teatraĵoj; "La taverna intelek-tual"; artikoloj sur la revuo "Joventut".

LA GREKA DIINO

Unua rakonto, mallongigita, el la verko "Dones de cor" (Histo-riaj legendoj pri virinoj) enhavanta ok rakontojn.

Grekujo - Ateno
345 jarojn antaŭ J. K.

En tiu tempo de la antikva Grekujo, Ateno estis la lumo de la tiam konata mondo, kaj Periklo, aristokrato pri naskiĝo kaj pri inteligenteco, la princo de la demokratio. Li malpliigis la popolojn de la Agoro, li organizis la Senaton kaj la regadon de la popolo; sed la regadon de la popolo per la popolo li difinis al la plej bonaj el la popolo. La libereco estis lia principo; la virto, la brido. Oni inklinis ne al la egaleco, sed al la egalvaloro, instruante kaj edukante tiujn, kiuj mankis je tiaj bonoj. Ĉia publika servo estis pagata, kaj akceptata kiel devo. La junuloj estis instruataj en la lernejoj kaj disvolvataj fizike per la gimnastiko kaj la ritmaj dancoj. Ĉiu, atinginte la plenegecon, devis havi metion aŭ arton. La beleco de la korpo estis kulturata kiel tiu de la animo. La beleco, la virto kaj la intelekto iradis kunaj. La arto estis alveninta tien, kien neniam plu ĝi estas atinginta poste. La filozofio, same. Oni havis la ĝustan mezuron de la aferoj: nek tro, nek tro malmulte, jen la principo. Tie regadis eleganta simpleco, ne la lukso paradema kaj barbara. La temploj de la dioj estis trankvilaj kaj plaĉaj; la domoj de la civitanoj, sanaj. La popolo de statuoj estis dissemata tra la publikaj lokoj: da ili ekzistis por ĉiuj eminentuloj (eĉ por memorigi pri la civitaninoj belaj), kaj da ili oni konstruis el marmoro, el bronzo, ŝtono, eburo kaj eĉ oro, laŭ la eco de tiu aŭ tio reprezentata.

Post la sento de la *Libereco* kaj de la amo al la *Patrujo*, en ĉiu Atena animo ekzistis la amo al la *Beleco* pura.

La korpo nuda ne estis malmorala. Ankoraŭ oni ne havis ideon pri la peko. Tia juda koncepto ne estis ankoraŭ atinginta Grekujon.

Tiu urbo estis malfermata al ĉiu genio aŭ spirito scianta produkti, sen ia demando pri la Patrujo deveno, pri la naskiĝloko. Granda parto da artistoj kaj filozofoj estis el Tebo. La granda poeto Pindaro estis naskiĝinta en Cynoscephalos, kaj havis bron-zan statuon sur vasta portiko, kun ora diademo en la kapo,

kaj en la manoj la dia liro el oraj kordoj. La *rapsodoj* estis pa-gataj per la publika Trezoro, kaj, laŭ ordono de la Popolo, ili trairadis tra montoj kaj valoj, pilgrimantoj de la Idealo, dekla-mante kaj kantante la Homerajn poemojn tra tuta Grekujo. Kaj tiu admiro por la Beleco pliigis la popolan bonfamon de Periklo. Li estis stariginta festojn grandegajn kaj solenajn. Li estis farinta el Ateno palacon kun marmoroj kaj porfiroj, eburo, eburo kaj oro; ĝiaj temploj kaj monumentoj, ĝiaj portikoj, promenejoj kaj ĝardenoj estis la fiero de la Atenanoj, kiuj amadis sian urbon kiel patrinon belan kaj junan, kunigantan al la Gracio la belecon de siaj vestoj.

Tiel alten atingis la Ateno de Periklo, kvarcent kvindek jarojn antaŭ Kristo, ke ankoraŭ ĝia heleco lumigas nin, trairante la mal-lumon de la Meza Epoko.

* * *

La intelektularo de Ateno havis sian centron en la ĝardenoj de Akademos. Ĉi-tiuj troviĝis ekster la ĉirkaŭmuregoj, en la kvar-talo de la Ceramiko, preter la pordego Dipila. La rivero Cefis proponadis siajn diafanajn akvojn al tiu loko plaĉa kaj soleca, ĉirkaŭata de ĝardenoj, meze de la kamparo, preskaŭ kaŝata de la foliarriĉaj arboj: platanoj de larĝaj folioj, sovaĝaj ulmoj kaj aromaj cedroj. Dek-du sakraj olivarboj ĉirkaŭadis la altaron de la diino Paĥas Athenea kaj tiun de la naŭ Muzoj, kiu estis prok-sima; kaj en aliaj lokoj, tie kaj tie tra la arbaro, staris la altaroj de Eros, Heraklo kaj Prometeo, apud kiuj estis elegantaj ben-koj el ligno aŭ el Pentelika marmoro. Ĉio invitadis mediti, pen-sadi aŭ revadi: la pureco de la aero, la silento, kaj la soleco de la arbaro. Ĝi estis la templo de la Ideo: la intelektuloj (poetoj, pensistoj, filozofoj) kutimis iradi tien ĝui plaĉan ripozon, dis-kutante la lastajn trovaĵojn de la sciencoj, la regulojn de la artoj, la teoriojn de la filozofio. En la diskutoj de tiuj pensa-mantoj ĉio estis permesata, se nur oni esprimis sin en la plej konvenaj formoj, al kiuj neniam iu el ili malatentis. Eĉ la dioj tie estis diskutataj: neniam en rikana tono, ĉiam laŭ la fluo de la ideoj. En unu el tiuj diskutadoj, ĉe la okazo pritrakti la teo-gonion de la Poemo de Hesiodo, iu subtenis ke la dioj estas nur antropomorfismoj puraj. "Se la bovo kaj la leono scius pentri, ili pentrus la diojn tiaj, kiaj estas ili mem." Alia estis, kiu neis ĉion, eĉ la movon, asertante ke la tuta fizika mondo estas nura ŝajno. Kaj inter la intelektuloj kaj la pensistoj vidiĝadis la stra-tegiistoj, la artistoj kaj la plej belaj *hetairoj*, al kiuj speciale plaĉis tiel altaj diskutoj.

Kaj, meze de tiu eleganteco en la diro kaj la elektiteco en la esprimo, prezentadis sin, trankvilaj kaj ĝojaj, la disfaligantoj de mitoj, la konstruantoj de novaj sistemoj kiuj preparadis la ĝermojn de estonta evoluo.

En Ateno, la civitanoj antikvomanieraj timis la Akademion. Al ili ŝajnis aŭdi malproksiman minacantan voĉon. La spiritoj fortaj kaj liberaj, la junuloj, kiuj jam estis ĵurintaj al la Patrujo lasi ĝin pli granda ol ili ĝin trovis, en la momento ĵuri antaŭ la diino Athenea ĉe la riĉevo de la armiloj, ŝajnis akcepti la filozofian movadon pro ia eleganta scivolemo; sed la aristokratoj aljuĝis la tutan kulpon pri la progreso de la detruanta kaj kuraĝa ondeggo, kiu antaŭeniradis tagon post tago, al Periklo, ĉar ĉio tio estis kaŭzata de lia granda toleremo. Kaj eĉ oni riproĉis al li la interparoladon kun lia majstro Anaksagoro pri la dieco. Sed, ĉar li starigadis grandajn templojn por la dioj de la Patrujo, neniu kuraĝis formuli siajn akuzojn en maniero konkreta. Ankaŭ lia granda amiko, la skulptisto Fidio, estis akuzata mallaŭtvoĉe pri la peko esti prezentinta Periklon, en la batalo de la amazonoj, ĵetantan sagon, kaj ankaŭ pri tio ĉu li estis preninta aŭ ne por modelo Aspazion, konvene vestitan, por krei la diajn formojn kiujn sub sia *peplum* lasis diveniĝi la diino Athenea, antaŭ ol tiu estis translokata al la Parthenono. Aliaj pretendis vidi Aspazion en Dejanira reganta Herkuleson, kaj ŝin oni akuzis pri ĉiuj kuraĝaj agoj de la amikoj de Periklo, la *Pisistratidoj*, kiel la konservativuloj alnomis ilin. Eĉ estis iu, kiu timis ke ŝi volos fari el li reĝon. Sed la demokratia popolo, kiu vere amadis sian grandan strategiiston kaj oratoron, malŝatadis tiujn kalumniemajn supozojn de kelkaj aristokratoj.

La taktiko de la aristokrata partio estis lerta kaj malbonintenca. Ĝi volis kredigi al la demokrataro ke ĝi estas kondukata al despotismo. Sed la popolo estis trankvila, ĉar ĝi vidis en li la unuan civitanon de Ateno en virto, kuraĝo kaj elokvento.

* * *

En la ĝardenoj de Akademos, ian printempan posttagmezon kiam ŝajnis korbati tie la tuta animo de Grekujo, ĉiuj intelektuloj estis senpaciencaj atendante la alvenon de Anaksagoro. Periklo kaj Fidio estis anoncintaj al ili, la antaŭan tagon, ke la granda filozofo klarigos kelkajn ideojn pri la origino de la mondo, pri la estonteco de la religioj, kaj kelkajn aliajn gravajn aferojn, kaj ĉiuj atendadis avide la paroladon. La amikoj de Periklo konsistigis la plejmulton el la disĉiploj de la profesoro, kaj ili formis grandan parton de la publiko.

Dume kelkaj intelektuloj havis tre viglan diskuton, kun iuj hetairoj, pri kia estas la plej bona donaco kiun la dioj faris al la homoj.

—La okuloj—diris Zeuxis—; ĉar sen ili la Naturo ne prezentigus al ni ĉarma kiel magia vizio.

—La Talento—asertis Klitarkos—; plie se ĝi estas genio. Tiam la Homo egalas la Diecon, ĉar li kreas.

—Mi trovas—respondis la bela Ismenio—ke nenio estas kiel la Amo. Ĝi, filo de Venuso, estas kiu pludaŭrigas la rason. Sen ĝi la viroj kaj virinoj vivadus malĝojaj kaj malaperus.

—Nu, mi pensas ke tio plej bona estas la Vivo—diris kun entuziasmo Eŭkaris la bela—. Tiu-ĉi estas la vera donaco de la dioj. Nenio estas komparebla al la plezuro vivi, ĉefe kiam oni sentas kaj konscie posedas la Vivon; kiam la persono, en plena kono, rimarkas ke li vivas per sia tuta estaĵo.

—Kaj sen amo?—rediris Ismenio.

—Eĉ se estus mi sola en la mondo, se nur estus birdoj kaj floroj kaj aero... ia dia ebrieco regus min kaj produktadus al mi la Eŭforion. Ho! la Vivo! Nenio ekzistas sen ĝi. Ja ĝi estas la afero plej sankta sur la Tero! Ĉio devas esti regulata per ĝi, kaj ĉio ĝin malhelpanta aŭ malpliiganta estas krimo.

Kaj tie-ĉi la figuro de Eŭkaris alprenis superbelan esprimon. Ĉe tio alvenis Fidio tute pensema.

—Ĉu vi estas malgaja?—al li demandis amiko.

—Pro diversaj kaŭzoj—respondis la skulptisto—. Jam la kalumnio komencas ataki min.

—Tio ne gravu al vi—diris Klitarkos—. Via nomo staras super ĉia kalumnio: la beleco de viaj verkoj ŝirmas ĝin.

—Ja tra tie-ĉi oni komencas min ataki. Pri la diino Athenea ili ja ne diras ke ĝi ne estas bela, impona, serena kaj superega, sed...

—Kion?—ekkriis kelkaj, samtempe.

—Ke mi ne uzis en ĝi la tutan ortrezoron kiun oni donis al mi.

—Kaj kiu estas la senhonta kalumnianto?

—Virino: iu virino al kiu mi ne aljuĝis mian voĉdonon por la premio de Beleco en la konkurso okazinta antaŭ unu semajno, estante prezidanto de la juĝantaro.

—Vi devis fari ke oni persekutu ŝin—diris Klitarkos—. En kio okupas sin, do, la *sikofantoj*?

—Mi konsilis al li trankvilon—respondis Periklo, kiu ĵus estis alveninta—. Ĉio estus refalinta tiam sur min. Si jam iradis rakontante al ĉiuj sian certecon pri la atingo de la premio.

—Kaj oni dirus ke mi estas kaŭzinta ŝian elreviĝon—diris Aspazio, elmetante la kapon apud Periklo.

—Vi pravas, Aspazio—diris tiam, aprobante, la pentristo Zeuxis—. Nenio estas pli terura ol la envio de ofendita virino. Kaj tiom ofendas virinon la beleco de alia, kiom pretendeman vantulon la vera talento de supera konkuranto.

Ĉe tio aperis en la enirejo al la ĝardenoj respektinda maljunulo, kun blankaj barbo kaj haroj, de malalta staturato kaj malgrasaj formoj: li estis Anaksagoro. Lin vestis tuniko de malluma koloro granata, sur kiu reliefigis lia blanka barbo kaj liaj haroj longaj kaj silkaj. Malgranda mantelo kovris liajn ŝultrojn. Lin

akompanis akolito, aŭskultanta respektive kion li diradis, dum li antaŭeniris malrapide, apogata sur sia bastono, tra la ĝardeno vojo. Lia aspekto estis humila; tiom, ke, ĉe la ekvido de lia figuro, li jam konkeris la korojn. Li estis multe vojaĝinta kaj pli studinta. Li estis irinta al la enigma Egiptujo, al la astronomiema Kaldeo, al la mistera Hindujo, kaj de tiuj landoj li estis leginta la librojn, la naturon kaj la homojn.

Vidante lin, ĉiuj alkuris por lin akcepti, Periklo la unua. La granda filozofo haltis rigardadi la cirklon de sakraj olivarboj, en kiu estis la altaro al la Muzoj, kaj diris:

—Filozofo ne devas instrui en simila loko, sed apud la unua ribelinto amiko de la Homo.

Kaj li decide marŝis al la platanoj ĉirkaŭantaj la statuon de Prometeo, kaj sin lokis sub ilia ombro. Ĉiuj sekvis lin, kaj siĝis sur la ŝtupoj de la statuo de P' Titano.

La filozofo daŭrigis:

—Prometeo estis la unua protektanto de la mortontoj: nur pro ili li postuladis al Zeŭso la justeco kiun la dioj ĉiam rifuzadis al ni, de kiam ni aperis sur la Tero.

Tiam la filozofo sidiĝis sur marmora benko, antaŭ sia aŭskultantaro, kaj kun sentenca tono ekdiris:

—La Materio estas eterna, kvankam variema en siaj elementoj. Nenio naskiĝas; nenio mortas. Kio ekzistas, tio miksiĝas kaj apartiĝas, kunfandiĝas aŭ distingiĝas. La naskiĝo estas kuniĝo; la morto, disiĝo. Ekzistas forto senkorpa, senŝanĝa, pensanta kaj aktiva, kiu ne kreas la Materion, sed kiu ĝin kunordigas. Tiu forto, kiu modifas kaj ordigas, estas la *Intelekt*, kiun aliaj nomas la *Spirito*.

—En la komenco de ĉio estis la haoso, tio estas, la konfuzo. La Intelekt, kaŭzo formanta kaj origino de la movo, metis ordon en la haoson. La Materio estis cirkle agitata de la movo; kaj la partoj plej subtilaj estis eljetataj al la ĉirkaŭo, kaj la plej pezaj restis en la centro. Tial la Tero estas la centro de la Universo. Sur ĝi estas la akvoj, kaj pretere la lumo kaj la varmo, kiuj troviĝas en la astroj kaj en la Suno.

—La Intelekt, tio estas, la Spirito, estas la animo de la mondo kaj estas dissemita tra ĉio. Ĝi formas la apartajn animojn de la homoj, de la animaloj kaj de la plantoj. Kvankam en ĉiuj estaĵoj ĝi estas identa al si mem, ĝi agas en malsama maniero kaj kun diversa intenseco laŭ la organismo kiun ĝi animas. Kaj kiam la Intelekt ŝajnas senaga estas kiam ĝi ne havas la necesajn ilojn, kiaj estas la organizaĵoj adekvataj; sed ĝi, per sia supera agado, formadas ilin, helpate de la tempo, en la estaĵoj. La apartaj animoj, kiuj estas nur eroj de la universala animo, mortas kun la korpoj kiam tiuj dismetiĝas kaj diseriĝas, reenirante en la grandan animon de la Universo, kiu estas la Intelekt.

La okuloj de la majstro estis kvazaŭ iluminataj, lia voĉo

raŭka, ĉe la alveno ĉi-tien. La publiko aŭskultadis kun religia silento.

—Kaj kian rangon, en via sistemo, okupas la dioj niaj patroj, ho granda saĝulo?—demandis al li Teofrasto, kiu ankaŭ troviĝis ĉe la aŭskultantoj.

Kaj Anaksagoro respondis al li:

—La dioj de la Patrujo ne estas ja ekzistantaj ĉiam en la estinteco, nek ekzistos en la estonteco. Ili estas nur ideoj puraj, kaj la ideoj transformiĝas. Kvankam la esenco de la dieco kuŝas en la koro de la Homo, ĝi povas alpreni formojn diferencajn. Kaj mi timas ke la profetaĵo de Prometeo plenumiĝos post multaj jarcentoj por nia raso. Iun tagon la popolo aŭdos teruran voĉon, kiu krios: “La dioj mortis!”

Nedifinebla teruro ekregis ĉiujn animojn. Neniam iu filozofo estis kuraĝinta al tia aserto en sia sistemo. Liaj amikoj timadis la aŭdaĉon de liaj respondoj, kaj pro tio restadis silentaj kaj teruritaj.

Sed subite, feliĉe, la afero estis deflankigata de unu el la aŭskultantoj. Tiu estis juna viro, malgrandeta, de korpo neharmonia, kolo dika, nazo plata, vizaĝo vulgara kaj senhontema, kaj barbo malaranĝata, lasanta vidi lipojn dikajn kaj ordinarajn. Li portis fikitan veston kaj liaj piedoj estis nudaj, malpuraj kaj plenaj de kaloj.

—Mi admiras vian scion, majstro, sed mi ne partoprenas viajn tendencojn!—li kriis kun akra voĉo—. Ĉu ne estus pli interese, ol la origino de la mondo kaj de la dioj, okupi sin pri la Homo?

Anaksagoro meditis momenton kaj respondis al li:

—Se vi estus aŭdinta aliajn paroladojn miajn, nun vi ne farus tian demandon. Guste mi jam estis klarigonta, ke, ĉar la dioj ŝanĝas je formo pro tio ke ili estas idealaj produktoj, estas neutile kaj eĉ danĝere fundamenti sur ili la politikan sistemon de la Patrujo; kaj ke ĉian regadon, ĉian organizadon de la civitanoj, ĉian institucion, oni devas fari celante la plej grandan aron da bonaj vivkondiĉoj de la Homo libera, kia estas la civitano de Ateno.

—Ha! de la Homo libera!...—rediris la alia, balancante la kapon—. Ĉu ne estus pli bone ke, super la bonesto de lia vivo oni preferu la suferon de la Homo, farante lin justa? Kaj anstataŭ subteni la Belecon kiel sinonimajon de Dieco, ĉu ne estus pli bone ke vi kontraŭbatalu ĝin ĉe la dioj, anstataŭ kontraŭbatali ilian senmortecon? Ĉu vi ne trovas ke la dioj, ne estante belaj, estus pli moralaj? Ĉu vi ne vidas ke la Virto estas kontraŭa al la Beleco?...

Li alvenis en tiun punkton de sia kontraŭparolo, kiam li ne povis daŭrigi, ĉar ĉiuj sin ĵetis sur lin kriante, la hetairoj la unuaj.

—Kompreneble: ĉar li estas tiel malbela, li volas ke la dioj ankaŭ estu tiaj!—ekkriis la bela Eŭkaris.

—Jen sofisto de stranga speco!—diris poeto—. Diigi la malbelecon! Fari la Virton malbela!

—Vi ne konas lin!—diris la eleganta Mnais—. Li nomiĝas Sokrato kaj estas filo de Sofronisko, la skulptisto je malalta prezo, kaj de tiu akusistino el la haveno, kiu vendas aĉajn kuracilojn faritajn per magiaj herboj el Tesalio! Li estas fuŝulo. Li volas fari statuojn de la dioj, kaj faras pupojn malbelformajn!...

—Kompreneble: se li ne scias desegnaranton!—aldonis Zeŭxis—. Kaj se vi vidus, kiaj li pentras ilin! Ili ŝajnas bird-timigaĵoj!

—Antaŭ kelkaj tagoj li faris bildon de la diino Athenea ŝajnantan vergo—daŭrigis Mnais—. Mi ne scias kie li povas vendi tiajn teruraĵojn!

—Li iras vendi ilin al la maristoj, en la Pireo—diris Fidio—. Antaŭ nelonge patrono aĉetis de li bildon de Zeŭso, sed jen ĉe la eliro el la haveno komencis blovadi fortega vento, kaj la maristoj jetis ĝin en la akvon ĉar ili kredis ke Zeŭso blovigas al Eolo la ŝtormon por ne vidi sin promenigatan en tiel ridinda figuro tra fremdaj landoj.

—For tiu sofisto ekstravaganca!—kriadis al li iuj poetoj—. Kiel vi volas ke li estu prava, se li estas tiel malbela?

—Pli decas ke li iru lavi siajn piedojn, tiu malpurulo!—aldonis la hetairoj.

—Ŝajnas al mi ke li estus bona soldato!—ekkriis strategiisto vidante la senhonton kun kiu li eltenis kontraŭ ĉiuj.

—Kiel ĉiuj sovaĝuloj. Je malmulta scio, multa kuraĝo. La homo scianta, se estas kuraĝa, estas tia nur pro amo al la Patrujo kaj al ĝia bonfamo, kaj tiu-ĉi jam estas virto de herooj—diris du intelektuloj akompanantaj Teofraston.

Kaj, inter la krioj de unuj kaj la ridoj de aliaj, disigis tiu kunveno komenciĝinta en tiel solena maniero, dum Sokrato, forirante, ankoraŭ turnadis la kapon rigardante senhonteme tiujn lin insultantajn.

Anaksagoro adiaŭigis de Periklo kaj volis resti en la ĝardeno, akompanata nur de sia akolito.

Periklo kaj Fidio salutis lin per riverenco kaj eliris tra la pordo Dipila; kaj, enirante la kvartalon de la Ceramiko, ekiris la straton Hermes kaj revenis al la Akropolo dum la vesperigo.

* * *

Ĉiujare, en la *plinterioj* de la *targelia* monato, la diino Athenea forlasadis la Parthenonon. La statuo de la dia Pallas, skulptita de Fidio, estis mallevata el sia ĉelo, kun siaj ornamentoj, por esti lavata en la purigantaj ondoj de la maro. Tiu tago estis funebra por la Akropolo. La sanktejo restadis malplena. En la dia statuo el oro kaj eburo kuŝadis la genio de la Atena diino, kaj

tiu greka urbo restadis sen la kutima ŝirmo. Tial antaŭ la nokto devis esti redonata la statuo al la templo Periptera, kaj tiam, ĉe la lastaj radioj de la subiranta suno, ĝi forigis la danĝerojn kovrintajn la urbon dum ĝia foresto.

La kalumnio elirinta el enviema virino estis farinta sian vojon, kaj ĉi-tiun fojon malbonvolulo akuzis Fidion pri ŝtelo. Sed al li ne estis malfacile defendi sin: pesinte la statuon, oni trovis en ĝi la kvardek mil talantojn kiujn oni estis doninta al li en bona oro.

En la sama tempo Anaksagoro estis akuzata kiel ne-pia pro siaj detruemaj doktrinoj, klarigitaj en la ĝardenoj de Akademos. Oni diradis ke la malapero de la dioj elvokus la ruinon de la Patrujo.

Kaj Periklo rigardadis neperturbable tiun malbonfaran laboron de siaj malamikoj, kiuj estis malamikoj de la Respubliko kaj de la Demokratio. Li timadis la venon de tempoj teruraj. En sia interno, la eminenta oratoro kaj strategiisto, por savi Atenon, prezentis al si tiun dilemon, antaŭ la facilanimo de siaj kuncivitanoj: la tiraneco aŭ la milito. La tiraneco estis al li malplaĉa, eĉ se estus li la tirano.

—La sklaveco estas hontiga por la popoloj—li diradis al si—: ĉu ĝi estas trudata de fremdulo, ĉu de despoto el la lando mem.

Kaj li ne volis senigi siajn sampatrujanojn je la libereco; li, la laŭrasa aristokrato.

—Nur la barbaroj meritas ĝin—li aldonadis—: nur ili toleras ĝin kaj sin sentas en ĝi komforte; la popolo de Ateno ne meritas ke oni forŝiru de ĝi la Demokration. Neniam sur ĝi la regado de iu satrapo!

Pro tiaj motivoj li ne havis la spiriton trankvila: plie ĉar li timis la kondamnon de Anaksagoro. Se li petus bonvolon de la juĝistoj, eble oni akuzus lin esti perfida al la Patrujo, kaj tio pli-gravigus ankoraŭ la kondamnon. Anaksagoro estis montrinta siajn teoriojn en plena Akademio. Estis iu, kiu faris plendon, kaj la filozofo ne estis homo kapabla malkonfesi siajn ideojn eĉ antaŭ mortkondamno.

Rapidigi la militon kontraŭ la Peloponeso estis la plej bona el la solvoj. Neniam la tiraneco hejma! Do, milito al la tiraneco ekstera!

Ĉe tio li estis alveninta pri siaj meditoj, kiam li decidis iri al sia palaco kaj voki fidindan sklavon, por ke tiu iru avizi tuj Anaksagoron ke li atendas lin por paroli.

Kaj, dum li atendadis la filozofon, li promenadis enpensiginte tra la granda salono de sia palaco; subite, ĉe turniĝo, li ekvidis la figuron de Aspazio.

—Ĉu vi ne plu kredas min inda esti la konfidatino de viaj revoj, ke vi ne vokis min? Ĉu vi kredas ke viaj pensoj ne povas reflektiĝi ĉe mi, kvazaŭ en spegulo el polurita argento, sen ke ili malplibeliĝu?

—Male: la spegulo de via beleco—respondis al ŝi Periklo—sufiĉus por metamorfozi la monstrojn min obsedantajn kaj fari ilin figuroj agrablaj kaj gajaj. Kaj, ĉar vi venis, diru—li aldona: kion vi volas de mi, bela Aspazio?

—Nur ke vi min amu. La amaj vortoj estas jam tiel maloftaj ĉe viaj oraj lipoj, el kiuj elfluas riveroj da trafa elokvento por la Atenanoj, ke mi bezonas elvoki ilin.

La oratoro, prenante la parfumitajn manojn de la bela Miletanino inter la siajn, diris al ŝi:

—La kupro bone hartita estas malmola kaj malvarma; sed kiu hartis ĝin, tiu estas vi, per via amo.

—La kupro, per la ago de la fajro, iĝas ardanta kaj ruĝa kiel purpuro kaj pli mola ol vakso. Kial vi ne amas min tiom, kiom mi volus? Ĉu tial, ĉar mi estas Mileta?

—Ĉu vi ne loĝas en Ateno? Ĉu vi ne faris el ĝi vian patrujon per via beleco, kiun vi dediĉas al mi, ĝia plej amanta filo? Do vi estas Atena, tiom kiom la naskiĝintaj en la Akropolo. Vidu kiom mi vin amas, ke al mi mankas tempo por vin ami. Ja mi volas fari el Ateno la plej bonan el la patrujoj. Vi proponis vian gracion en servo al miaj revoj pri pligrandigo de Ateno. Mi imagis ĝin en ĝiaj vastaj linioj; vi vidis ĝiajn detalojn; kaj tiel ni kompletigis unu la alian. Via delikateco estis la komplemento de mia firmeco; via gracio, la komplemento de mia energio.

En tiu momento, superbela intelekta ligilo kunigis tiujn du korojn en idilio unika tra la historio.

—Vi perdis vian vivon apud mi—sopiris Periklo—. Kreita por la amo, vi nur trovis apud mi fortan kaj senĉesan lukton. Via beleco meritis pli altan destinton.

—Kaj kia destino estas pli alta ol esti amata de tiu, kies persono bildprezentas la liberecon kaj grandecon de la unua el la Patrujoj konataj? Ĉe vi mi trovis la gloron—respondis Aspazio—. Kunigita al vi, la historio neniam povos forgesi min, ĉar via nomo lumigos la plej grandan jarcenton de Ateno. Mi devas morti kiam vi maljuniĝos; kiam la maljuneco antaŭludos en mia vizaĝo la unuan sulkon, kiam la pura harmonio de mia korpo deformiĝos, mi finos la tagojn de tiu nedaŭra ekzisto, kiun, kiel la rozo, havas la virino. Vi ne: vi estas duondio; vi jam en vivo estas senmorta.

Ĉe tio sklavo revenis kun lanterno de vitroj rubenkoloraj, kiun li lasis sur tablon, dirante: —Li jam estas avizita. —Kaj li retiriĝis.

—Mi petis Anaksagoron, ke li venu—daŭrigis Periklo parolante al Aspazio—. Mi volas peti lin, ke li foriĝu de la Atiko.

Mi scias ke oni volas lin kondamni, kaj mi volas eviti al Ateno la honton de tia kondamno.

—Mi volus ke viaj malamikoj povu aŭskulti viajn vortojn—diris Aspazio—. Vi amas la gloron de Ateno pli ol la vian, kaj mi devus esti ĵaluza je tiel forta konkurantino.

—ĵaluza je mia patrino?

—Ateno ne estas al vi patrino: ĝi estas amatino en kiun vi estas enamiginta. Vi vestis ŝin per mirindaj roboj; vi ornamas ŝin per juveloj de nekalkulebla valoro; vi suferas, nur pensante ke iu povos diri ke ŝi ne estas la plej bela, la plej forta kaj la plej nobla: vi estas freneze enamiginta je ŝi. Kaj vi volas ke ŝiaj agoj estu justaj kaj neriproĉeblaj, kiel la formoj de la diino kiu en la Parthenono reprezentas ŝin.

Ĉe tio supreniris al la granda salono Fidio sekvata de Anaksagoro. La suno, en sia subiro, prezentadis ĉielon el polurita bronzo.

Fidio, aŭdante la vortojn de Aspazio, respondis al ŝi, en defendo de Periklo:

—Jes! de la diino kiu reprezentas ŝin, kaj kiu estis konsekrata de Zeŭso per fulmo kiam mi demandis ĉu ŝi plaĉas al li, kaj por kiu Periklo vestis kaj prezentis vin al mi kiel modelon, Aspazio. Maldanka vi estas, kaj tre maldanka, esti ĵaluza je via propra bildo!

—Ĉu vi volas ke mi forkuru, Periklo?—diris al li, enirante, Anaksagoro—. De kiam la fugo apartenas al la hieratikaj agoj? Ĉu vi ordonas min, ke mi forlasu Atenon? Ĉu vi volas ke mi faru agon ne indan je filozofo?

—Ne: mi neniam ordonas, nobla majstro: mi ne estas iu tirano, nek iu satrapo. Mi petas de vi tion por via bono, por la bono de Ateno: la popolo timas dian venĝon pro tio ke vi diris, en la ĝardenoj de Akademos, ke la dioj mortos.

—Mi nur ripetis la vortojn de Skilo, kiujn li dirigis de Prometeo, jam katenita... Vi pravas, Periklo: mi iros for, tre for, ĉar la devo de semanto estas disĵeti la semon de la ideoj ĉien, kaj por tio mi volas elekti liberan lokon, kie mi ne ekscitu enviojn. Ĉu povas esti Lampsakos?

—Malsupre, antaŭ ol vi foriros, sklavo donos al vi kvin talantojn por ke vi povu vojiri ne petante almozon—diris al li Periklo—. Kara majstro, la dioj gvidu vin.

—Malbone ili povas gvidi min, kiam pro ili mi devas forlasi la Patrujon.

—Via semo ne ĝermis ankoraŭ, nobla Anaksagoro. Via devo estas daŭrigi la sanktegan geston de la semanto.

—Periklo estas prava! diris Sofoklo, kiu estis enirinta.—Kaj, kvankam neniu pli ol mi riproĉas viajn teoriojn nereligiajn, mi admiras vian scion kaj viajn klopodojn por disvastigi la senfinan kampon de la Fiziko, kaj mi admiras la altan honestecon de via intelekto, kiu eĉ antaŭ la morto ne cedas.

—Via foresto estos mallonga!—diris al li Periklo, brakpre-
minte lin—. Nia laŭhereda malamiko volas la militon, kaj ni ven-
kos la Lacedemonojn, mi ne dubas! Poste vi povos reveni.

—Iliaj soldatoj estas prudentaj kaj kuraĝaj—kontraŭdiris So-
foklo.

—Tro prudentaj—respondis Aspazio—. Tiom, ke ili alvenis al
la batalo kun unu tago da prokrasto, kiam jam la Atenanoj estis
venkintaj la barbarojn.

—Pro tio ke ili estas religiaj, kaj tial superstiĉaj—aldonis
Anaksagoro—, unu el iliaj leĝoj malpermesas al ili batali en fes-
totago, ankaŭ komenci militiron antaŭ la plenluno.

Kaj li daŭrigis:

—Vi pravas, Periklo: mi devas foriri. Ĉie la obskurantismo
plenigas la mondon de ombroj. La homo bezonas novajn kredojn
el kiuj eliru novaj idealoj. La dioj de Grekujo estas jam kadu-
kaj: mi devas alpreni la superegan agon de la lumiganto levanta
sian torĉon por antaŭeniradi tra la nokto kaj reirigi rapide la
mallumajojn al la haoso!

Milda emocio regis la ĉeestantojn en la momento de la firo
de l' filozofo. Periklo denove ĉirkaŭpremis lin forte; Aspazio far-
is al li du kisojn ĉe la vangoj, kaj la aliaj akompanis lin ĝis la
vojo al la Beocia landlimo.

Periklo restis kvazaŭ alnajlita al la planko, apud tie kien lia
sklavo lasis la lanternon, disjetantan sian rozkoloran lumon tra
la ĉambro. La suno jam estis subirinta. La plena luno levigadis.
Aspazio ĉirkaŭpremis lin, kaj, malantaŭ brodita kaj larĝa kurteno
dividanta la ĉambron, sur grandaj kusenoj kaj riĉaj tapiŝoj milit-
prenitaj el ŝipoj Feniciaj kaj Medaj antaŭ longe en Salamina, ili
revadis: je la gloro de Periklo, ŝi; li, je la gloro de Ateno!

Kaj la nokto kovris ilin per ombroj.

Kaj la legendo rakontas, ke, en sonĝoj, li diris kelkajn vortojn,
kiujn li estis aŭdinta de sia majstro.

“La virinon Naturo difinis por pludaŭrigi la rason de la Pa-
trujo: ju pli supera ŝi estos, des malpli ŝi klopodos havi propran
personecon. Ŝi devas esti la komplemento de la supera viro kiun
ŝi amas. Ankoraŭ pli: ŝian noblecon, ŝian virtecon konsistigas
esti patrino. Nur tio faras ŝin sanktega: ne io alia.”

Kaj poste Periklo daŭrigis sian revadon je la gloro de Ateno,
dum Aspazio revadis je la gloro de Periklo.

MAGÍ MORERA I GALÍCIA

(1853)

Magí Morera i Galícia naskiĝis en Lleyda. Li publikigis unu
solan libron de poemoj, kaj nur per ĝi li sin montris alta poeto.
Maragall diris ke lia karakteriza trajto estas la sereneco. Efektive
oni konstatas tion ĉiupaŝe, legante lian verkon “Lumaj horoj”.
Se Morera i Galícia, kiel originala poeto, donis al ni nur unu li-
bron, li efektivigis grandan laboron kiel tradukinto. Li tradukis
el la lingvoj angla kaj itala, precipe el la unua: li estas amanto
kaj disvastiganto en Katalunujo de la senkompara verko de Sha-
kespeare. Li majstre tradukis en sonoraj versoj kelkajn Sekspi-
rajn verkojn: el tiuj tradukoj estas aparte rimarkindaj la dramo
“Hamleto”, la poemo “Venus kaj Adonis” kaj la “Sonetoj”.

Magí Morera i Galícia montriĝis multfoje kiel bela parola-
disto, ĉe la Floraj Ludoj kaj ĉe aliaj literaturaj okazadoj. Li estis
Parlamenta deputito por la Barcelona ĉefurbo. Okaze de la VI^a
Kataluna Esperantista Kongreso en Vilanova i Geltrú, en 1915,
li ĉeestis la esperantajn Florajn Ludojn kaj aŭdis la premiitan
tradukon de lia poemo “La sunhorloĝo”. Lia nevino estis Reĝino
de la Festo. Poste, ĉe la Festeno, la eminenta poeto kataluna sa-
lutis la esperantistojn per kuraĝigaj vortoj plenaj de admiro al
la genia verko de Zamenhof kaj emociite proponis sin kiel sim-
patianton al nia kara idealo.

Bibliografio: Hores lliminoses (poemoj).—Tradukoj el Sha-
kespeare: Hamlet; Coriolà; Romeu i Julieta; El marxant de Ve-
nècia; Venus i Adonis; Sonets. Tradukoj el Dante: kelkaj so-
netoj.

SARKISTINOJ

Ilin pasi mi vidis: tiel same
ĉe tagiĝo birdar' kun ĉarma trilo;
de ilia la ĝoj' pro mild-ekbrilo
al mi restis l' anim' ravita ame.

Papavoj sur la kap' kaj Brust' orname;
en brakoj, floro-herba garbsimilo;
en iliaj vizaĝo kaj pupilo
feliĉo de juneco brilis flamo.

Preterpasis kun kant' !... Vesper' finiĝis...
 Disfumiĝe tre for, al mi vidiĝis
 kun juneco kaj ĝoj', kun ĉarm' senpara...

kvazaŭ per lum' krepuska, sarkistinoj
 estus, ĉizitaj sur marmor' malklara,
 la friso de palaco de feinoj.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LA SUNHORLOGO

La horoj mallumhavaj,
 la horoj malserenaj
 estas nur por la Hom' ; por vi, gracio
 de l' tago kaj de l' horoj sunoplenaj,
 de la horoj triumfaj, lumeravaj,
 kiam estas ĝojante Poezio.

La ŝton', kie vi kantas, pro sufero
 je temp' bruniĝis, kiu daŭre agas
 per pluv' kaj ventvetero,
 per rosoj de tagiĝo kaj vespero.
 Eĉ vidi, mi imagas,
 ke svarmas sur neglata la tabulo
 karesa brulardec', ruĝaĵoj ĉarmaj
 de parfum' kaj elspiroj flame varmaj,
 de frotoj de flugil' kaj de nebulo,
 de ĉio dum vivado vin kisanta
 kaj konsumanta vin!... Kaj kiam restas
 vi muta sub la nub' sur frunt' ombranta,
 vi min similas,—kaj vi homa estas.

Vi min similas! Kiasas
 mi vin per la rigard' !... Malhel' ĉagrena
 en via lum' ekzistas...
 Sed en vi restas superec' serena
 de l' animo hardita,
 noblajojn dezirema,
 vivanta ĉe ventar' per vivo plena
 en plejsankteĵ' ŝlosite, malŝatema
 je hor' senfortigita,
 je hor' kiu ne kantas, lumetrema,
 per fajra lang', pro kiu viv' bruliĝas!...
 Kaj vi tiam triumfas!... Kaj altiĝas
 tiam kiel simbol' !... Montrilo via
 eliĝas el la ombr' kaj signon metas

sur horojn ordongeste, rektlinia...
 kaj flamas, kaj ardiĝas, kaj ridetas
 vi kontraŭ sun', dum kantas via fero
 vorton plenan de lum', de grand', de vero
 per parolo fekunde poezia.

El via ruĝ' brulanta,
 el viaj verdo kaj nigrec' malklaraj,
 ekbrilojn ĉerpas sun' de gemoj karaj
 fanditaj pro la varm' de kis' flamanta.
 Kaj vi tiel la horon glore diras
 indan esti kantata!...
 je kiu nokt' sopiras,

kiun volas spirit' : la hor' revata
 kiel esprimo vibra, perceptebla,
 de la horo benata, kiam skuas
 suno vivon de Hom' kaj lin instruas
 belparoli pri Ĉio Nedirebla...

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

MIQUEL COSTA I LLOBERA

(1854-1922)

La Balearaj Insuloj, kun siaj ravaj marbordoj kaj mirindaj kavoj, kun sia bela lumo kaj trankvila paco, kun sia situacio ĉe la mezo de la Mediteranea Maro, estas lando de klasika beleco. La nacia kataluna poeto Verdagner, en sia poemo "Atlantido", genie kantis la Balearajn Insulojn, kies ĉefa, Mallorca, prave havas la alnomon "Orita Insulo".

Ne mirige estas, ke la katalunaj poetoj de Mallorca reflektis en sia poezio, eble pli ankoraŭ ol la katalunaj aŭtoroj de la kontinento, la lumon de la eterna beleco. Oni memoru nur la nomojn de Miquel S. Oliver, aristokrato de la poezio, kiu prikantis la restadon en Mallorca de George Sand, la amantino de la franca Alfred de Musset kaj de la pola Chopin, la du plej grandaj romantikuloj en poezio kaj en muziko; de Joan Alcover, tre muzikplena, aŭtoro de "Bibliaj Poemoj" kaj de fama versaĵo dediĉata, kun imito de lia stilo, al la koloso de la moderna hispana liriko, la amerika poeto Rubén Darío; de Llorenç Ribera, bonega originala poeto kaj aŭtoro de majstra kataluna traduko de la "Eneido" de Virgilio; de la delikata poetino Maria Antònia Salvà, tradukintino de la provenca "Mireio" de Mistral.

Sed, super ili ĉiuj, superstaras la hela figuro de Miquel Costa i Llobera, poeto plej eleganta kaj emociplena, samtempe klasika kaj romantika, pratipo de la poetoj kiuj zorge harmoniigas la formon kun la enhavo, fidela disciplo de grekoj kaj latinoj, ĉefa reprezentanto en la moderna kataluna literaturo de la skolo kiu preferas atentis pri la "parolo bela", en antitezo al la "parolo viva".

En sia poemo "La deixa del geni grec", bazita sur la Herodota aserto ke Homero, iam nomita Melesigeno, marveturis en sia juneco de Smirna ĝis la marbordoj de Hesperio, la poeto Costa i Llobera disvolvas belegan argumenton. Homero elŝipiĝis en Mallorca; iu tribo el Artà kondamnis lin esti donata viva al la Dio de la kaverno; sed la pastrino Nureduna, simbolo de la sanktega fajro de la raso, savis lin el la morto; kaj la liro de Melesigeno restis forlasita kaj kaŝita en la kavo de Artà. Laŭ tia legendo, la greka genio vivadas ankoraŭ en la Mallorca insulo.

Vere, kun iom de la Homera inspiro vibras la ora liro de Miquel Costa i Llobera. Li, en la dudekjara aĝo, jam verkis tian definitivan pecon, kia estas "La Pino en Formentor". Lia serio de "Horacianaj", tute sola, farus la famon de granda poeto. Li verkis grandan nombron da perfektaj versaĵoj, el kiuj distingigis kiel helaj brilantoj "La blua gorgo" kaj "Plaĉa marbordo" (El gorg

blau, Cala gentil). Pri la poeziaĵo "La blua gorgo" oni ja povas diri ke ĝi estas unika. En siaj kvin libroj de poemoj, la poeto pritraktis diversajn temojn: amajn elegiojn, naturajn belaĵojn, popolajn tradiciojn, legendojn kaj morojn, religiajn kantojn, k. a. Li tradukis el la lingvoj latina kaj itala, prefere pecojn de Horacio kaj Dante. Liaj tradukitaj pecoj el Dante Alighieri estas juvelo. (Krom kelkaj fragmentoj de la "Paradizo" tradukitaj de Costa i Llobera, ekzistas en kataluna lingvo tri plenaj tradukoj en verso de la "Divina Commedia": du modernaj kaj unu farita de samtempulo de Dante).

Miquel Costa i Llobera naskiĝis en Pollensa de Mallorca, la jaron 1854. Li komencis studi Jurosciencon en la Barcelona Universitato, sed li ne finis siajn studojn. Post kelkaj jaroj da loĝado en sia naskiĝloko, kiam li estis 31-jara, li veturis Romon kaj tie eniris en la Gregorianan Universitaton. Kvin jarojn poste, li estis pastro. Li revenis en sian patran hejmon de Pollensa, por praktiki sian mision. En la unuaj du jaroj li faris cent sep predikojn. Post kelkaj jaroj li transloĝiĝis al Palma de Mallorca, de kies Katedralo li iĝis kanoniko, laŭ Papa elekto. Dum sia vivo, li faris multajn vojaĝojn tra Eŭropo, Azio kaj Afriko, kaj vigle partoprenis la katalunan movadon por restarigo de la lingvo kaj literaturo. La 15an de Oktobro 1922, okaze de la festo de la Sanktulino Terezo, Miquel Costa i Llobera supreniris la katedralon kaj komencis prediki, prenante kiel temon la versiklon: "Ego dilecto meo, et dilectus meus mihi, qui pascitur inter lilia". Kiam li rakontadis, ke la Sanktulino "sentante sin profunde kortuŝata antaŭ bildo de Kristo ligita al kolono, falis je liaj piedoj"... la predikanto ĉesis paroli kaj subite falis. Li estis mortinta!

Tia eksterordinara morto estis simila al la eksterordinara vivo kaj ecoj de la granda poeto. Lia spirito tamen ne mortis por ni, ĉar en liaj verkoj ni povas senti ĝin ankoraŭ vivi.

Pri la ora liro de Miquel Costa i Llobera atestas, solaj, la sekvantaj versaĵoj.

Bibliografio: De l'agre de la terra, poemoj (1897); Tradicions i fantasies, poemoj (1902); Horacianes, poemoj (1906); Visions de Palestina, poemoj (1906); Plena verkaro (1924). Tradukoj el Horacio, Dante Alighieri kaj aliaj.

SEKECO

En senfruktej' naskita blanka floro,
vivanta ĉe soleco senkompata,
kiu sen kant' de iu voĉ' amata
malfermas la kalikon dum aŭroro;

kompatinda floret' ! kiam de l' ploro
de la roso vi estas plenkovrata,
vi ŝajnas, kun rideto delikata,
revi pri tago de amĝoj' kaj gloro.

Vi esperu, floret', pri belvetero;
eĉ se estos l' esper' nur iluzia,
en vi estu pri amo rev-espero.

Estas ankaŭ en mi revo pasia;
vian vivon similas pro sufero,
floret' sen ia am', la vivo mia!

LA FEINOJ

Malfrunokte, kiam steloj
per malfiksa, brila trem'
ŝajnas diri pri mirbeloj
de sorĉoj aŭ de timem',
kun maljunulo zorganta
je ŝafaro sin paŝtanta,
junul' en mallum' restanta
parolas pri jena tem'.

—Ĉu vi ne aŭdis je fojo
perditajn en malproksim'
dolĉajn kantadojn de ĝojo,
de senkompara esprim' ?
Ĉu vi ne miris avide,
kvazaŭ en sonĝo senvide,
pro revaĵ', kiu rapide
traflugis spacon sen lim' ?—

—Ja mi scias pri l' demando.—
—Parolu do pri l' afer' !—
—Mi scias, ke fein-bando
iras en ombro sub ter'

neniam de sun' vidite,
al mallumo kondamnite
de kiam en mond' subite
ekstariĝis Kruco-Ver'.

Ĉe akvbordoj aŭ arbaroj,
apud lagoj aŭ torent',
ili ĝuis per fuŝfaroj
en tre antikva moment'.
Ĉiu loĝadis en kavo,
plektante florojn de ravo:
allogon por fari sklavo
kaptiton de ŝia tent'.

En tiu tempo parolis
birdoj, arboj, vent', lagun',
ĉar ili sorĉe petolis
tra ĉiu lok' en komun' ;
ĝis ne atendita tago,
kiam el bordoj de lago
forkuris en erarvago
dispelitaj de la sun'.

Tra abismoj kaj kavajoj
ilin glutis ter' en sin,
kaj per novaj mirindaĵoj
ili belflorigis ĝin.
En la malluma karcero
faris domojn de mistero,
banoĉambrojn de himero,
kiajn ne havas Reĝin'.

La kavoj kun degutejoj,
admiro, kaŭzo de ĝu',
estas sole enirejoj
al la mirinda konstru'.
Tie loĝas silenteme
la feinoj kaj ploreme
ŝpinadas, dum ilin treme
lumigas nur okulblu'.

Same kiel noktaj bestoj,
ili ne vidas ĉe lum',
kaj havas sur ter' por festoj
noktojn de densa mallum' ;

tiam eliras el rokoj
kaj flugadas super lokoj,
kie de amaj epokoj
flosas ankoraŭ parfum'.

Ve, al solul' en vojiro!
Ve, al perdita vagant',
kiu sekvas en deliro
trilojn de ilia kant' !
Povon sin gvidi perdinte,
en kavernon erarinte,
sen helpo tie mortinte,
li fariĝos ŝtona plant' !—

Malfrunokte, kiam steloj
per malfiksa, brila trem'
ŝajnas diri pri mirbeloj
de sorĉoj aŭ de timem',
apud ŝafar' sin paŝtanta,
kun paŝtisto ĝin zorganta
junul' en mallum' restanta
parolis pri tiu tem'.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

EN SINJORA ĜARDENO

Al mi plaĉas promeni tra ĝarden',
dum kreskas arboombroj pro l' tagfino,
vidante, sub branĉaroj en sinklino,
horizonton en luma bluseren' ;

vidante montojn en konfuza ĉen',
kaj, en l' or-polvo de la lum-deklino,
la oritan belecon de ruino
sur la tre vasta ĝis la mar' eben'...

Al mi plaĉas l' ornamoj el marmor'
ĉe l' lageto, sur kies akvo pura
naĝas cignoj kun plum' de helkolor' ;

kaj al mi plaĉas la konsol' plezura,
kiun trioble donas al la kor'
bel' arta, historia kaj natura.

LA PAŝTISTINETO

Aspektis la knabino,
zorgata kun atent',
valora perl' garnita
per oro kaj arĝent'.

Ŝi, blanka kiel perlo
kaj blonda kvazaŭ or',
burĝon' el alta branĉo,
de kie estis flor' ?

Ho ve! ke nun ŝi havas
la teron por kusen',
post kiam patro iris
militon, sen reven'.

Duonpatrin' malbona
ŝafpaŝti igas ŝin:
ŝi paŝtas la ŝafidojn
kun ŝafa mol-inklin'.

Ŝi ekster la vilaĝon
la ŝafojn pelas for;
dum ŝpinas ŝi, per kantoj
ĝojiĝas ŝia kor'.

Ĉe l' gaja sunleviĝo
jam kantas ŝi en val' :
je ŝia voĉo sentas
envion najtingal'.

Ŝin aŭdis ja la grafo,
ŝin aŭdis la nobel'
ĉagrene nedormanta
interne de l' kastel'.

—Kia kanzono nova
hodiaŭ ravas min?

—Ĉi-tie trapasante
ĝin kantas paŝtistin'.

—Vi iru, do, ŝin peti
kantadi antaŭ mi.—
Post tio, tuj paĝio
direktas sin al ŝi.

—Ĉu vi, la paŝtistino,
min sekvus al Kastel' ?

—Mi kion faros tie,
vestita kun malbel' ?

—Ne gravas, paŝtistino,
vest' luksa aŭ ĉifon' :
vi grafon kontentigos
per nur via kanzon'.—

Timeme ŝi eniras,
konfuza la vizaĝ'...
La grafo ŝin invitas,
ŝi restas sen kuraĝ'.

—Se vi, la paŝtistino,
kantadus nun por mi,
vi tiun ringon havus,
el oro, por premi'.

—Sinjor', por mi ne estas
pri via ring' neces'...
Mi iru paŝti ŝafojn
denove, kun permes'.

—Al vi, se vi kantados,
donacos veston mi.

—Eĉ plena de flikaĵoj,
sufiĉas tiu-ĉi.

—Por mia viv', nu, kantu:
ne estos ia don'.

—Sinjoro, vi min aŭdis:
jen nun mia kanzon'.—

Ŝi kantis: ŝin aŭskultis
eĉ l' arbara popol',
kaj venis sur balkonon
kardelo kaj pirol'.

Kiele ŝin aŭskultis
la ĉagrenita graf' !
Ĉagren' de li foriris
kaj venis dolĉa rav'.

Je ŝia kant' unua,
sur ŝin jam falis flor' ;
je ŝia kanto tria,
de l' graf' flugis la kor'.

—Ho vi, paŝtistineto,
komplezi volu min:
akceptu... mian manon,
vi estos la grafin' !—

PLAĈA MARBORDO

Sur la rubandon de blanka sablo,
kiun kisadas la akvo-blū',
grandaj pinarboj verŝas abunde
balzamodoron, serenon ombron,
kun milda bru'...

Ho dolĉa loko de trankvila ĝu' !

Ĉi-tie estas la lum' pli klara,
ĉiuj koloroj—kun pli da hel' ;
tie regadas purega ĝuo,
kaj ĉiam brilas en sun' aŭ luno
Ho de l' ĝoj' mia superbela cel' !
radia bel'...

Tie, ĉe l' branĉoj de bosk' proksima,
eterne vivas la verda svarm' ;
de tiuj riĉaj densaj branĉaroj
neniam skuas la foliaron
vintra malvarm'...

Ho Paradizo kun eterna ĉarm' !

Se proksimiĝas malluma tago
kun de nubaroj nigra tavolo',
tien nur venas melankolio,
kvazaŭ ĉagreno de virgulino,
dolor-peto!...

Ho rifuĝejo por anim-konsol' !

Mi volus tie starigi neston
kun junaj revoj pri dolĉa sort' ;
poste la tombon mi tie revis,
kie pli dolĉa ripozo venus
por mia korp'...

Revata lok' por vivo kaj por mort' !

Dolĉe, en tiu loko trankvila,
kun tiu ritma mara murmur',
apud la akvo de puraj briloj,
estas rigardi, senti kaj vivi,
aŭ dormi nur...

Sed ne estas por mi tia plezur'.

Tamen, sufiĉe tiun marbordon
estos ĝuinta mi dum moment',
kiam deklinas suno radia,
kaj ekfandiĝas la kor' en ĝia
dia seren'...

Dolĉa moment', ekĝuo de etern' !

LA PINO EN FORMENTOR'

Kor' mia amas arbon! Ol kverko, pli fortika;
ol olivuj', pli aĝa; kun verd' de oranĝarb'—
folioj ĝiaj velkas neniam; senefika
al ĝi, giganto, estas atak' de l' malamika
ventego de la mar'.

Ne montras ĉe l' folioj sin floro enamita,
al ĝi kisadi ombron ne iras fontoflu';
sed Di' arome ŝmiris la kapon konsekrita
kaj faris al ĝi tronon sur mont' abrupt-rompita
kaj fonton ĉe marblu'.

Kiame for sur ondoj revivas lumo dia,
ĉe l' branĉoj ne resonas de birdoj pepmurmur':
de gipaet' aŭdiĝas la krio energia
kaj flugilegojn svingas super amas' folia
fluganta la vultur'.

Ĝi vivon ne subtenas per ŝlimo de la tero:
tordiĝas ĝia forta radik' sur roka ŝel';
ĝin nutras rosoj, pluvoj, lum' arda, ventvetero...
kiel profet' ĝi havas por ĉefa vivlivero
la amon de ĉiel'.

Belega arb'! Genion ĝi bildprezenti pravas:
pro montojn superstara, pro al spaceg' aspir':
se ter' al ĝi—malmola, ĉiel', kiu ĝin ravas,
branĉaron ĝian kisas, kaj ĝi la ŝtormon havas
por glori kaj por deziri'.

Ho ja!... ke kiam siblas kun furioz' ventaroj
kaj ŝaŭmen ŝajnas fali de l' arb' la roko-seĝ',
ĝi tiam ridas, kantas, pli laŭte ol ondaroj,
kaj finvenkinte ŝkuas supere de nubaroj
hararon kvazaŭ reĝ'.

Mi vin envias, arbo! Sur tero la malpura
kiel sanktaĵo gvidos min via rememor';
konstante lukti, venki, sur alt' reĝi lazura,
sin nutri kaj vivadi ĉiele, per lum' pura...
ho viv'! ho nobla sort'!

Animo forta, supren! Transflugu tra nubaro,
sur alt' enradikiĝu laŭ l' arb' en roka grund':
sub plandoj viaj falos de mond' kolera maro,
kaj viaj kantoj iros trankvile tra ventaro
samkiel la hirund'.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

KIAL?

Kial havas pli da ĉarm'
la burĝon', ol plena flor'?
Kial plaĉas al la kor'
tiom vorto de infan'?

Kial plaĉas pli tagiĝ'
ol tagmezo tute hela?
Kial ĉio estas bela
pleje, ĵus post la naskiĝ'?

Burĝon', tagiĝo, espero...
—plejaj bonoj por la kor'!
ĉar, sen fino, flugas for
baldaŭ ĝojoj sur la tero.

ADIAŬO

(Vidu ĉe la fino de la "Antologio")

JOAN ALCOVER

(1854)

Joan Alcover naskiĝis en Palma de Mallorca (Balearaj Insuloj). Li studis Jurosciencon en la Barcelona Universitato. Poste li reiris en sian urbon, kie li agis kiel advokato kaj deputito Provinca kaj Parlamenta. Malfrue li aperis en la kataluna poezio, sed baldaŭ lia nomo fariĝis tre konata. Nun li estas akceptata de ĉiuj kiel unu el la plej bonaj katalunaj poetoj. Li havas klasikan guston kaj produktis kelkajn perfektajn juvelojn. Li verkis ankaŭ tre interesajn literaturajn studojn.

Bibliografio: Cap al tard, poemoj (1909); Poemes bíblicas (1918); Poesies, plena poemaro (1920); Art i Literatura, prozo.

LA ERMITO ALMOZPETANTA

Mi estas gasto de la alt' ; mi iras
de dom' al dom' almozojn ekpetante,
tra tuta la kampar', kien la ejoj
de l' ermiteja sonoril' atingas.
Mia pied' postsignon ĉie lasas;
mi konas la bienojn kaj kabanajn,
vilaĝojn kaj najbarojn, kaj mi scias
pri iliaj feliĉoj kaj ĉagrenoj.
El l' ermiteja alt' tial mi vidas
ion de l' traŭrantoj nevidatan,
la traŭrantoj sen atent' paŝantaj
sur la ĉirkaŭa ter'.

Se la rigardon
vastigi tra la montaj horizontoj
vi volas, antaŭ via supreniro
traŭru malrapide la kamparon
kiun vi vidos el montpint' ; vi haltu
ĉe la val', ĉe l' arbar' ; minejon vidu,
salutu la homnestojn; volu koni
ĉu tie tritik' estas aŭ hordeo,
kaj tiel, ĉiun ajon esplorante,
pretigu vin al paca rigardado.

Ne pro tio foriĝos la mistero
en la fundo de ĉio troviĝanta;
se progresas helec', ombro foriras,
ju pli foriras ĝi, des pli imponas.

Nokto plena de steloj, por saĝulo
konanta ilin, estas malpli dia
ol por tiu vidanta nur, ĉiele,
ian aron da signoj nekonataj?
Antaŭe, tra la nokta dissemiĝo
de hejmlumoj la monton ĉirkaŭantaj,
kvazaŭ ĉiel' kuŝanta sur la tero,
gilitadis la rigard' indiferece;
ĉiu lumo nun estas nomo, hejmo
kie mi sidis por ripoz' ĉe l' ombro
aŭ por varmigi la malvarmajn manojn
ĉe fuma kuirej' ; kie mi ĝuis
favorojn de piec' aŭ la dolĉecon
esti humila ĉe la porda sojlo.
Sub tiuj horizontoj, pli intimajn
divenas la spirit' ; kaj tiel, ĝue
pri pleneco de l' vido, plenpenetras
la rigard', kiel akvo en la spongon,
en l' esprimon profundan de l' naturo.

APEL'LES MESTRES

(1854)

Apelles Mestres estas naskiĝinta en Barcelona. Li estas poeto, prozisto, dramisto, desegnisto, komponisto. Siajn proprajn verkojn li jen ilustris, jen muzikis. Milojn da elegantaj ilustraĵoj li aperigis sur libroj, revuoj kaj ĵurnaloj, enlandaj kaj eksterlandaj. Sesdek originalajn volumojn li publikigis. El tiuj sesdek verkoj, dudek-du estas teatraĵoj, kelkaj muzikitaj ĉu de la propra aŭtoro ĉu de la katalunaj komponistoj Morera, Granados, Vives kaj Borràs de Palau. Lia "Nit de Reis" estis ludata 150 fojojn sinsekvajn. Lia verko "La Sirena" atingis pli ol 1000 prezentadojn sur ĉiuj katalunaj scenejoj.

Neeble estas priskribi la agemecon de Apelles Mestres, unu el la plej popularaj, kun simpatio rigardataj figuroj. Kiel ĉiuj liaj samtempuloj, ankaŭ li partoprenis sukcese la Florajn Ludojn. En siaj poemoj li montras universaleman spiriton. Li uzis multajn versformojn. Ofte li kantis la maron, kaj kelkaj el liaj teatraĵoj konsistas el apudmaraj scenoj. La kritikistoj trovis ĉe li influon de fremdaj aŭtoroj. Verdire li tre ŝatis kelkajn el ili kaj eĉ pri-traktis foje temojn eksterlandajn. Liaj verkoj estas tradukitaj en la lingvojn hispanan, galician-portugalan, francan, italan, germanan, anglan kaj svedan. Nia eminenta verkisto montris sian simpatiecon al Esperanto kaj afable donis permeson pri traduko.

Bibliografio: Ĉefaj verkoj: Poezio: Margaridó; Liliana; Poesmes de mar; Idilnis; Balades; Abril. Prozo: La casa vella; La perera; Records i fantasies; L'espasa. Teatro: La Sirena; Nit de Reis; La barca; La Rosons; Picarol; La presó de Xauxa.

MARKANTO

En la martrankvilo, en la marsilent'
ĉio lum', viv', estas;
nek folio morta dancas kun la vent'
nek flor' velka restas.

Kiam mev' flugante tra la spac' sen fin'
en l' altaĵ' perdiĝas,
ampepante venas ĝia kunulin'
kaj tuj reforiĝas.

Pro la longa iro ne haltas sen pov'
ondo lacigita,
nek vespere venas ree ventet-blov',
de l' maten' pelita.

Kaj potenc-resona, en ĉiu moment',
la viv-himno estas...
Eĉ folion mortan trenas ne la vent',
nek flor' velka restas.

Trad. JOSEP VENTURA

MINUETO

(muziko de la aŭtoro)

I

Markizino, se estas vere
ke vi dancas kun granda sci',
mi vin petas ke vi bonvolu
minueton danci kun mi.
Ĉu vi aŭdas? de violono
al ni venas la melodi';
la salon' plenigas de paroj...
en ĝardenon tuj iru ni.
Tie havos l' aer' parfumojn
de rozfloro aŭ gardeni';
sub la arboj, en la lunlumo,
danc' pli logas ol tie-ĉi.

II

En ĝardeno, sur mola herbo,
glitos via piedo pli;
se vi timus gliti tro multe,
vin apogu tiam al mi.
Kion timi? ian ekfalon?
Pro ekfal' okazas neni';
se vi falos, ja dolĉe estos
brako mia kusen' por vi.
Tion sole povos ekvidi
ia rozo aŭ gardeni'...
Sed la floroj estas diskretaj
kaj nenion diros pri ĝi.

PREGO

Kantu, Najtingal', ĉar la tero floras;
kantu tra la monto, kantu tra la val';
la tero soifas je kantoj kaj suno.
Kantu, Najtingal'!

Kantas via ĝoj' plej malnovan kanton,
kiu la ĉielon alflugis sen fal',
kiun Dio vidis kaj ektrovis bela.
Kantu, Najtingal'!

Kantas via voĉ' la eternan kanton
vekintan la mondon al la ideal',
la plej superbelan kaj la plej vibrantan.
Kantu, Najtingal'!

Kantu kiel ĉiam, kaj eĉ pli ankoraŭ,
ĉar la mondon kovras funebra vual'.
Por la Bon' kaj Bel', por la Poezio,
Kantu, Najtingal'!

LA GRANDA ARBO

I

Proksime de la vojo staras altega arbo, kiu tute ŝajnas enigi
sian supraĵon en la bluan de la firmamento.

Apud la piedo de l' arbo pasis homo kiu, mire ĝin rigardinte,
ekkriis:

"Ĝi estas belega arbo!"

Kaj li daŭrigis sian interrompitan marŝadon.

Poste pasis dua trairanto kaj tiu-ĉi ankaŭ pensis ke la arbo estas
belega, sed ne malferminte la lipojn por tion diri, pasis ne haltinte.

Pli malfrue pasis tria marŝanto kaj tiu-ĉi eĉ ne atentigis pri la
estado de l' arbo.

II

Fine alvenis du frenezuloj. Unu el ili intencis grimpi ĝin; sed
apenaŭ li atingis la unuajn branĉojn falis teren kaj rompiĝis lia
kapo. Tiam oni vidis ke li havis nenion en ĝi.

Lia kunulo intencis same grimpi; sed, per pli da ruzo aŭ da
fortoj ol sia antaŭulo, sukcesis atingi la supraĵon kaj de tie li

povis atente rigardi la mondon — malgrandan, tre malgrandetan! —
kuŝantan sub liaj plandoj.

Kaj la mondo proklamis lin Geniulo.

III

Kaj daŭris pasante homoj kaj homoj kiuj, kiel tiu unua, haltis
momenton por admiri la Geniulon, kaj ekkriis:

"Eble la frenezulo kiu falis estis tia Geniulo kia tiu-ĉi... sed
la sorto ne favoris lin."

Tiuj-ĉi estis la *intelligentuloj*.

Kaj pasis pli multaj homoj kiaj la dua, kaj nek ion dirante nek
haltante, ili sin komplezis pensante:

"Eble tiu-ĉi kiu atingis la supraĵon estis tiel freneza kiel tiu
kiu falis... sed favoris lin la sorto."

Tiuj-ĉi estis la *saĝaj personoj*.

Kaj pasis pli multaj homoj—ho, multegaj pli!—, kiuj, kiel la
tria, daŭris en sia marŝado nenion pensinte eĉ nek suspektinte la
ekzistadon de la frenezulo, nek tiun de la Geniulo.

Kaj tiuj-ĉi estis la *grandega plimulto*, kiuj nomas sin mem *pres-
kaŭ ĉiuj*.— Kaj tiuj-ĉi estas kiuj faras kaj malfaras ĉar la tero
estas ilia.

Trad. ESTANISLAU PELLICER.

LA NAJTINGALO

I

Kiam la junaj najtingaloj estis lernintaj la *Kanton de Amo*,
ili disflugis tra la branĉaro de la salikaro kaj ĉiu ekkantis al sia
amatino — kiun ĉiu amis jam antaŭ ol koni.

Ĉiu ekkantis al sia amatino, krom Najtingalo kiu levis sian ka-
pon, fikse rigardis la ĉielon kaj pasigis la nokton ne kantante.

"Li ankoraŭ ne scias la *Kanton de Amo*" — la ceteraj najt-
galoj diris unu al la alia—. Kaj ili gaje kantadis miksan-
te al siaj mildaj arpegoj sarkasmajn notojn.

II

Li ja sciis la *Kanton de Amo!* sed ve, la malfeliĉa Najtingalo
estis vidinta supre, en la blua ĉielo, kie senfina nombro da steloj
vojiras, stelon, kiu palpebrume lin rigardis.

Si lin rigardis kaj malrapide, malrapide subiradis kaj malaperis antaŭ la matenheliĝo; kaj la malfeliĉa Najtingalo ŝin rigardis, ŝin rigardis ankaŭ fikse... kaj kiam la stelo estis subirinta, li restis absorbata kaj malgaja ĝis la proksima nokto.

Sed nokto alvenis, en kiu la Najtingalo ekkantis per mallaŭta voĉo — tre mallaŭta — al la stelo; kaj laŭtigante la voĉon tagon post tago, en la somermezo li kantis jam per laŭta voĉo tre laŭta: — li kantadis la tutan nokton ne flankigante la rigardon. Kaj de la ĉielo, palpebrume, la stelo ĉiam rigardis lin kaj ŝajne plezure lin aŭdis.

Kiam forpasis la sezono de l' amoj, la najtingaloj silentis kaj forlasadis la salikaron, jen unu, morgaŭ alia. La malfeliĉa Najtingalo, ĉiam senmova sur la plej alta branĉo, kantadis al la stelo.

III

Kaj pasis someroj post someroj, kaj la novaj amoj malaperigis la amojn malnovajn kaj la *Kanto de Amo* ĉiam renoviĝis kaj ĉiu najtingalo kantis al sia nova amatino... Sed la malfeliĉa Najtingalo ankoraŭ kantadis al la stelo.

Kaj en nokto, ne rimarkante ke ĉirkaŭ li jam nur kantas pli junaj voĉoj ol lia; en nokto, eĉ ne supozante ke liaj fratoj estas jam ĉiuj mortintaj; kun la rigardo ĉielen kaj kantante al la stelo, la Najtingalo falis mortinta de la supro de la plej alta branĉo.

Tiam la junaj najtingaloj — kiuj ĉiunokte kantas al siaj novaj amatinoj — ne plu kantis kaj ili lin kovris per salikaj folioj, dirante ke li estis la plej poeto el ĉiuj najtingaloj. Sed neniam sciis, ke li estas, kiu plej suferis el ĉiuj najtingaloj de la salikaro.

Trad. ESTANISLAU PELLICER.

RAMON CASELLAS

(1855-1910)

Ramon Casellas naskiĝis en Barcelona. Dum multaj jaroj li estis ĉef-redaktoro de la kataluna ĵurnalo "La Veu de Catalunya". Li estis tre inteligenta pri artaj aferoj kaj abunde verkis kiel artokritikisto en la ĵurnalo de li gvidata kaj en aliaj gazetoj. Li faris profundan studon de la kataluna pentrarto, kaj estis partiano de la impresionismo.

Kiel literaturisto, li lasis tri verkojn: unu romanon kaj du librojn de rakontoj. "Llibre d'Histories" kaj speciale "Les multituds", subtila psikologia studo pri la influo kaj sugestia forto de la popolamasoj, montras viglan stilon kaj riĉan, interesan enhavon. La romano "Dels sots feréstecs" (El la mallumaj krutaĵoj) estas ĉefverko. Ĝi krude priskribas la mizeron materialan kaj spiritan de la kamparanoj trenantaj sian vivon en la profundo de la "mallumaj krutaĵoj". Oni riproĉis al Ramon Casellas, cetere kiel al multaj aŭtoroj realistaj, la krudecon de liaj scenoj, la mallumajn tonojn de liaj pentraĵoj. Casellas, kune kun Víctor Català kaj iu alia aŭtoro, pensigis pri ia greftitaĵo en la katalunan literaturon de la speciala mistika nuanco de la animo slava. La profundaj sentoj kaj spiritaĵoj komplikaj troveblaj ĉe la romanoj kaj mallongaj prozaĵoj de Ramon Casellas kaj Víctor Català, kiuj iel reflektas la spiriton de iu Tolstoj, de iu Gorki, de iu Dostojevski, kontrastas kun la ĝenerale pli trankvila, pli luma karaktero de la kataluna literaturo. Ramon Casellas estis konsiderata de la germana kritikisto Otto Hauser, kiel unu el la plej grandaj prozistoj.

Bibliografio: Llibre d'Histories; Les multituds; Dels sots feréstecs.

(De tiu-ĉi romano aperis lastatempe luksa eldono ĉe "Societat Catalana d'Edicions", alia populara ĉe "La novella d'ara", mallongigo ĉe "Lectura Popular". La "Llibre d'Histories" estas ankaŭ laste reeldonita de "Editorial Catalana".)

MALSANGRO

Tiun matenon estis sonorinta kvarono de la kvina, kaj la stalisto ankoraŭ ne estis malferminta la pordojn de l' ĉevalejo. Sonoris la duono... ankoraŭ ne.

—Eble li endormiĝis, fripono... —grumblis kun furiozo la ĉaristoj.

—Diabla maljunulo!—diris unu.—Ĉu vi ne volas malfermi, je cent demonoj?

—Malsangro!—kriis alia, frapante al la pordoj per ŝtono.—Malfermu, fulmon de Dio!

Sed Malsangro ne respondis vorton, nek donis signojn de vivo.

Tiam unu el la junuloj grimpis tra la fenestro de l' pajlejo kaj post unu salto troviĝis en la ĉevalejo. Post momento malfermiĝis larĝe la pordoj de la stalo kaj eliris la junulo, kriante terurite:

Malsangro estas mortinta!

—Mortinta?

—Jes, mortinta... Ĉevalo hufobatis lin.

Ĉiuj ĉaristoj enrapidis internen, kaj tie, en angulo, sub erpilo, ili vidis Malsangron, sternitan, sur la sterko, malvarman, glacian, malpuran de pajleroj kaj makulitan de koagulita sango... Iom malproksime, kuŝis ĉevalo kun la ligoŝnuro pendanta ĝis sur la planko...

Ĉiu vidis tuj, kio okazis tie la nokton. Ĉevalo malligiĝis..., la stalisto volis religi ĝin... sed la besto piedbaraktis... per la unua frapo senkonsciigis lin, kaj poste, kvazaŭ ne sata, hufbatis ĝis lin senanimigis.

Ĉiuj ĉaristoj rigardadis la kadavron, enpensaj kaj teruritaj.

Fine, unu rompis la funebran silenton.

—Vi scias, kion mi diras? Ke... li ne povis mortiĝi alimaniere, la malbonulo...

—Fide al Dio, ja ne!—respondis alia.

—Ne multe, ke li, kiu mortigis la bestojn per turmentoj, mortis sub la hufoj de ĉevalo.

—Estas kvazaŭ revenĝe...

—Malbona fino...

—Nomu ĝin puno de l' infero...

Kaj tra la memoro de tiuj viroj pasadis rememoroj pri la teruraj martirsuferoj, kiujn la stalisto travivigis de la bestoj, kiel ekzekutisto sin amuzanta per la doloroj de l' viktimoj. Ja tiuj viroj estis se necese batemaj kaj eĉ sovaĝaj kaj senanimaj... sed, ne tiom, fulmo!—tiaj ne! kiel tiu sovaĝulo senkompata...

Pro bagatelo, jen vi havis lin, kun la vipo en la aero, —kvazaŭ pikita de vespo, kaj blasfemanta kiel malbona spirito. Kaj jen prenis ĉevalon kaj frapis sur ĝian nazon ĝis rompi al ĝi la krurojn. Aliajn fojojn li torturis ilin trankvile, kun malvarma sango, per krueleco de pacienca homo.

—Mi, —diris unu el la rondo —fojon vidis lin, kiam li metis al ĉevalino stangon en la orelon, pikante kaj suferigante ŝin...

—Mi, —rediris alia —unu tagon kaptis lin, dum li plenigas per sablo la okulojn al unu ĉevalo!

—Nu, do... forte!

—Nu, do... ke li kondamniĝu pro malbona animo!

—Li ne povis finiĝi alimaniere...

Sed tiam eliris el la rondo maljunulo kaj kun kompata mieno diris:

—Knaboj... eble vi ne dirus, kion vi diradas, se vi sciis la historion pri tiu viro. Eble, vi eĉ havus por li kompaton, se vi konus la malfeliĉojn, kiuj sur li pasis. Mi konis lin junan, bubon preskaŭ... Li ĵus eliris el la Sankta Domo... ĉar, malfeliĉa, li estis bastardo, estis senpatrulo... Li kreskis maldika, malsanema... kaj estante tiel obeema, tiel bona, ĉe l' najbararo de Poblet li kompatigis ĉiun... Pro kompato oni instruis lin gvidi ĉaron, tiam dum la konstruoj ĉe Bogatell!. La knabo refariĝis... revekiĝis... fariĝis matura viro... Post kelkaj jaroj, li eĉ enamigis de knabino el la "Camp de l'Arpa" kaj edziĝis kun ŝi. Tiu viro ne deziris pli grandan feliĉecon kaj opiniis sin pli feliĉa, ol reĝo... Kiam li vidis sian edzinon gravedan, li ne eltenis sian ĝojon. Mi memoras tion, kiel hieraŭan okazon... Tiam ni laboris ĉe la remparoj de Sankta Petro, kiujn oni disfaligas. Ŝi, plengraveda, venis ĉiun tagmezon porti al li la manĝon. Ili ambaŭ sidiĝis ĉe ombro de arbo, apud la ĉaro, kaj rigardadis sin mirefiksitaĵ, kvazaŭ neniam estus sin vidintaj. Sed... jen unu tagmezon, kiam plej senzorge ili rigardis unu la alian, la ĉevalo kiun li mastras, pikita de muŝoj aŭ ial ajn, levas la krurojn kaj svinge hufofrapas la virinon sur la mezo de l' ventro... La virino falis sternite, sen signoj de vivo... Ni ĉiuj alkuras, metas ŝin sur portilon kaj portas kurante hejmen...

—Kaj... ŝi mortis?—demandis la ĉaristoj.

—Mortis. Mortis ŝi... mortis la ido, kiun ŝi portas en la interno... kaj de tiam, ŝia edzo ŝajnis freneza... kaj rigardis ĉevalon, kvazaŭ li vidas la malbonan spiriton.

Ĉiuj ĉaristoj restis enpensige, rigardadante la kadavron de la stalisto.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LA HONTULINO

En tiuj ombraj valoj, eterne vualitaj de nebuloj de mistero, nenia okazo pli stranga ol tiu de Ursulino.

Virino matura ŝi estis kaj pli alta ol poplo... tamen neniam iu vidis ŝin manĝantan.

Ĉu tagmeze, ĉu vespere, kiam la servistoj de la farmodomo kolektiĝis ĉirkaŭ la fuma kameno, ŝi trovis la manieron forŝovi-ĝi. Ĉe la manĝohoro, ŝi prenis delikate sian telereton kaj maltra-

1. Akvofluo, kiun la urbo kovrigis per arkaĵo, sub strato.

pide elglitis al malhela angulo, sur la ŝtupojn de la korto aŭ al la pasejo de la sojlo, kvazaŭ ŝi intencus malbonagon. Ŝi profitis por forŝteliĝi la komencon de la manĝo, kiam ĉiuj geservistoj englutis dentobroge la unuajn kuleraĵojn. Sufiĉe okupitaj ili estis tiam, por atenti pri io alia... kaj ŝi tiam pasis silente kaj milde kiel nubopeco, irante fandiĝi en sia kaŝejo.

Tiel singarde ŝi foriĝis de ĉies rigardo, ke preskaŭ neniam iu rimarkis tion. Kaj se hazarde iu vidis ĝin, eĉ ne priatentis, pro kutimo. Oni parolis pri tio, kelkafoje, nur kiam ĉeestis ĵus dungita servisto, miranta pri la strangaĵo.

Iun vesperon, je la horo de l' manĝo, arbohakisto loĝanta de tre malmultaj tagoj en la farmodomo, demandis kun miro:

—Kial tiel agas, tiu virino?

—Tial ke ŝi hontas, ke oni vidu ŝin...

—Ke oni vidu ŝin manĝantan?...

—Jes...—oni respondis al li, ridetante.

—Nur ĝi estas tre stranga, tio-ĉi. Se tio estus antaŭ la gemastroj, kompreneble! Jen! mi neniel povis alktimiĝi, satmanĝi antaŭ ili... Mi ne scias kial... Sed ĝi kaŭzas al mi ian ĉagrenon, ian timon... Ŝajnas ke mi hontas, malkvietiĝas, kvazaŭ mi malrespektus ilin, ĝuante kiam ili ĝuas... Mi trovas ke ĝi estas signo de malspriteco, de maldiligento por servisto... Sed, ĉi-tie en la kuirrejo... ĉe ni, estas malsame... Ĉu ne?

—Tion scias plej bone klarigi la paŝtisto...—ekdiris knabino, per buŝo plena. —Li diros ĝin al vi, se li volas...

Kaj ĉiuj rigardoj de viroj kaj virinoj fiksiĝis sur la maljunulon, kiu ĝis tiam ne estis levinta la kapon nek malferminta la lipojn. Kvazaŭ li vekigis el malvigleco promedita, la paŝtisto levis sian kapon tute plenan de sulkoj, tute vestitan de blankaj haroj, kaj eldiris ĉi-tiujn vortojn:

—Mi pensas ke tio estas ia honto. Tion, kion Ursulino faras, mi jam vidis ĉe aliaj virinoj... Oni sin kaŝas por vesti kaj malvesti sin. Ni ne volas esti tiaj, kiel la bestetoj de Dio, montrantaj ĉe taga lumo la malvirtemojn kaj la ĝojojn de la karno. Manĝado estas por la mortuloj, korpa plezuro, kaj montri la plezuron estas honta afero... Tial ekzistas sanktaj animoj, kiuj tion kaŝas je la rigardo de similuloj... Se ili povus seniĝi je la buŝa plezuro... eble ili senigus sin je ĝi. Sed manĝado estas vivodono, kaj, ĉar naskiĝinta estaĵo ne povas seniĝi je ĝi, ili almenaŭ apartigas ĝin el la mondanaj okuloj kiel mizerajon. Ĉar homa mizerajo eble estas por Ursulino tio, kio estas ĝojo por la ceteraj, kaj, por ne ofendi ilin, ŝi celas enterigi en la solecon tiajn hontojn.

La servistoj de la farmodomo restis revemaj, kvazaŭ ili malfacile komprenis la vortojn de la paŝtisto.

Sed, fine, la knabino de la buŝo plena aldonis, viŝante siajn lipojn per la mandorso:

—Se vi scius, kiom ni suferis, kiam ŝi ekmalŝaniĝis antaŭ unu

jaro, vi certe mirus. La lito ŝajnis al ŝi tro komforta por ke ŝi ripozu, kaj nek pete nek riproĉe oni tie povis kuŝigi ŝin. Fine ni decidigis ŝin dirante ke la mastrino tion ordonis. Sed tiam venis la manio pri la manĝo, ĉar... manĝaĵon ŝi neniel volis. Tial ke ŝi ne povis nemanĝi antaŭ ni, ŝi diris ke ĝi ne plaĉas al ŝi... —Sed manĝu, nu!" —"Ne, ne..." Kaj ŝi metis sian kapon sub la kovrotukon. Fine ni vidis, ke ni ne povas venki ŝian honton, kaj tiam ni metis la teleron apud la liton kaj lasis ŝin sola dum kelka tempo. Se la malsato tro turmentis ŝin, kiam ni revenis, ni trovis la teleron malplena kaj la kapon kovrita per la litotuko, kvazaŭ ŝi faris malbonagon.

Kaj, kiam la knabino ankoraŭ ne estis fininta tiujn-ĉi vortojn, Ursulino eliris el sia kaŝejo, senpeze, silentema, kun sia malplena telereto duone kovrita per pinto de sia antaŭtuko. Ĉiuj rigardis ŝin. Kaj sentante sur si la rigardojn la malfeliĉa Ursulino sendube konis ke oni parolas pri ŝi, ĉar ŝi ruĝiĝis kiel koĉenilo kaj mallevis la okulojn, hontinte.

Trad. MARIAN SOLA, L. K.

LA NOVA IDILIO

AŬ

DIALOGO DE L' AMIKINO KAJ L' AMIKO

En la pura kaj ordigita ĉambro, kokete ornamita kiel buduaro kaj plena de bretoj kiel kabineto, aŭdiĝis, en tiu tago de naskiĝanta idilio, amaj vortoj tre nekutimaj.

Ŝi, *Obdŭlia*, dorse al la pupitro, kien ŝi estis lasinta malfermita ĉe la lastaj paĝoj la legatan novan volumon, demandadis kun certa bonvolemo al la amoplena junulo:

—Nu, por la heroino de la libro, taŭgis al vi kiel modelo iu fratino via, ĉu vere?

—Jes...—respondadis li, *Abundi*. —Almenaŭ por desegni la karakteron...

—Kaj ĉu estas via fratino tiu, kiun vi tiel amas?

—Ho, jes!—ripetadis la junulo kun la akcento de fervora entuziasmo kiun ĉiam li estigis en siaj diroj. —Iu fratino, pri kiu, se mi kuraĝus, mi dirus ke ŝi estas anĝela kiel Vi, mola kiel Vi, amika kiel Vi de ĉio spirita... kaj, se ne tiel bela kiel Vi—ĉar tio-ĉi ŝajnas nebla,—ŝi estas ĉarma, alloga, gracia...

—Kaj kiel ŝi nomiĝas?—interrompadis *Obdŭlia* kun amika mildeco, kvazaŭ volante reciproki iamaniere la fervoran tonon uzatan de la junulo.

—Ŝia nomo estas *Gràcia*, same kiel ĉe la novelo.

—Nomo bela!

—Ho! kaj ĝi estas deca por ŝi... ĉar tuta ŝi estas spontaneco, improvizado, donajo de naturo... Ŝi verkas strofon post strofo sen la plej malgranda peno, sen laboro, sen klopodo... Ĉu vi memoras ke mi jam diras tion ĉe la libro: *tute kvazaŭ oni diktus ilin al ŝi de iu supera mondo?*

—Jes, jes... —murmuretadis Obdúlia kun distra ĝentileco.

—Mi eĉ pensis ĉu tio estas afero mirakla, mirinda, de supernatura povo... Ĉu vi scias?

—Jes, jes...

Malgraŭ la vibranta sonato, ŝajne Obdúlia ne sentis sufiĉan intereson pri tiu motivo de la poetino improvizema, de la inspirita fratino. Kontraŭe, iu ajn estus diveninta, rimarkante sur ŝiaj ruĝaj lipoj la ombron de preskaŭ neperceptebla rideto, ke ŝi ne tiom admiras, kiom la junulo, la tiel laŭdatan spontanecon.

Sed ankoraŭ li insistadis:

—Ŝi faras siajn kantojn sen korekto, sen poluro... Kaj, kio estas pli mirinda, kun tre malmultaj legadoj... Oni povas ja diri ke ŝi trilas kiel birdo ĉe la florejo...

Sed, malgraŭ la ekscitiĝo de la junulo, la konversacio malfortigadis. El la du interparolantoj vigligontaj la dialogon, nur li paroladis enfervoriginta, sed ŝi ŝajnis forestanta. Kaj tiel okazis ke, rimarkante Abundi la malpliigantan intereson de sia amikino, aŭ ekkonsciante la malmultan ĝentilecon de li montratan laŭdante la bonajn kvalitojn de iu virino antaŭ alia, la adorata!, kiu ankaŭ posedis tiom da ili, li renovigis iomete la temon... Kaj transirante de la lirikeco deskriptiva al la romano de intrigoj, li sugestis ridetante:

—Sed ja Vi vidis ŝin, almenaŭ unu fojon.

—Mi?

—Jes... La feliĉan vesperon kiam mi konis Vin... Ŝi venis kun mi. Ŝi estis volinta iri al la Salono de Prelegoj, kaj tien mi ŝin akompanis iun vesperon, dum kiu klarigadis la lecionon *Florenco*, la anstataŭanto...

—Ha!

—Ĉu vi ne atentis pri ŝi?

—Jes. Sed mi diros al vi la veron. Se mi atentis pri ŝi, tio ne estis pro ŝi mem, sed pro tiu kiu ŝin akompanis.

—Ho, dankon, dankon, Obdúlia!

—Kaj, ĉar pro via *patra* mieno apud ŝi tuj estis rimarkebla ke tiu fraŭlino ne estas via amikino, mi ne plu rigardis ŝin, por min okupi pri la akompananto... Ne estis pridubeble. La fraŭlino pli aspektis kiel parencino, familiano iginta ke oni konduku ŝin tien por rigardadi de proksime la belegan anstataŭanton en plena brileco akademia, en plenaj funkcioj de preleganto.

—Amikino, Vi estas tre subtila... tiel subtila kiel kruela por Florenco.

—Eble jes, mi uzis troan ironion... Ho, malbonaj ironioj! Ili estas punsigno kiun ni portas sur ni, kaj kiun ni devas formeti. Tamen, mi kredas ke se iafoje ili fariĝas iom pardoneblaj, tio estas nunokaze, koncerne la anstataŭanton.

—Kial? Li estas bonega kamarado...

—Mi ne volas vundi vian amikecon, sed mi devas diri ke ne tute plaĉas al mi tiu Adonis. Li havas emfazan manieron voli igi sin homo aparta, providenca, kiun ne pravigas la malmultaj aferoj kiujn li alportis al ni, nek lia lerteco vidigi ilin. La mieno de spirita protekto kun kiu li parolas pri la Majstro, de li nun anstataŭata, pri la unika homo sciinta fari el la antikva literaturo doktrinan sistemon... mi devas konfesi ke ĝi ne plaĉas al mi, ke pli vere mi ŝatas la normalan heredon, la gradigitajn hierarkiojn, en unu vorto, la Skolon, ĉefe kiam ĝi estas honorigita de vera majstro kiel tiu.

—Kaj vi estas prava, afabla amikino.

—Plue... tia senĉesa laŭdado pri ĉio indiĝena nur ĉar indiĝena; tia eterna ditirambo al la heroo malordo; tia senfina malvastigado de la larĝaj vojoj de la homaro, por pligrandigi la vojetojn epizodajn de tio loka; tia flatado iom fantazia kaj komika al la Naturo, kiel al despoto al kiu la homoj devas ankoraŭ esti dankaj... kion mi diros? al mi ŝajnas ke tio estas deklamado, ne nur necivita sed modpasinta...

La junulo, tre multe surprizite, same pro tiuj vortoj kiuj grandparte kontraŭstaradis lian tradician kredon, kiel pro la nekutima energio kun kiu ili estis dirataj, rigardadis kun malfermitaj okuloj la okulojn tre helajn de la amatino, kvazaŭ li ne tute komprenus la sencon de ŝiaj diroj kaj ne estus sufiĉe konvinkita pri la justeco laŭ kiu oni vipis la anstataŭanton.

Ŝi divenis tion, kaj, prenante la novan volumon kiun por momento ŝi estis lasinta sur la pupitron, ekŝanĝis kun rapideco la aspekton de la dialogo.

—Sed ni revenu al via libro — ŝi diris, — kio estas por mi la plej interesa afero.

—Ĉu vi legis ĝin?

—Mankas al mi legi malmultajn paĝojn.

—Kaj?... — aldonis la junulo kun demanda mieno, kvazaŭ de la opinio de la amatino dependus la propra estonta feliĉo.

—Ho, jes!... Ĝi emociis min ofte... Kaj ĝi interesis min speciare, ĉar, kvankam la rakontado estas nepersona sekve de la sistemo ankoraŭ daŭranta ĉe ni, al mi ŝajnis vidi tie-ĉi kaj tie bildojn pli-malpli vualitajn de viaj ideoj kaj de viaj sentperceptoj... Kaj vi jam scias ke tio por mi plej plezura, ĉe viaj libroj, estas renkonti Vin.

—Ho, dolĉa amikino!

—Mi jam scias, ja, ke en la literatura modo iom akra kiun vi sekvas, la nepersoneco, la diferenceco, troviĝas kiel unuaj regu-

loj. Sed inter la teruraĵoj — ni diru teruraĵoj — grandaj aŭ malgrandaj kiujn vi rakontas, transspiras kelkfoje ia silenta deziro pri homaj perfektecoj... Kaj estas feliĉe ke tio okazas! Ĉar oni devas konsenti, karega amiko, pri tio ke, krom la idilia figuro de Gracia plene afabla kaj plene ama, la cetera societo svarmanta tra tiuj paĝoj ne estas tre spirita nek havas grandan bonecon... Sed la tre videbla volo, kiun vi havas, fari ĝin tre antipatia al la vido de la leganto, montras sen antaŭa esprimo vian idealon pri pli bona homaro en la estonteco. Kaj tio konsolas, meze de tiomaj, de tiomaj...

—Diru, diru, bonvolu!

—... de tiomaj perfortaĵoj...

—Vi trovas multe da ili, ĉu vere?

—Mi kredas ke jes... Sed eble tra mia virina malforteco ĉio aperas tro troeca... Mi kredas senti ian fortikecon, ian akcenton, ian viran forton, kiuj en kelkaj okazoj donas al la personoj pli da krueleco ol da reliefo... Sed mi ne scias kiel mi diras tiel akre ĉi-tiujn aferojn, kiuj, en fina okazo, eble estas nura eĥo de mia gusto de hejmliganta virineto, neniom hardita de la grandaj bataloj de la vivo...

—Sed, ĉar mi metas vian altkvalitan kaj delikatan guston super teoriojn kaj skolojn, mi petas vin ke vi estu al mi eksplicita. Vi estas la stelo, la suno, la heleco... Do gvidu min, lumigu min!

—Mi timas du danĝerojn. Unu, erari mem kaj erarigi vin, ĉar mi ne estas iu el tiuj astroj. La alia, kaŭzi ke via amo malpliĝu...

—Ho, neniam, adorata mia!

—Nu, mi tion diros al vi...

—Tute sincere?

—Jes, tute sincere.

—Kun akreco?

—Kun akreco, ĉar vi tiel volas. Mi trovas en la libro tro da sango, tro da karno kaj tro da tero. Same en la novelo via kiel en la ceteraj skribataj tie-ĉi, ŝajnas ke ne estas por la homoj alia doloro ol la verŝita sango, alia ĝojo ol la krudeco de la sentoj, alia bela spektaklo ol tiu sovaĝa de la naturo. Kaj Vi, amiko karega, enamiĝinta je mi, tre bone scias ke estas aliaj spektakloj pli homaj, kaj aliaj ĝojoj pli altaj, kaj aliaj doloroj pli dignaj kaj serenaj. Do, kial kondamni la homan kondiĉon al sensava bruteco?

—Ho, mia amo, mi ja timas nun ke vi apartigas min de via koro, kvankam ĝi estas tiel malavara je donacoj kaj favoroj. Ĉar... se tiaj nedelikataĵoj kaj krudecoj malplaĉas al vi en la libro, kiel mi povas esti al vi akceptinda?

—Mi diros tion al vi, bona amiko... Tio estas, ke al mi vi vin prezentas multe pli alta ol via verko. Kiu por mi pli bona ol Vi, kiu pli inda kaj afabla? Kio okazas, tio estas ke Vi, delogata de literatura metodo, faras en via libro la oferon de sinmortigo, la

oferon de vi mem. Kaj same kiel en la ĉiutaga vivo ĉion vi vidas per printempaj okuloj kaj ĉio aperas al vi bela kaj bonega, eĉ la anstataŭanto Florenci!, en la arta fiktivo vi vestas vin per vestaĵoj pesimistaj. Via boneco provas, kelkfoje, formeti tiun nigran veston, sed ĝi denove surmetas ĝin tuj, ĉar tiel ordonas la dogmo. Kaj estas domaĝe ke en ĉi-tiuj momentoj ni ne devas ankoraŭ vesti laŭ modoj pli noblaj kaj puraj!

—Modojn noblajn, modojn purajn postulas, ho, dolĉa amikino, via alta spirito. Sed, ĉu tiaj elektitaj modoj estas tiuj, kiujn vere postulas la fataleco de la naturo? Pensu, ke, kontraŭ la tuta beleco kiun la homo povas doni al sia arto, restadas neŝanĝeble la eterna modelo, la vivo... kaj la vivo, vi devos konfesi ke estas malĝoja kaj mistera...

—Ho, ne! Tion ja, amiko mia, mi ne akceptos. La vivo ne estas malĝoja nek estas ĝoja, ne estas mizera nek triumfa... La vivo pli ŝajnas al mi esti kiel oni ĝin pretigas al si, kiel oni mem volas ke ĝi estu... Estas vere, ke ni ne estas ĉiam feliĉaj; sed multfoje okazas tio, ĉar ni ne havas sufiĉan volon esti tiaj. Sed, almenaŭ, ni povas konservi la serenecon en la doloro, for de malsaĝaĵoj kaj kriegoj. Tiel kantis la grandaj poetoj la propran kuraĝan malfeliĉon... Sed Vi, amiko, ĉu vi havas ian plendon, por vidi en via verko la vivon malĝoja kaj mizera? Feliĉo, granda feliĉo estas ke vi pentras ĝin tia nur pro literatura modo! Mi estas tute kontenta pensi tiamaniere pri tio, ĉar, kontraŭe, mi devus kredi ke ne igas vin feliĉa mia amo...

—Ho, ne! amikino mia, ne. Vi estas mia ĝojo, mia gloro, mia plej granda feliĉo!

—Do malfermu vian koron al la lojaleco, kaj pentradu en viaj libroj la ĝojon kiu plenigas vian animon...

—Adorata mia!

—Mia amato!

Kaj ama kiso, serena, ĉastega, finis la konversacion de la amikino kaj la amiko.

JOAQUIM RUYRA

(1858)

Joaquim Ruyra naskiĝis en Girona kaj loĝas en Blanes, kie komenciĝas la tiel nomata "brava marbordo" kataluna. Ruyra estas poeto kaj prozisto. Sed liaj plej ŝatataj verkoj estas la romanoj kaj rakontoj pentrantaj la maristan vivon, la ĉarmojn de la maro. Liaj figuroj parolas la gracian leksikonon de la loĝantoj de tiu marborda regiono. En liaj priskriboj, kiuj estas veraj pentraĵoj, oni sentas la blumon de la maro kaj la freŝecon de la akvo. Eĉ lia stilo havas salan guston, en kelkaj pecoj.

Kiel poeto, li verkis poemon "El país del pler" kaj diversajn versaĵojn, speciale sonetojn. Ankaŭ lia prozo, foje ritmoplena, memorigas pri lia poeteco. Kiel prozisto, li verkis "psikologian" noveleton "Jacobé" kaj kelkajn librojn de rakontoj, el kiuj libroj distingiĝas "Marines i boscatges".

Bibliografio: El país del pler, kaj aliaj poemoj; Jacobé, novelo; Marines i boscatges, poste reeldonita kun la titolo "Pinya de rosa" kaj dividita en du volumojn; La parada; El primer llustre d'amor; El rem de trenta quatre. Tradukoj: Rondalles de poble, de Erckmann-Chatrion; L'art de conspirar, de E. Scribe.

LA FEINETOJ DE L' MARO

Ses knaboj en blua kamizolo, ĉifonaj kaj malpuraj, sidas sur la rokoj, tenante siajn nudajn krurojn pendantaj super la maro, kiu pli ol ofte pufiĝas kaj malsekigas iliajn piedojn. Ĉiu havas sian fiŝkaptilon kaj amaseton da vermoj de roko, la manĝaĵo plej ŝatata de la fiŝetoj.

Ili kaptas jam de antaŭ kelkaj horoj kaj ĉiuj laŭtigas triumfan kriadon ĉiufoje kiam unu el ili eltiras el la maro iun buŝ-malfermitan marperkon, kiu dismalfermas en la aero la brilan vergetaron de siaj dornozaj membranoj.

La nokta krepusko malfortigadas la helecon de siaj moruskoloraj fumaĵoj. Kelkaj steloj, ekbriletas en la blua aero. Aro da korvoj trairas la spacon, fine sin kaŝante ĉe la monton, inter la dubenigraj kaj fendigintaj muroj de antikva kastelo.

Kelkaj el la knaboj, observante, observante siajn kaptilarojn, kiujn la ondo frape saltigas, ekdormetis. Iliaj kapoj ripozas sur la brusto. Iliaj fingroj malpremas kaj preskaŭ eĉ ne tenas la fiŝkaptilojn, kies pintoj kuŝas en la akvo.

Illi ne plu mordas—murmuras unu.—Nu, kiel mallume estas!—ekkrias alia, disdirektante la rigardon al la ĉielo.—Ĉu vi volas konsilon mian? Ni dormu ĝis la lunleviĝo—proponas tria. Ĉiuj alkonsentas. Ili vice apudiĝas, ili jungiĝas metante siajn brakojn sur la ŝultrojn kaj nukojn de la kunuloj kaj ili dormiĝas trankvile en la nokta vetero, apogiĝintaj al roko.

La nokto mallumiĝadas. La luno flavas ĉe sia oriento meze partigita per zono de cindrokolora nebulo. La maro ŝajnas kanti lulilan kanzonon mallalutete per raŭka voĉo.

Subite sonas ia malmilda kaj senbrua galopo... trap, trap, patrap'... kaj aperadas la Feinetoj de l' Maro, rajdantaj sur ruĝaj salikokoj kaj aliaj sur grandaj maljunaj kraboj, survestitaj per mara musko.

Ĉiuj ridas dum ili pikas per pinglo de marerinaco la sentajn artikojn de siaj strangaj bestoj, kiuj grimpas sur la glitigaj deklivoj de la rokaro. Ĉiuj ridas dum ili dismoviĝadas en la pura aero kaj sin skuante forigas de si la malsekecon, kiu akvumas iliajn harojn kaj vestaĵojn.

Ili estas blankaj kiel fiŝa karno. Iliaj delikategaj haroj havas ĉielarkajn nuancojn; brilas sur iliaj kapetoj skvamaĵ kombiletoj; iliaj manteloj estas verdaj kaj longaj, treniĝaj; iliaj okuloj estas lumaj gutetoj kiel tiuj, kiujn faras foje en la maro la froto de remiloj. Ekpasinte ili dissendas agrablan marajan odoron.

Jus ekvidinte la ses fiŝkaptistetojn, ili malrajdiĝas, alproksimiĝas al ili kaj suprenrampas iliajn krurojn... supren...

Unu sidiĝas pensema sur la faldo, kiun formas la lipo de unu el la dormantaj knaboj. Dua alkroĉiĝas de la okulharoj de alia knabo kaj rigardas scivoleme tra la fendo de la palpebroj, penante rigardi la okulon. Tiu-ĉi observas kontente la pejzaĝon gracie starante sur la verta pinto de la plej alteta el la aro. Tiu ŝirmiĝis per la plej graseta kaj per lia milda kaj varmeta spiro ŝi varmigas siajn manetojn. Kelkaj kune amasiĝas sur la saman kapon. Aliaj ektuŝiĝas kun ektimo sur la pinto de muskolo, kiun ili grimpis de malsamaj lokoj. Ili faras nenian bruon.

Ĉiuj fine iras murmuri misterajn vortojn al la orelo de la dormantoj.

Ili parolas al ili pri la poezio de l' maro, pri la ĉarma moviĝado de la ondoj, pri ĝiaj diversaj kaj belaj koloroj; ili parolas al ili pri la fiŝoj kaj pri la herbejoj kie ili sin paŝtas; pri la ŝtormoj, pri la kvieto, pri la ventoj, pri la plezuroj de longedaŭra navigado, pri la superbelo de la marventegoj... pri io, kion niaj vortoj ne povas diri; kaj la fiŝkaptistoj sonĝas ĉion, kion inspiras al ili la feinetoj.

Kiam ili vekiga, la Feinetoj de l' Maro jam malaperis kaj oni nur aŭdas la galopbruon de iliaj strangaj rajdbestoj, kiuj kuras subakviĝi.

Sed la sorĉo jam efektiviĝis. Jam nek ŝtormoj nek iaj suferoj

povos detruui en la koro de tiuj knaboj la emon al la marista vivo. Donu al ili bonvicon ĉe la monto kaj ĉiam vi vidos ilin malgajajn kaj alsopiremajn.

Trad. ESTANISLAU PELLICER.

TERURIGO

Vojirante al kampdomo de la Selva, kie restadis mia familio, mi malfruis pro kaŭzoj kies rakontado ne estas necesa. La suno estis malalta kiam mi alvenis ĉe la muelejo de l'Ulmo, tri horojn ankoraŭ malproksima de la fino de mia vojaĝo; sed malgraŭ la malfruo, mi devis halti por trinki, kaj mi sidiĝis sur ŝtono apud la rivero por ripozi momenton, fumante cigaredon. La muelejo de l'Ulmo ne laboras jam de antaŭ multaj jaroj. Ĝi estas neloĝata domo aŭ pli bone neloĝebla ruino, ĉar granda parto el ĝiaj muroj falis, kaj ĝiaj tegmentoj kaj plafonoj staras nur parte. Interne kreskas monta arbustaro kaj la sovaĝvito elmontras sian foliaron tra la fenestroj. La kluzo submovita kaj gratuita lasas kun malŝato libere flui la murmurantajn akvojn. La granda turbino putriĝas senmova sur la seka kanalo, kie la araneoj ĝin plenigas per teksaj retoj, kaj la dornarbustaro de la ŝtonmuroj superŝutas ĝin per vergetoj kaj sekfoliaro. Kaj pensinte, ke en aliaj tempoj tiu rado donis movon al komplikita maŝinaro, kaj imaginte la ronkojn de la muelŝtonoj, rimenoj kaj dentradoj, la irvenojn de la muelistoj, la vicon de ĉaroj kiuj certe amasiĝis en la kortoj, la sonadon de la tintiloj, la klakojn de la vipoj kaj la kriojn de la ĉaristoj vivplenigantaj la tutan valon, oni rajtas amenaŭ sin plendi pro la disfalo kaj pro la kvieto nunaj. Nun la regiono estas senhoma kaj arboplena. La vojoj herbpleniĝis kaj la radsignoj malaperis. Neniu trairas; nur iu malofte, de tempo al tempo. La suno rigardas tien tagojn post tagoj kaj monatojn, ne malkovrante homan figuron, kaj la vespero surfalas meze de morta kvieto.

Mallongan tempon mi dediĉis al ripozo. Mi volis profiti laŭeble por mia marŝado la tagan lumon kiu jam ekrugiĝis. Mi eniris, do, en la arbaron per rapida paŝado; sed baldaŭ mi komprenis ke mi penas senutile, ĉar antaŭ ne multe la nokto min atingos en plena arbaro. Certe la suno devis esti jam subirinta. Malgraŭ la altega betularo, kiu okcidente kaŝis al mi la vidaĵon, la duonheloj, kiuj sin filtrante tra la maldensaĵoj de la foliaro dismakulis la arbaron, sufiĉe montris per siaj koloro kaj malforteco la staton de la fajrujo de kie ili devenis. Ili estis perdintaj sian oran brilon; ili ruĝis, palpebrumis, ne povis daŭri. Subite sin etendis kvazaŭ ombra ondo kaj ili estingiĝis ĉie.—Adiaŭ, bonfaranta krepuska rigardo; ci ne plu min akompanos—mi ekkriis. Sed mi eraris. La mortinta taga flamo reviviĝis ankoraŭ kaj ĝiaj reflektaj ree disvastiĝis sur la montaro; kaj malfortaj, violkoloraj, ondantaj kiel lumaj fumvua-

loj, ili vagis de loko al loko; ili estingiĝis, reaperis kaj denove malaperis multe da fojoj, tiom ke mi perdis la fidon revidi ilin, nur post longa tempo de vana espero. Fine mi komprenis ke ili ne revenos kaj tiam mia koro premiĝis. Mankis al mi ankoraŭ duhora vojirado tra regiono tute senhoma.

Kiam mi pasis la ponton de la Mustelo, ŝtona ponto mallarĝega kaj nur el unu arkaĵo, tiom simpla ke oni dirus ke ĝi estas la ostro de ripego, la nokto plene regis. Trans la ponto, la arbaro estis impone nigra. Certe timo min kaptis. Sed... pro kio? Ĉu pro rabistoj? mi eĉ ne sonĝis pri ili. Ĉu pro mortfalo? Mi sciis ke mia vojo bordiras nenian abismon. Nu... tio estas senkaŭza timo—mi murmuris—timo pro nenio, propra de virinoj kaj infanoj. Estas necese ĝin ne atenti. Filozofio kaj antaŭen! Sed la filozofio, kiu antaŭenirigis min, ne sukcesis min trankviligi.

Takta flutkanto de bufoj, kiu sonis malproksime en valprofundaĵo, kuraĝigis min pli ol la plej bonaj rezonadoj. Mi metis tutan mian atenton en tiu dormiga kanto, kaj, dum mi ĝin aŭskultis, ŝajnis al mi ke mia soleco ne estas kompleta. Estis estaĵoj kiuj sin movas, kiuj kuniĝas por viva ago, kiuj komunikiĝas kun mi per sia voĉo. Ili iel akompanis.

Lumeto, kiu aperis pli poste meze de malklara maso de monto, ankaŭ kunhelpis kuraĝigi min. Tie estis domo kun familio. Mi imagis la kamparaninon kribranta farunon sub la helo de tiu lumeto, la knabojn arangantaj la furaĝon por la nokto kaj la terlaboristojn kubute apogitaj sur la preparita tablo, atendantaj la horon de la vespermanĝo. La bonaj homoj havis la fenestron malfermita, ne pensante pri la almozo farata al la vojaĝanto nur permesante al li ekvidi la lokon de ilia restejo. Ne ĉio estis dezerta, ne. Mi sentis la akompanon de tiuj malproksimaj homoj kaj mi ja ne povis dubi pri ilia ekzisto.

Distrita tiele mia imago, mi faris longan vojiron kun ia kuraĝo; sed kiam mi perdis el la okuloj la lumeton, kiam postlasinte vojkurbon mi ne plu aŭdis la bufan flutkanton, kaj perceptebla, teruriga silento vibris ĉirkaŭ mi en la senlimo, ŝajnis al mi ke la nokto min surfalis.

Mi haltis konfuzita, plena de ia ĝeno simila al tiu kiun ni foje spertas kiam persono ŝtelire alproksimiĝas malantaŭ ni. Mi volis min turni kaj ne kuraĝis. Fine mi atingis fari tion kaj mi sentis pasi sur mia haŭto malvarman frostotremigan spiron. Sed mi vidis nenion... nur la arbaron, la valprofundaĵojn, la mallumon.

Mi ree marŝis kaj alian fojon estis devigata halti post kelkaj paŝoj. Mi ne povis min liberigi el la trudpenso ke iu min sekvis kaj observis. Korbata emocio, denove mi rigardis, aŭskultis... La silento estis absoluta. Nur la bruo de mia honta spiro kuraĝis ĝin profani. La nokto estis plejnobla, diafana; dubeblua, senfina abismo punktita per steloj kiuj montris konfuzajn distancojn en la senfina profundaĵo. Kaj malsupre, la ombra tero restis muta,

kun sankta silento, kvazaŭ kolektante kun religia respekto la disradiadojn de la senlimeco. Tio estis kion perceptis la okuloj kaj la oreloj... Sed plie... Kiel esprimi tiun profundan, haŭtotreman senton kiu min persekutis? mi nur scius kompari mian staton kun tiu de persono sin sentanta ĝenata ĝis suferlimo pro la insista rigardo de alia fikse lin observanta en silento. Mia spirita streĉo iĝis ja ne elportebla. Mi ne povis plu rezisti. Sangoglacie mi falis sur la genuojn. Ho senlimo, ho nekonateco... mi vin adoras! Min helpu, min sirmu!—mi ekkriis per nevola krio kiu timige resonis en mia koro. Kaj surtere kuŝiĝinta mi restis preĝante, delire preĝadante, kuntiriĝinta, trema, ĝis kiam min kaptis kormoligo, ploro, konsolo.

Mi min levis fine revigliĝinta, posedita de mistika dolĉeco. La teruro ne tute forlasis min, sed ĝi estis tolerebla. Kun humila te-niĝo kaj la palpebroj malaltaj mi daŭrigis la marŝadon tra la solecaj vojetoj, murmurante preĝojn duonlaŭte; kaj tiel mi sukcesis alveni al la kampdomo.

Tie atendis min la familio amplena kaj la fajrujo brulanta. Ĉiuj estis jam antaŭtimantaj pri mi. Ili adresis al mi kelkajn demandojn, kiujn lakone mi respondis. Kaj mi kredis observi ke neniu atentis pri miaj respondoj. Eble tio estis ĉar mi diris seninteresajn aferojn kaj ĉies okuloj malkovradis sur mia vizaĝo ion gravan kaj nedecifreblan, kio pli ol miaj vortoj altiris la atenton. Kia honesta honto aŭ spirita embaraso silentigis min pri tio plej grava el mia tagtempo? Mi ne scias. Certe estas ke mi evitis konversaciojn, mi sidigis antaŭ la fajrujo sub preteksto de laciĝo, kaj min donis al miaj meditadoj.

Neniam kiel dum tiu nokto mi konis tiun timon pro la senfino, pro la nekonateco, tiun intensan suferon kiun ĉiuj spertis iufoje kaj kiun neniam oni studis kun la dezirata trankvileco. De kio devenas tiu terurigo? Ĉu la soleco, la senlimo kaj la mallumo agas per si mem kun malbonfara influo sur la homaj kapabloj, freneze malordigante ilin? Aŭ ĉu estas ke en tiaj cirkonstancoj vekigis en ni kapablo preskaŭ ĉiam forigita de maldelikataj sentoj, intima sento, kiu permesas al ni ricevi la sugestion de supersentebaj povoj nin perturbantaj kaj frostotremigantaj? Ho mia Dio! kiel dubi pri tiu profunda sento, per kiu mi vin palpis kun sankta teruro meze de la nokta malpleneco? Ĝi estas nepreciza, malklara, kvazaŭ vekiganta sento, kiu, se mi ne estus ricevinta aliajn lumojn, povus min porti al adorado de io abomeninda, kiel okazis al tiom da popoloj, kiuj eble ne havis en religio aliajn majstrojn ol la teruro; sed eĉ tiel nepreciza kaj malklara, necese estas rekoni ĝian ekziston.

Trad. ESTANISLAU PELLICER.

JOAN MARAGALL

(1860 - 1911)

Joan Maragall naskiĝis en Barcelona la 10 de Oktobro 1860, filo de riĉaj gepatroj. Lia facila vivo reflektiĝis en lia verko, plena de optimismo kaj amo al la vivo. Li studis Jurosciencon en la Barcelona Universitato kaj fariĝis Licenciato en 1884. En 1890 li edziĝis kun sia belnoma amatino Clara Noble. Dum sia trankvila kaj feliĉa vivo, Maragall estis ĵurnalisto kaj super ĉio poeto. La poezia sento vibrigis lin konstante. Eĉ liaj artikoloj kaj prozaĵoj estis ĉiam sentoplenaj poemoj. Li mortis en sia patra domo, la 20 de Decembro 1911, ĉirkaŭata de sia amanta edzino kaj la dek-tri gefiloj kiujn ŝi donis al li.

Malfacile estas pritrakti, en malmultaj linioj, la personecon de la granda poeto Maragall. Li proklamis la sendependecon de la formo, asertante ke la poezio rekte devenas de la pura emocio kaj ke la poeto tial devas lasi sin regi de la momento "de graco" kaj agi sub la influo de "la revelacio". Laŭ tio la poeto povas verki iom senzorge, puŝite de la flueco de la "parolo viva", ne iĝante sklavo de la eksteraj leĝoj de la rimo aŭ de la metriko... Sed la teorioj de Maragall ne ĉiam estis sekvataj de li mem. Ekzemple, en lia poemo "La sardana" oni sentas ke li zorge poluris la *formon*. Ja oni povas kontraŭdiri ke ĝia facile sentebla muzikeco volas iel respuguli la muzikon de la sardano, la nacia kataluna danco kantata de tiu poemo. Oni diris, ke multaj estetikaj opinioj de Maragall ricevas pravigon nur ĉe maloftaj grandaj poetoj, ĉe kiuj la interna poezio estas vera torento, al kies paso submetiĝas la plej rigidaj baroj eksteraj.

Maragall kreis per tio novan skolon en la kataluna poezio. Liaj poemoj estis kore akceptataj de ĉiuj, malgraŭ la diferencoj pri teorioj. Lia genio trudis sin per lia mirinda facileco, lia originaleco kaj, ĉefe, lia klareco. Liajn amajn sentojn oni ĝoje komprenas kaj liaj vortoj de admiro komunikas ion, kvazaŭ ekstazo, antaŭ la ĉarmoj de la naturo. Eĉ kiam li pritraktas profundan temon, kiel en "Kanto Spirita", lia poezia sento klare komprenigas sin kaj vibrigas ĉiujn korojn. Oni sentas, legante lin, la ĝojon de la vivo, kun ĉiuj ĝiaj senfinaj spektakloj.

Malgraŭ siaj teorioj, la poeto Maragall ne lasis sin regi nur de la instinkto. Lia literatura eduko estis plej vasta. Li estis granda amanto de Homero kaj de Goethe. Se, ĝenerale, Maragall evitis la troan tiranecon de la poezia formo, kontraŭe li zorge atentis—ne pri la *poezia* esprimo—pri la *lingvo* mem. Kiel ni diris en la "Antaŭparolo", Maragall signis, same kiel Verdagner, novan vojon al la kataluna poezio. La tasko de repurigo de la lingvo

atingis ĉe Maragall altan gradon. Se Verdaguer lasis al ni du grandajn epikajn poemojn, Maragall riĉigis nian renaskiĝantan lingvon kaj literaturon ne sole per siaj abundaj poemoj mallongaj sed ankaŭ per sia majstra originala poemo elvokanta la Homeran figuron "Naŭziko" kaj per siaj tradukoj el Goethe, el kiuj hele radias la plena traduko de "Ifigenio en Taŭrido".

Maragall estis samtempe tre kataluna kaj tre universala. Se unuflanke li pritraktas, kun genia lerteco kaj allogo, la katalunajn mitojn kaj legendojn pri "Fra Gari", "Joan de Serrallonga", "Adalaisa" kaj "Comte l'Arnau", aliflanke li kantis la eternajn ĉieajn temojn pri la amo kaj pri la naturo kaj enkondukis novajn vidpunktojn, novajn influojn, kaj formis novajn poetojn pere de sia forto, de sia lumo, de sia vere poeta substanco.

La popola amo al la alta poeto Maragall havis indan manifestiĝon la 4 de Majo 1913 iom post lia morto, okaze de la inaŭguro de lia monumento en la Barcelona Parko. Ĝi okazis tuj post la tiujaraj Floraj Ludoj, ĉeestata de la reĝino de la Festo, la Jугantaro, la aŭtoritatuloj kaj granda popolamaso. La 3 de Junio 1917 oni malkovris memortabulon ĉe la domo kie naskiĝis kaj mortis la poeto.

Bibliografio: La multaj volumoj de la aŭtoro estis kunigataj en la "Plena verkaro", en kvin dikaj volumoj. Volumo I. Poemoj: Visions i Cants; Les Disperses; Enllà; Sequències. Volumo II. Nausica; Cants Homèrics; Olímpica I de Píndar; Ton i Guida; fragmento de "Així parlà Zarathustra" kaj aliaj tradukoj. Volumo III. Notes autobiogràfiques; Escrits; Pròlegs; etc. Volumo IV. Elogis; Discursos; Necrologies. Volumo V. Tradukoj el Goethe; Ifigènia a Taurida; Faust (fragmentoj); Eridon i Amina; La Marguerideta; Pensaments.

Ekster la "Plena Verkaro" restis ankoraŭ kelkaj originalaj poemoj, kiujn oni estas kolektanta, kaj la traduko el Novalis "Enric d'Ofterdingen", eldonita de la Biblioteka "L'Avenç" en du volumoj, Barcelona 1907.

KANTO SPIRITA

Se l' mond', Sinjor', aspektas bele tia
vidate de rigard' kun via paco,
kion ankoraŭ Vi en viv' alia
al ni proponi povos por donaco?

Tial mi tiom kun ĵaluzo ŝatas
je okuloj, vizaĝ',—Sinjor',—je korp'
de Vi donita, kie ĉiam batas
koro... kaj timas tiom je la mort' !

De kiaj novaj sentoj Vi vidigos
tiujn bluan ĉielon super montoj,
vastan maron kaj sunon ĉie brilan?
Sentojn miajn plenigu Via pac',
kaj sopiros mi nur je blua spac'.
Tiun dirintan "Haltu" al neniu
momento, krom al tiu de la mort',
mi ne komprenas, mi, kiu haltigus
tiome da momentoj de tag' ĉiu,
por ilin eternigi en la kor' !
Aŭ tia "eternig'" jam estas mort' ?
Sed, tiam, kio estus do la vivo?
Ĉu estus ĝi la ombr' de l' temp' pasanta,—
iluzi' pri la for' kaj pri l' apud',—
je la mult', aŭ malmult' aŭ tro', trompanta
kalkulo, ĉar jam ĉio estas tut' ?

Tute same! Ĉi-tiu mondo, kia
estas, laŭ temp' kaj diversec' tiela,
ĉi-tiu tero kun kreaĵo ĉia,
tamen estas, Sinjor', patrujo mia;
kaj ĉu ne povus esti ĝi ĉiela
ankaŭ por mi patruj' ? Mi homo estas
kaj homa estas mia la mezuro
por ĉio, kion povas sub lazuro
esperi mi: ĉu Vi, se la espero
kaj fido miaj tie halte restas,
je tio min kulpigos en pretero?
En pretero la stelojn kaj ĉielon
mi vidas, kaj dezirus el homgento
eĉ tie esti; se Vi tian belon
al ĉio donis por okuloj miaj,
se tiujn kreis Vi por admirsento,
kial sen ili serĉi kroman celon?
Se tia montros sin al mi nenia!

Vi estas, ja: sed kie?... Kiu scias?
 Ĉio laŭ vid' similas Vin en mi...
 Mi kredis do...: Vi estas tie-ĉi!
 Kaj kiam venos la timinda horo,
 kiam blindiĝos mia homa vido,
 al mi novan malfermu via fido
 por senfinan rigardi Vin, Sinjoro!
 Estu por mi la mort', naskiĝ' al gloro!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LA BLINDA BOVINO

Senvole per la kap' ektuŝegante
 je unu kaj alia trunk', sencele
 iradas sur la voj' al trinkoloko
 bovino, kiu venas tute sola.
 Ŝi blinda estas. Paŝtistet' per frapo
 de ŝton' al ŝi tro lerte surjetita
 okulon unu ŝian difektegis,
 l' alian membraneto nubekovras:
 jen blinda estas la bovin'. Ŝi venas
 al font' por trinki, kiel ŝi kutimis;
 sed ne kun firma la sinten' tiama,
 nek kun kolegoj siaj, ne: tutsola
 alpaŝas ŝi. Fratinoj ŝiaj dume
 ĉe krutegrokoj, sur la plataltaĵoj,
 en la silent' herbeja, ĉe l' akv-bordoj,
 sonigas pendtintilon, freŝan herbon
 manĝante laŭ plezuro... Ŝi ja falus.
 L' akvuĵon akrerandan ektuŝegas
 ŝi per la buŝ' kaj honte sin retiras.
 Sed ŝi revenas, sian kapon metas
 en l' akvon kaj eltrinkas malrapide.
 Ŝi trinkas sen soifo, nur malmulte.
 Kun granda tragedia gesto, poste
 ŝi levas al ĉiel', egan, la kapon
 kornhavan: sur senvivaj la pupiloj
 ŝi palpebrumas kaj denove venas,
 je lumo orfa sub brulanta suno,
 malfirme sur la voj' neforgesebla,
 malvigle balancante la longvoston.

Trad. V. INGLADA ORS, L. K.

*Topant de cap amb una
 alta voca
 Avançant desma pel can
 del aigua
 Sen ve la boca tota sola
 so, cega. D'un cop de roc
 Manjat amb malsana traya*

LA EDZINO PAROLAS

Kiam senaŭde, kion mi aldiras
 aŭskultas vi, vagante per rigard';
 kiam via spirito ekvoĵiras
 foriĝante de mi laŭ vent-hazard',

mi vidas, ke ŝip-penso vin enportata
 veturas jam de horizont' ĉe l' fin':
 estas puŝo de am' sufiĉe forta
 por konduki min tien apud vin.

Apud vi mi veturas ensorĉita,
 alpuŝata de mia am-fervor';
 mi nur scias, sur vojo nekonita,
 ke mi estas l' edzino enamita,
 kiu kune kun vi veturas for.

La Poeto

Sed nur vi—gvidantino, nur vi—forta,
 ĉar ĉiam, en kviet' aŭ furioz',
 vi scias, ke ŝip-penso min enportata
 al via am' revenos por ripoz'.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

RIGARDE AL MAR'

I

Apud la mar' eterne malkvieta
 floras senmove pomoarbo blanka
 kaj persikujo ruĝa, kiuj brilas
 ĉe l' malkvieta, kvietiga maro.

II

En tag' simila bona Jezukrist'
 sur maro paŝis: akvo kaj ĉielo
 estis glataj kaj bluaj kiel nun...
 Rapide iris la Vizi' renkonte
 al ravitaj disĉiploj sur boato.

III

Serena ĉiel' per ĉarma nuanc'
bluigas la maron ĉe mezo de tag' :
sub pinoj mi estas... Du aĵoj, en par'
vidataj, pliigas la koron je grand' :
verdeco de pin', blueco de mar'.

IV

La vent' liberiĝas:
jen maro—kantanta.
Mar' brava, mar' verda, maro ŝaŭmadanta.
La ondo stariĝas,
silenta, giganta;
la ŝaŭmo heliĝas
de l' suno brilanta;
la ondo fendiĝas
kaj falas, sonanta.
Mar' brava, mar' verda, maro ŝaŭmadanta.

V

Unuope,—en dancon virgulinoj—
gliteniras boatoj al la mar',
—velo sternaĝas laŭ flugil' al sun'—
kaj tra vidataj nur de ili vojoj
malproksimiĝas maren...
Ho bluaj mar', ĉiel' ! Dezerta bordo
flava de sun' ! Apude, mar' vin kantas,
dum vi atendas la revenon ravan,
je sunsubir', de la boat' unua,
kiu el mar' elnaĝos odorplena.

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

AL AMIKO

Sub freŝa ombro de maljuna arbo,
sidante tere sur l' abunda herbo,
mi volus tie apud mi vin vidi,
amiko mia.

Mizerojn mondajn forgesante tie,
kiuj lacigas kaj tro frue lasas
la kapon blanka, pri l' nuntempo gaja
ni nur parolus;

pri, ĉu la nuboj super mont' starantaj
kaj trairantaj en ĉielo blua,
alportas pluvon al la ter' amika
aŭ sole varmon;

pri la trunkaroj de vinberoj nigraj
kiujn rigardas kamparan', pensante
pri kiam ilin la piedoj premos
purpurigintaj;

pri hund' fidela, apud ni kuŝanta,
pri l' vent' movanta malkvietajn kanojn...
Jen poste veni tra vojet' ni vidus
knabinon belan,

kun kruĉo plena de kristala akvo;
kaj, je la peto por ĝin trinki nia,
ŝi, ruĝoplenaj la grasetaj vangoj,
"Ektrinku" dirus.

LA TROBADORO KAJ LA PRINCINO PIRENEAJ

Se infanoj estus ni,
ni farus edziĝ-ludadon:
mi—la reĝo tie—ĉi,
vi—reĝin' ĉe via flanko.
Nu, mi irus serĉi vin,
grandegan regnon ni havus;
la regno de l' Pirene'
kronita de neĝ' tre blanka,
verdebenoj ĉirkaŭ ĝi
kaj blua mar' ambaŭflanke.
Paŝtistojn reĝadus ni,
maristojn kaj kamparanojn;
reĝo, kortego, popol'—
kune ĉirkaŭ viaj ĉarmoj.
Kaj prezentiĝus ĉe vi
ĉiu kun la propra tasko:
paŝtistoj kun la brutar'
forlasante la montarojn;
kun remiloj la marist'
kaj odor' je mara akvo;
kun bovoj la kamparan',
el plugilo resonanta;
ĉiuj kun soif' je am' :

kaj ni ambaŭ estus l' akvo.
 La noblan arton de l' kant'
 en vortoj bone rimataj
 al fraŭloj lernigus mi,
 vi al fraŭlinoj la dancon,
 kaj reirus al la hejmo
 ĉiuj kun vizaĝ' ridanta;
 la maristoj al la mar',
 la paŝtistoj al montaroj,
 la plugistoj al la kamp'...
 kaj unu alian ni ambaŭ.
 Kaj regno de l' Pirene'
 estus la regno plej paca.

L' ANIMO DE L' FLOROJ

Ĉi-tiuj belaj floroj forlasitaj
 sur lok' de trairad',
 de kiu tien estas forĵetitaj?
 De iu, kiu ajn.

Ne estas ja malĝojaj tiuj floroj
 ridante sub la sun'.
 Mi sentis min ravita vidi ilin
 sen ia timo pretajn morti tuj.

"Ni certe mortos tuj, for de la trunko",
 —de l' floroj jen la pens' ;—
 "sed nune nia bril' ravas Poeton:
 jen bela senmortec'".

PIRENEA

En la ĉambro, eta, eta,
 dormas sole mi dum nokt' ;
 en l' ekstero, nigra, nigra,
 mian dormon gardas mont'.
 La montaro, alta, alta,
 kaŝas multe da ĉiel' ;
 apudstaras ĝi senmova,
 mute garda, kun firme'.
 Mia revo flugas, flugas,
 al la val' kaj bord' de l' mar' :

amo mia min atendas
 sub ĉiel' en suna flam'.
 Je rev' mia mi ridetas
 en dorm' sola, dum la nokt'...
 En l' ekstero, nigra, nigra,
 mian dormon gardas mont'.

Trad. ESTANISLAU PELLICER

VOJIRANTE TRA LA MONTARO

Plaĉas al mi, bastono ĉe la man',
 sur horizontojn ĵeti la rigardon,
 en mi senti senlimon de l' ĉiel'
 kaj la grandan kvieton de l' montaroj,
 la riverbruon aŭdi tra la val'
 kaj malproksiman eĥon de l' tondrado;
 ĉe la supro de l' mont' vidi senmovan
 alian eĉ pli altan nubmontaron,
 kotonan, kun ruĝhel' ĉe Okcident'.
 Kaj vidi, post la sunestingiĝado,
 senkoloriĝi teron antaŭ mi,
 senkoloriĝi la ĉielarkajon...
 La unuajn malĝojajn de la nokt'
 en miaj ostoj senti tiam plaĉas;
 kaj venante malsupren el montpint'
 transiri la mallumon leviĝantan.

ANTAŬ LA ŜTORMO

I

Sin vaste ĉirkaŭpremas
 du senlimajoj, kaj malbonaŭguraj,
 reciproke rigardas sin, malpuraj;
 unu, sen mov' nek laŭt' ; la dua tremas.

II

Bruanta mar' sen pacienc' sin levas
 malantaŭen, kaj forton ĝi ricevas;
 sin ĵetante kolere
 kontraŭ rokegojn, ĝi blekante krevas,
 kaj en ŝaŭmo resaltas polva ere.

III

Ho! kia ŝaŭma tulo
laŭlonge de l' dezerta bord' surnaĝas,
en bukedoj leviĝas laŭ nebulo
kaj en ros' diseriĝas! Rekuraĝas
kolera mar' repreni sian vojon,
kaj rec... kaj pli bele ĉiun fojon!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

POST LA TEMPESTO

Kiam nuboj disiĝas en ĉiel',
eliĝas el tempest' l' urbo ridante,
pro l' akvo ĉie plena de lumhel',
denove per festsonoj ekbruante.

Rekomenciĝas bruo ĉe la urb'
kaj sur homaj vizaĝoj la gajeco.
Ne restas en ĉiel' eĉ sola nub':
post la nokta mallum', taga klareco.

Serĉas ĉies rigardo rapidmova
en alt' la ĉielbluon forgesitan.
Ni benu la tempeston pacigitan
levigantan la vidon al lum' nova!

HIMNO IBERIA

I

—Jen estas viaj maristoj, ni,
kantantaj brave, Kantabri',
meze de ŝtorma furioz':
granda la ter', la maro pli,
kaj ter' kaj mar'—en malripoz'.
Vivado nia—lukto;
en nia koro—fort';
sur ni—nenia superstar':
ja sole mort', ja sole mort',
montsupra neĝ' kaj fund' de l' mar'.

II

—Lusitania dolĉa,
ĉe bord' de l' granda mar',
de ondoj venon vidas
kaj iron de stelar';
ĝi revas mondojn novajn
kaj mondojn en ruin'.
Daŭradas ĝia revo
kontraŭ la spac' sen fin'.
Malgaja tial,
sed pro dolor',
Lusitania... esperas
je amfavor'.

III

—El afrikaj maraj bordoj
al ni venis granda varm',
de Andaluzi' ĝardenojn
pasiigis flora ĉarm'.
Ruĝa flor' sur nigraj haroj,
fajr-okuloj, korpa bel',
estas lando, vi, de l' dancoj
sub serena bluĉiel'.
Vian grandan malviglecon
kantu, cantu kun obstin',
kaj al mi la ardan sunon
trinki donu via vin'.

IV

Je krio de l' "tramontano" (1)
ni dancu "sardano'n" (2)
apude de l' mar';
kontraŭ la neĝ' de l' Pirene',
forajn aŭdante
l' aliajn, kante...
Elviglu, Katalunar':
anoncas sin la granda sort';
venos el mar'—aŭ el montsupr',
atentu ĉien nia fort',
prete por viv', prete por mort',
por suferego... por triumf'!

(1) *Tramontana*, norda fortega vento en Katalunujo.

(2) *Sardana*, rondodanco kataluna kun tre kurioza laŭtakta dancmaniero.

V

Unu voĉo

Sola, sola en kampar'
Kastilujo fore estas,
kaj malgaja, ĉar nur restas
ĝi senvide al la mar'.
Pri l' mar' parolu, fratar'!

VI

Ĉiuj

Mar' estas granda, mova, brila, kanta,
sub ventoj siblegantaj en bata';
ĝi estas ega lukto resonanta,
dezireg' liberiĝi de fatal'.

Sur mar' okuloj pli da lum' deziras;
marventojn trinki, brustojn faras bravaj;
fratiĝas homoj, se al mar' kuniras;
de mar' veninte, ne plu estos sklavaj.

Iberland', al vi sonas el la rondo
de ĉiuj viaj filoj amkanzon':
en ĉiu bord' malsame kantas ondo,
sed tere, for, jen unu nur reson',

kiu en amon ĉiujn korojn prenas
kaj kiel frata kant' aŭdiĝas jam.
Iberland', via viv' el maroj venas;
Iberland'...: al la maroj, via am'!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.

LAŬDO AL LA PAROLO

(Mallongigo)

La parolo estas tio plej ravanta en la mondo, ĉar en ĝi sin alpremas kaj kunfandiĝas la tuta ĉarmo korpa kaj la tuta spirita ĉarmo de nia naturo.

Ŝajnas ke la tero uzas siajn tutajn fortojn por produkti la homon, kaj ke la homo uzas la tutan forton de sia estaĵo por produktadi la parolon. Vi vidas homon ankoraŭ silentan, kaj vi lin trovas simila al animala estaĵo pli-malpli perfekta ol la aliaj; sed, iom post iom, vivo ekmontriĝas sur lia vizaĝo, ek esprimi

plenigas liajn okulojn de spirita lumo, liaj lipoj moviĝas, vibras la aero kun subtila varieco, kaj ĉi-tiu materia vibrado, ricevita de la sento, kunportas en sia interno tiun nematerian ajon vekantan la spiriton: la ideo.

Kiel! Ĉu vi aŭdos la brueton de la vento, la bruon de l' akvo kaj la bruegon de la tondro lasantaj en via spirito tre neprecizan senton, kaj sufiĉos ke malgranda infano, kiu sin aŭdigas nur de tre proksime, diru dolĉe "Patrino" por ke—ho, mirindaĵo!—la tuta spirita mondo vibru intensege en la fundo de via koro?

Subtila moviĝo de la aero sciigas al vi la grandan variecon de la mondo, kaj starigas en vi la fortan antaŭsenton de tio nekonata kaj senfina.

Ho! Kiel sanktega afero! Diras Sankta Johano: "Je la komenco estis la parolo, kaj la parolo estis en Dio, kaj la parolo estis Dio!"; kaj oni diris ke per ĝi ĉiaj aĵoj estis farataj; kaj ke la parolo iĝis karno kaj loĝadis en ni. Kia abismo de lumo!

Kun kia sankta timo, do, ni devas paroli! Se estas en la parolo la tuta mistero kaj la tuta lumo de la mondo, ni devus paroli ĉiam ravitaj, kvazaŭ blindigitaj; ĉar ne estas vorto—eĉ se al ni ĝi prezentas malgrandan signifon—ne devenanta el inspira lumo kaj ne reflektanta ion el la lumo senfina kiu naskis la mondon. Kiel ni povas paroli malvarme kaj tiom abunde? Pro tio ni aŭdas nin, unuj la aliajn, plej ofte, tiel indiferente; tial ke la kutimo troe paroladi kaj troe senti malhelpas al ni konscii la sanktecon de la parolo.

Ni devus paroli malpli multe, kaj nur pro forta deziro je esprimado: kiam la spirito ektremas maturplena kaj fluas la vortoj kiel la floroj burĝonas en Printempo, unu post unu kaj ne en ĉiuj branĉoj, sed en unu bonsorta branĉo; kiam unu branĉo ne plu povas elteni sian internan printempon, tiam meze de la abundaj folioj burĝonas la floro kiel ravanta esprimo. Ĉu vi ne vidas en la kvieto de la kreskaĵoj ilian admiron esti ekflorintaj? Tiele ni, kiam fluas el niaj lipoj la vera parolo.

Tiel parolas la poetoj. Ĉion ili rigardas ravite, poste ili febrigiĝas, fermas la okulojn kaj parolas en la febro; tiam, similaj al Dio en la unua tago de la Genezo, ili diras iun kreantan vorton, kaj el la haoso eliĝas la lumo.

Kaj tiel la parolo de la poeto eliĝas kun ritmo de lumo kaj ritmo de sono samtempe, tio estas, kun la ritmo unika de la beleco kreipova: tia estas la dia ĉarmo de la verso.

Sed, forgesemaj ofte je la dieco de la mondo, ni malŝatas la malgrandan aŭ grandan poeton ekzistantan en ĉiu el ni, kaj ni parolas longege sen inspiro, sen ritmo, sen lumo, sen muziko, kaj niaj vortoj elfluas sensignifaj kaj lacigaj, kvazaŭ kreskaĵo disperdiĝanta je sennombraj folioj, nescianta la mirindecon de la floroj kiujn ĝi kunportas en si, neesprimataj.

Ni lernu paroladi de la popolo. Ni lernu de la paŝtistoj kaj de

la apudmaraj loĝantoj. Kiom rigardadas unuj kaj aliaj, en silento, la majestecon de la mondo, tie kie la spirito korbatus kun granda ritmo! Kiom da senmezura grandeco estas reflektintaj iliaj okuloj; kiom da beleco de ĉieloj bluaj, de herbejoj verdaj kaj de maroj ofte kolorŝanĝantaj kiel virgulina vizaĝo, de ruĝaĵoj aŭroraj aŭ sunsubiraj, de nebuloj grizaj kaj pluvoj malklaraj! Kiom da vento aŭdis iliaj oreloj, kiom da ritmaj ondaroj, kaj la tondroj kiuj alproksimiĝas kaj reforiĝas, kaj la muĝado de la bovoj kaj krioj misteraj tra la spaco! Kiom da odoro je saloza akvo kaj herbo freŝa; kaj kiom iliaj sentoj estas ame tuŝitaj de ĉio pura! Iliaj mienoj aspektas kvazaŭ ravitaj de tio kaj vere parolas; sed, kiam ili parolas, iliaj vortoj estas tute sencoplenaj. Ĉu vi ne rimarkis la kant-paroladon de la montaranoj aŭ de la maristoj? Ilia parolo estas muzika, ĉar ĝi naskiĝas pli proksime de la ritma korbato de la kreitaĵo.

Mi memoras tagon ĉe la grandaj altaĵoj Pireneaj, en plena tagmezo, dum kiu ni antaŭeniris perdiĝinte tra tiuj altaj solecoj. Sur la nuda ŝtono ondarsimila ni estis erarintaj ĉian vojon, kaj vane ni demandis per malkvieta okulo la mutan grandecon de la montaraj senmovaj. Nur la vento tie laŭtis per nefiniĝanta krio. Subite, en la krio de la vento, ni aŭdis nevideblan tintilaron; kaj niaj timigitaj okuloj, ne kutimiĝintaj al tiaj grandecoj, tre mal-facile ekvidis ĉevalinaron kiu en krutajo de malabunda verdeco sin paŝtis. Esperoplenaj, ni aliris tien ĝis ni renkontis la paŝtiston kuŝantan apud la fumanta marmito, kiun la knabo paŝtist-helpanto, genuojn surtere, kun atento zorgadis. Ni demandis pri vojo, kaj la viro, kiu ŝajnis el ŝtono, turnis la okulojn en sia kvieta vizaĝo, levis malrapide la brakon montrante nedifinitan vojon, kaj movis la lipojn. En la tondranta bruo de la vento, kiu ĉian voĉon englutis, flosadis nur du vortoj kiujn la paŝtisto ripetadis kun insisto: "Tiu kanalo..." kaj montradis tien, neprecize, en la supron de la montoj. "Tiu kanalo!..." Kiel belaj estis la du vortoj, en la vento majeste dirataj; kiom plenaj de senco, de poezio! La kanalo estis la savanta vojo, la akvoŝuejo tra kiu defluas la akvoj de la degelintaj neĝoj... Kaj ĝi estis, ne iu ajn, sed "tiu kanalo", tiu kiun li perfekte distingis el la aliaj; ĝi estis io, ĝi havis animon, ĝi estis *tiu kanalo*... Ĉu vi rimarkas? Por mi, tio estas paroli...

Mi memoras nokton trans la Pireneo, kiam eliris el la mallumo infanino kantanta per feina voĉo. Mi petis ŝin ke ŝi diru al mi ian vorton en sia propra lingvo, kaj ŝi, tute mirigita, montris la stelbrilantan ĉielon, kaj parolis nur tiel: "La steloj". Kaj ŝajnis al mi ankaŭ ke tio estas paroli.

Mi memoras vesperon sur pinto de la Kantabra marbordo, kie la sunsubiroj estas belaj. Oni iradis tien rigardi la sunon subiĝantan en la maron; ĉiuj venis parolante; sed, alveninte tien, ĉiu silentadis antaŭ la maro varianta je koloroj. Alvenis du maristoj,

ili sin metis antaŭ la senfina marbordo kaj dum longa tempo, unu apud la alia, silentis. Poste, unu el ili, ne moviĝante nek sin turnante al la kunulo, diris al li: "Rigardu". Kaj ĉiuj aŭdintaj tion rigardis antaŭen, vidante ĉiu mirindaĵon propran. Ankaŭ, tio estas paroli: kaj ĉio alia, malplenaj vortoj.

"Tiu kanalo"... "La steloj"... "Rigardu"... Vortoj kiuj kunportas kanton en si, ĉar ili naskiĝas en la ritma korbato de la Universo... Nur la naiva popolo povas ilin eldiri, kaj la poetoj rediri kun naiveco pli intensa kaj pli laŭta kanto: kun lumo pli hele mal-kovra. Ĉar la poeto estas la homo plej naiva kaj plej scianta el la tero.

Kaj, kiam la poetoj scios, ĝin ellerninte, sian lingvon superbelan, kaj forgesigos al ni ĉiun alian post kiam tiu-ĉi estos jam forgesita de ili, tiam alvenos ilia regno, kaj ni ĉiuj parolos tiel, ravitaj de la muziko kiu kreas. Ni ĉiuj parolos preskaŭ kantante, per voĉo elirinta el la interno de ĉiu mem, malŝatante la artifikon de la interkonsentitaj lingvoj, kaj ĉiu estos komprenata nur de tiuj kun kiuj li bezonos interkompreniĝi; sed, kiam li parolos, el la fundo de l'animo, kun amo, li komprenigos sin de ĉiuj kiuj kun rava amo lin aŭskultos; ĉar en amo okazas tio, ke duonkompreni vorton estas pli bona kompreno ol kompreni ĝin tute: kaj tiu-ĉi estas la sola universala lingvo (1).

Ne estas la ekstera harmonio la plej dezirinda, sed la interna; ĉar ne estas pro la bruo de la vortoj kial ni, ĉiuj homoj, estas ĉiratoj, sed pro la spirito unika kiu ilin naskas diversaj en la mistera varieco de la mondo. Kaj tiun spiriton ni devas serĉi tra tiu varieco mistera, rigardante la parolon kiel sanktegan neprofaneblan aĵon, kaj parolante ĉiu, kun sankta timo, la lingvon de la popolo en kiu Dio naskis lin, al li donante per ĝi lian kreantan parolon.

AL LA GEKANTISTOJ EL TERRASSA (2)

Kiel vi vekigiĝis, amikoj el Terrassa! kian krion vi eljetis al la naskiĝanta suno! Vi, la laboristoj: dormadis en via laboro, kaj

(1) Necesas esti leginta la tutan verkon de Maragall, por bone kompreni la ĝustan senco de tiu paragrafo. Pli ol kontraŭstari la "artefaritajn" lingvojn "universalajn", nia poeto kontraŭstaras la artifikon de la paroloj nure "parolaj", ne venantaj rekte el la koro. Tiu sento kuŝas en la centro de la sistemo de Maragall. Cetere, en sia tuta estetiko, Maragall lasas sin treni de pure poezia vidmaniero; kaj liaj teorioj, ne ĉiam konfirmitaj de li en la praktiko, foje disfalas antaŭ rigore scienca konsiderado.— Noto de la Kompilinto.

(2) Parolado antaŭ voĉkoncerto.

laborante vi sonĝadis. Kaj via sonĝo estis jena. Estas forte dolĉe gajni al si la panon kaj ĝin porti hejmen; estas dolĉe vidi la gefilojn manĝantaj kaj la maljunulojn tute vestŝirmitajn ripozadantaj ne mankaĵe je io kaj la edzinon belvestitan mastrumadanta en la abundeco de la hejmo...; Sed, ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Estas ebriga la fiereco pri l' laboro, kiam oni sin sentas mastro de l' aferoj, kaj kiam oni ilin transformas ilin riĉigante kaj sin riĉigante per ili; estas plezuro fariĝi riĉa... sed, ĉu ne ekzistas io alia?... ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Estas profunda ĝojo laborakiri por si la necesajn kaj la superfluon, kaj batali kaj venki, kaj bela, kaj nia, sur la personojn, kiuj en ĝi loĝas kaj sur tiujn, kiuj eniras kaj eliras, kaj grandigadi ĉirkaŭ ni nian imperion... sed, ĉu ne ekzistas io alia ankoraŭ?... Ĉu ne ekzistas io pli bona ol la regadoj kaj imperioj, pli bona ol domo granda kaj propra, pli bona ol ringoj ĉe la fingroj kaj diademoj ĉe l' temploj, pli bona ol oro, pli bona ol pano? (Dio mia, pli bona ol pano!) Tiu estis via sonĝo, kaj tiu la maltrankvilo por via sonĝo. Sed subite vi malfermis la okulojn al la radio de la naskiĝanta suno, kiu ilin vundis, kaj ekkreis en unu kanto, vi, malriĉuloj kaj riĉuloj, malgrandaj kaj grandaj, mastrantoj kaj mastratoj, venkantoj kaj venkatoj de l' laboro, kaj vi spertis ke en tiu kanto ĉiuj vi egale ĝojas, kaj ke tiu frateco de la kanto estas pli bona ol la pano, ol la oro, kaj ol ĉiuj riĉaĵoj kaj regadoj sur la mondo.

Kiam malriĉulo kantas, li ridas je la riĉuloj kaj je iliaj riĉaĵoj, kaj kiam riĉulo kantas li sentas sian ĝojon frata al tiu de la malriĉulo, kaj eĉ li donas al li la sangon. Efektive kiam oni kantas, oni sentas sin liberigita de ĉia bezono, de ĉia timo, de ĉia ambicio, ĉar tiam parolas en ni tiu senmorta parto de nia estaĵo, kiu ne povas suferi malsaton nek malvarmon, kiu ne povas esti ĝenata nek prenata de iu nek pro io en la mondo, nek ankaŭ ĝi havas bezonon de regado por fariĝi kontenta. Kiam patrino kantas al sia filo, eĉ se tio okazas en mizera angulo, en tiun angulon eniras konsolo, kiu kontraŭstaras ĉiaspecan maltrankvilon. Se reĝo kantadus en sia palaco, vi vidus la kronon fali de lia kapo, kaj lin, malsupreniradi kvazaŭ ensorĉita, ŝtupon post ŝtupo, de sia altaĵo, ĝis li ame kunmiksiĝus kun la popolamaso, forgesante ĉiun alian reĝecon. La martiroj pro la grandaj faktoj, tamen, ĉu malriĉaj kaj sensciaj ili estas, ili ŝajnas reĝoj, kiam kantante ili iras morti, kaj mortas sensente. Efektive ekzistas interne de ni io pli forta ol la egoismo kaj la morto, kaj ĝi estas la kanto de nia animo. Iafaje ĝi kantas sen voĉo en l' aero. Kiam volonte vi donas almozon al almozulo, kaj liaj benoj sekvas vin kiel trenaĵo, vi aŭskultu vin bone: vi sentos kvazaŭ ion strangan kaj plezurigan, vi ne scios kie, sed tre interne, tre interne de vi: ĝi estas la ani-

mo, kiu kantas. Kiam la virino, kiun vi iluzie amas, rigardas vin, nur rigardas, sed tre dolĉe, vi ne scias kio okazas en vi, vi nur perceptas certan kaj grandan harmonion en via estaĵo: ĝi estas la kanto de l' animo. Kiam ŝtormo de la vivo pasis sur vi lasante vin senkuraĝaj kaj sencelaj, poste fariĝas en vi kvieto kvazaŭ morta: al vi ŝajnas, ke ĉio finiĝis por vi kaj rigardas ĉion, kio estas ĉirkaŭe, kun kvazaŭ definitiva torporo; sed jen en horo neatendita, tial ke brilas sunradio, kiu ne brilis, aŭ pro rido de infano, aŭ eble vidante pli grandan malfeliĉon, meze de la granda kvieto de via malĝojo, la animo rekomencas serene sian kanton de vivo, kaj larvoj tre dolĉaj supreniras al viaj okuloj kaj paca rideto kvazaŭ ĉielarko, al viaj lipoj, kaj vi sentas interne iom da serena eterneco.

Ĉu vi ne kredas, ke tiuj momentoj estas io plej bona en la vivo? Pli bona ol oro, pli bona ol regado, pli bona ol pano? Do, vi diru nun al mi, ĉu via kuniĝo por kantadi kaj aŭdi kantadon ne estas vekigo via al la vera vivo, por renovigi per viaj kunfratiĝintaj voĉoj tiujn momentojn de liberiĝo kaj saviĝo supre de via laboro, de viaj mizeroj kaj de viaj ambicioj. Vi povas per la manoj gajni la ĉiutagan panon, vi povas batali inter vi por la riĉeco kaj regado, sed, estas same, ĉar ĉiufoje kiam vi kunlernas kantadi unufoje, vi kunlernas vivi en ĉio cetera kiel fratoj; kaj kantante, kantante, vi atingos idealon de humaneco, en kiu ne ekzistas mastrantoj nek mastratoj, nek malriĉuloj nek riĉuloj, nek malgrandaj nek grandaj, sed en kiu, kantante per unu voĉo, per sia, kia ajn ĝi estas, ĉiu ĝin trovos ame kunligita kun ĉiuj aliaj en la granda himno de la universala animo, kiu estas fonto de la tuta vivo. Ni kantu, do, kunfratoj, la horo estas bela...

Trad. JOSEP VENTURA.

KANZONO

Dimanĉon matene, sub la varmega suno falanta en la placon de Sarrià, mi vidis maljunulon el tiuj kantante trairantaj la mondon, kiu solene staris kaj kantis meze de rondeto de infanoj lin aŭskultantaj kun malfermita buŝo.

Li kantis per plena voĉo, kun tia fremda akcento elvokanta vizion pri longaj marŝadoj tra nedifinitaj vojoj al malproksimaj horizontoj, trairante kampojn kaj urbojn, solecajn montojn kaj vastajn ebenaĵojn plenajn de dissemataj vilaĝoj, elportante sunon kaj roson, pluvojn kaj ventojn, ĉiam antaŭen, ĉiam malproksimen, kantante—malarangata la barbo kaj la longa griza hararo libere fluganta—fremdajn kanzonojn per akcento ĉie fremda, kaj ĉie trovante rondeton de geknaboj pretaj ĉirkaŭi lin kaj lin aŭskulti kun buŝo malfermita.

Mi tuj sentis ion moviĝi en mi, kvazaŭ degelo, kaj forlasante malrapide la promenejon mi ekrevis tute dolĉe.—Se mi estus poeto—mi pensis—en la aĝo de dudek jaroj, havanta la amatinon malproksime, mi vokus tiun viron kaj veniguŝ lin sidadi kun mi en iun ajn angulon de kvieta beleco, kaj diktus al li la kanzonon de mia amo; kaj kiam li estus ĝin ellerninta, mi, petante al li ĝian neforgeson, montrus al li la punkton de la horizonto en direkto al la malproksima feliĉa loko.

La maljunulo forirus kantante, kantante mian kanzonon por ĝin ne forgesi, kaj al ĝi tuj aldonus sian akcenton, akordante ĝin al la ĝojo de la momento pro la denova marŝado kaj mondonaco ricevita.

Kaj antaŭen iradus la kanzono. La sunradioj orumus ĝin kaj la roso donus al ĝi misteran ĉarmon; ĝi fariĝus forta pro la ventoj kaj dolĉa pro la matenaj odoroj; la maljunulo ĝin kantus larmoplena meze de la plej grandaj mizeroj, etendante la manojn al peco da pano; kaj en bonsorta tago li ĝin kantus bakusa ŝanceliĝante post la eliro el vintrinkejo; la morgaŭon matene, dum li marŝus tute sola tra la arbaroj, ĝi estus pura kiel birda trilo; kaj vespere, je lia alveno al la urbo jam tute lumoplena, ĝi tordiĝus volupte. Kaj ĉie oni lernus ĝin, ĉiu siamaniere. Eĉ la maljunulo mem, aŭdante ĝin ĥore rekantata ĉirkaŭe, vidus ĝin transformita, li ĝin ree lernus, malnova ĉiam kaj ĉiam nova.

Kaj ian tagon—ian tagon!—alvenus la maljunulo en belan vilaĝon dum granda festo; ĉiuj troviĝus sur la stratoj, tra la stratoj meze de muzikoj, kaj en la aero estus sonora bruego. Bela tago, bela suno gajigus tiun matenon. Kaj la viro stariĝus en la mezo de la placo kaj aŭdigus mian aman kanzonon kiel kanton de festo. Kaj ĝi estus tia, ĉar ĉiu en ĝi sentus la spiradon de l' longa marŝado, la sunon kaj la roson, la postsignojn de ĝojoj kaj mizeroj, la froton de l' popolamasoj: ĉion-ĉi kreskigatan de mia kvinta amo.

Kiam li estus fininta, grandaj laŭdoj resonus ĉirkaŭ li kaj multan monon li kolektus, tre ĝoje donacitan. Kaj meze de la popola bruo li aŭdus klaran kaj delikatan voĉon, dirantan:—Mi ne scias kion enhavas tiu-ĉi kanzono, tiele al mi plaĉan.—Kaj li, sin turnante, respondus:—Nur povas esti tio, ke por vi ĝi estis verkata.—Kaj tiam li rakontus al la knabino kiel kaj kie ĝi estis al li instruata.

Tiam ŝi ĝojege respondus:—Diru al li, do, ke mi en la interno de mia koro tiel same parolis.—

Nu, kion plu mi rakontos? Ke tiele finiĝis mia revo. Sed ĝi ne tute finiĝis; ĉar tio okazis dimanĉon, kaj alian dimanĉon, kiam mi jam ne rememoris pri tio, mi vekigis en mia lito, frumatene, ankoraŭ mallume, kaj sur mia soleca strato mi aŭdis pezan kaj malrapidan paŝadon alproksimiĝantan kun kanzono mallaiĉe sonanta el la lipoj. Kaj tiu kanto estis al mi tiel dolĉa, ke ĝi ŝajnis kanta-

ta en mi mem, kaj havis tian misteran ravon, ke mi ne sciis ĉu mi dormas aŭ ne. La malrapida paŝado kaj la kanto malpeza pasis kaj baldaŭ foriĝis, kaj la strato restis denove kvieta kaj soleca. Ektagiĝis ĉe mia fenestro kaj mi denove dormiĝis; sed la kanzono restis en mia memoro. Kaj iu, al kiu mi ĝin ripetis, diris al mi ĉu ĝi estas popola kanto el Rusiljono.

Sed mi kredas ke ĝi estas la revita kanzono de la reva amo ju-neca, kiu revenis al mi transformita. Kaj mi pensas ke ni ĉiuj vivas, pli ol ni supozas, en misteraj realaĵoj.

Trad. ROMA GUARDIET.

LA LECIONO DE LA MIGDALARBOJ

Dum tiu-ĉi monato la bela afero estas la migdalarboj, kiuj ekfloras. Ekzistas naiveca senbridiĝo ĉe l' ekfloro de tiuj arboj. Ili estas kuraĝaj, nedubehle! Ŝajnas ke ili ne scias kion ili faras. Ili nur rapidas ekflori, kaj jen ili ĉe l' ekfloro! Ili ne sin tenas laŭ tio kio estas kaj laŭ tio kio devas esti. Ili ne pripensas ke estas ankoraŭ malproksima la printempo, nek ke la malvarmoj ankoraŭ atendas. Ili ne prenas zorgon unue ekfolii, antaŭesplorinte la aerojn. Sed oni vidas ke meze de l'unua dormo ili vekigis kun la granda avido ekflori, kaj, ne aŭskultinte ordonon nek konsilon, ili sin gaje donas al tio, kion la koro al ili inspiras. Ili leviĝas noktomeze kun granda amasbruo, kiel infanoj irontaj al kunekskurso.

Ho! kiel esprima estas la bona vetero, kiam ĉiuj folioj ekeligas la pinton kaj esploras la aeron por sendangerigi en ĝi la ekfloradon! Unue la folio, poste la floro, poste la frukto.—Estas same, estas same;—ŝajnas ke ili respondas,—ĉu ni ne havas nun la deziron ekflori? Do ni ekfloru! Kiam ni ĝin havos ili vekigis, ni ekfolioj; kaj kiam por ekfrukti, ni ekfruktos. Kial porforte unue tio-ĉi, kaj poste tio kaj poste tio alia? Unue, kio unue sin okazikos, kaj poste, laŭ tio kio daŭros sin okazigante.—Ha! ĉiu afero en sia tempo!—Ĉiam estas tempo por ĉio, kiam enestas la deziro!

Kaj iun matenon de Januaro vi elaperas malvarmemaj al la fenestro, por vidi ĉu neĝas, kaj vi renkontiĝas kun la etendita ekflorado de la migdalarboj kiuj ridas! Kaj tiu rido vin kaptas, kaj vi ridas kune kun ili. Vi ridas je la malvarmo, kaj je la tuta vintro, kaj je la neĝo kiu venos, kaj je la morto kiu atendas. Sed ne per la amara rido de la vivlacigito, nek per la satana rido de la arrogantulo, nek per la malsprita rido de la ebrulo, sed per la luma rido de la naivulo, por kiu la vorto morto ne havas ian sencon.

Oni diras ke la terkulturistoj, kiam ili eltiras kalkulon pri siaj terlaboraĵoj, jam dekalkulas pri la migdalarboj la produktoduonon

pro malsukcesaj jarrikoltoj: ili dekalkulas la naivecon de l' arbo. Ho! la bela dekalkulo! Kaj oni diras ke, malgraŭ tio, la produktovanto estas abunda... Vi ja vidas ĉu estas riĉa la naiveco, kaj kiel troŝparaj antaŭ ĝi la fiksitaj prikalkuloj. La migdalarbo estas malavara; ĝi elĵetas la florojn al la malvarmo, ne kalkulinte tion kio el tio rezultas; kaj per unu trafa jarrikolto ĝi kompensas dek maltrafajn. Tial ke la floro de l' deziro estas tre fekunda.

Mi pri la migdalarbo dirus ke ĝi estas la arbo de la libereco; kaj ekplantus unu en ĉies hejmo kiel instruilon. Kaj niaj filoj naskiĝus liberaj, kaj niaj filinoj, elliberigantinoj de sklavoj: de la sklavoj de la ordo, de la sklavoj de l' prudento, de la sklavoj de l' morto.

Prezentu al vi ke vi neniam ankoraŭ ekkonis la frenezajn de la migdalarboj, kaj ke iun tagon vi enamiĝas je eksterurba knabino, ridema pro inklino, vivmalkvieta kaj senembarasa, kun multe da bonkoloro ĉe l' vizaĝo, — kiun nun mi imagas vidi, — kaj la okulparo brilanta. Vi petas ŝin por edzino, kaj ŝi gestas jese per la kapo, kaj oni ŝin edziĝodonas al vi. Ŝi estas jam via. Kaj ian frumatenon ŝi faras al vi grandan frenezajn, kiun vi ne scias kiel ekpreni ĉar ĝi kontraŭstaras ĉian leĝon kaj kutimon viajn. Tiam, kun la tuta graveco de la tri mil konvencioj kiujn vi portas interne, kun la tuta graveco de l' viro prudenta, vi ekdiras kun ama seriozeco al la juna edzino: — Sed, kion ci pretendas cin belgarnante nunhore kiam ankoraŭ ĉiuj dormas? Kien ci volas iri tra la stratoj kiam ankoraŭ estas mallume kaj sentigas sin malvarmo; nek al ia festo, nek vizito, ĉar ĉies pordoj estas ŝlositaj? kaj se ci ne volas foriri de ĉi-tie, kion ci eltiras el cia plibeligo en tiu-ĉi dormohoro, kiam mi sola povas, ĉiuokaze, vin vidi, kaj sufiĉe vi al mi plaĉas ĉiamaniere? Kia frenezajo estas tiu?... — Kaj ke ŝi al vi respondas: — Ĉe mi estas arbo kiu ekfloras meze de Januaro.

Ho! kiel vi restos konsternitaj kaj mirigitaj, se vi ne konis la liberecon de la migdalarboj! Vi opinios ke vi edziĝis kun feino, kaj, laŭeble, vi krucsignos antaŭ ŝi tri fojojn, kaj, laŭeble, vi ekprenos ŝin en viajn brakojn kiel vivon novan. Kaj, ĉio kune, ĝi estos ke ŝi instruis al vi la lecionon de la migdalarboj.

Dum tiu-ĉi monato, la bela afero estas la migdalarboj, kiuj ekfloras...

Trad. JOSEP VENTURA

EMILI GUANYABÉNS

(1860)

Bibliografio: Alades, poemoj (1897); Voliaines, poemoj (1903).
Tradukoj: Trasplantades, traduko de modernaj francaj poemoj (1911).

ĈIUTAGE

Sunradioj sur kampojn falas plene.
Restas ĉiel' serene,
je nub', je ĉio sene.
Jen, ŝvitante—:
kamparan'—laboradante;
bovoparo—plugadante.
En flu' verŝiĝas la ŝvit'
de la kapo de l' plugist',
kaj la tero ŝvitgutojn glute prenas
kaj viron danke benas.
Merite ja li penas:
li ŝvitante
iras, teron plugante.
Kampara verd' kaj bluo de ĉiel'
longdaŭre kisas sin,
longdaŭre kiel lumohel'.
La griloj kvazaŭ preĝas sen difin'.
Alvenas jam malhel',
kiun dispelos sun'.
Kampoj: ĝis morgaŭ, nun!

Trad. JOSEP GRAU CASAS, L. K.